# RINKITINK EN OZ



De L. FRANK BAUM

Ilustrita de John R. Neill







ĈI TIU LIBRO APARTENAS
AL

# RINKITINKO EN OZ







# RINKITINKO EN OZ

DE

L. FRANK BAUM

AŬTORO DE


La Vojo al Oz, Doroteo kaj la Sorĉisto en Oz, La Smeralda Urbo de Oz, La Lando Oz, Ozma de Oz, La Miksĉifona Knabino de Oz, Tiktoko de Oz, La Birdotimigilo de Oz

ILUSTRITA DE

JOHN R. NEILL

TRADUKITA DE

DONALD BROADRIBB




Rinkitinko en Oz
De Baum, L. Frank (Lyman Frank), 1856–1919
Ilustrita de Neill, John R. (John Rea), 1877–1943
Tradukita el la angla al esperanto de Broadribb, Donald (Donald Richard), 1933–
Unue eldonita en la angla kiel *Rinkitink in Oz* de Reilly & Britton, 1916.
Unue eldonita en esperanto de Bookleaf Publishing, 1997.
Ĉi tiu traduko kopirajta © 1997 Donald Broadribb.
Ĉi tiu eldono de Books Reborn, junio 2002, ISBN 1-877051-15-2. Vidu http://www.books-reborn.org/

La ilustraĵoj kaj aranĝo de ĉi tiu eldono laŭeble plej konformas al tiuj de la originala angla eldono de 1916. La litertipo estas 16 sur 18.7 pkt Elegant Garamond.

National Library of Australia Cataloguing-in-Publication (CIP) entry:

Baum, L. Frank (Lyman Frank), 1856-1919.
[Rinkitink in Oz. Esperanto]
Rinkitinko en Oz.

New ed.
For children.
ISBN 1 877051 15 2.


I. Neill, John R. (John Rea). II. Title.

813.4

Al
Mia Nova Nepo—
Robert Alison Baum








## ENKONDUKO AL ĈI TIU RAKONTO

Jen rakonto kies heroo estas knabo, knabo pri kiu vi neniam antaŭe aŭdis. Ankaŭ estas knabinoj en la rakonto, inkluzive de nia malnova amiko Doroteo, kaj kelkaj el la rolantoj vagas tre for de la Lando Oz antaŭ ol ili ĉiuj kunvenas en la Smeralda Urbo por partopreni en la bankedo de Ozma. Efektive, mi kredas ke vi trovos ĉi tiun rakonton tre diferenca de la aliaj historioj pri Oz, sed mi esperas ke vi ne malpli ĝuos ĝin.

Se al mi estos permesate verki plian libron pri Oz, ĝi rakontos kelkajn interesegajn aventurojn de Doroteo, Betinjo Bobin, Trot kaj la Miksĉifona Knabo en la Lando Oz mem, kaj kiel ili trovis kelkajn mirigajn ulojn kiuj tute ne povus ekzisti ekster felando. Mi suspektas ke ĉirkaŭ la tempo kiam vi legos ĉi

tiun rakonton pri Rinkitinko mi verkos tiun historion de Aventuroj en Oz.


Ne forgesu ofte skribi al mi kaj doni al mi viajn konsilon kaj sugestojn, kiujn mi ĉiam alte taksas. Mi ricevas tre multajn leterojn de miaj legantoj, sed ĉiu estas ĝojo por mi kaj mi respondas tuj kiam mi trovas sufiĉan tempon.

L. Frank Baum
Reĝa Historiisto de Oz.

"OZCOT"
ĉe HOLLYWOOD
en KALIFORNIO,
1916.

# LISTO DE ĈAPITROJ


1 La Princo de Pingario . . . . . . . . . . . . . . . 17
2 La Alveno de Reĝo Rinkitinko . . . . . . . . . 29
3 La Batalistoj el la Nordo . . . . . . . . . . . . . 44
4 La Dizertita Insulo . . . . . . . . . . . . . . . . . 56
5 La Tri Perloj. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 71
6 La Magia Boato . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 92
7 La Ĝemelaj Insuloj . . . . . . . . . . . . . . . .109
8 Rinkitinko Grave Eraras . . . . . . . . . . . . .127
9 Donaco por Zella . . . . . . . . . . . . . . . . . .142
10 La Ruzeco de Reĝino Koro . . . . . . . . . .153
11 Zella Iras al Koregoso . . . . . . . . . . . . . .167
12 La Ekscitiĝo de Bilbilo la Kapro. . . . . . .175
13 Zella Savas la Princon . . . . . . . . . . . . . .180
14 La Eskapo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .192
15 La Fuĝo de la Regantoj . . . . . . . . . . . . .210
16 Nikoroĉjo Rifuzas Kronon . . . . . . . . . . . .216
17 La Reĝo de la Knomoj . . . . . . . . . . . . . .226
18 Ingo Transdonas Sian Palruĝan Perlon . . .237
19 Rinkitinko Subridas . . . . . . . . . . . . . . . .265
20 Doroteo Venas Savi . . . . .275
21 La Sorĉisto Trovas Sorĉaĵon . . . . . . . . . . .281
22 La Bankedo de Ozma . . .291
23 La Perla Regno. . . . . . . .301
24 La Kaptita Reĝo . . . . . . .307



# La Princo de Pingario



## ĈAPITRO 1

Se, hazarde, vi havas mapon de Oz ĉemane, vi trovos ke la granda Nonesta Oceano lavas la limojn de la Regno Rinkitinko, inter kiuj kaj la Lando Oz situas strio de la lando de la Reĝo de la Knomoj kaj la Sabla Dezerto. La Regno Rinkitinko ne estas tre granda kaj situas proksime al la oceano, kaj ĉiuj domoj kaj la palaco de la Reĝo estis konstruitaj apud la bordo. La civitanoj loĝas grandparte sur la akvo, boatante kaj fiŝkaptante, kaj la riĉoj de Rinkitinko akiriĝas per

komercado laŭlonge de la bordo kaj kun la insuloj plej proksimaj.

Kvar tagojn da veturado per boato norde de Rinkitinko estas la Insulo Pingario, kaj kiam komenciĝas nia rakonto ĉi tie mi devas informi vin iomete pri tiu insulo. Ĉe la norda ekstremo de Pingario, kie ĝi estas plej larĝa, la tero estas du kilometrojn de unu bordo al la alia, sed ĉe la suda ekstremo ĝi estas apenaŭ duonan kilometron larĝa; sekve, kvankam Pingario longas ses kaj duonan kilometrojn de la nordo ĝis la sudo, oni ne povas diri ke ĝi estas tre granda insulo. Ĝi estas vere bela, tamen, kaj al la okuloj de la mevoj kiuj proksimiĝas al ĝi super la maro ĝi sendube similas grandegan verdan kojnon kuŝantan sur la akvo, ĉar ĝiaj herbo kaj arboj donas al ĝi la koloron de smeraldo.

La herbo atingis la randon de la deklivaj bordoj; la belaj arboj okupis la tutan centran parton de Pingario, farante seninterrompan arbareton kie la branĉoj renkontiĝis superkape kaj estis ĝuste sufiĉa spaco sub ili por la komfortaj domoj de la loĝantoj. Tiuj domoj troviĝis dise ĉie en la insulo, tiel ke mankis urbo aŭ urbego, krom se oni nomus la tutan insulon urbo. La baldakeno de folioj, alte superkape,

faris protektilon kontraŭ la suno kaj la pluvo, kaj la loĝantoj en la arbareto ĉiuj povis rigardi preter la rektajn arbotrunkojn kaj trans la herbokovritajn deklivojn al la purpura akvo de la Nonesta Oceano.

Ĉe la larĝa ekstremo de la insulo, norde, staris la reĝa palaco de Reĝo Kitikuto, la estro kaj reganto de Pingario. Ĝi estis bela palaco, konstruita tute el neĝblanka marmoro kaj sur ĝia kapo estis kupoloj el polurita oro, ĉar la Reĝo estis ekstreme riĉa. Tute laŭlonge de la bordo de Pingario troviĝis la plej grandaj kaj plej altkvalitaj perloj en la tuta mondo.

Tiuj perloj kreskis en la ŝeloj de grandaj ostroj, kaj la homoj rastis la ostrojn el iliaj akvaj bedoj, elserĉis la laktecajn perlojn kaj portis ilin laŭregule al sia Reĝo. Tial, unufoje en ĉiu jaro, lia Moŝto povis sendi ses el siaj boatoj, kun sesdek remantoj kaj multaj sakoj da valoraj perloj, al la Regno Rinkitinko, kie situis urbo nomata Gilgado, en kiu la palaco de Reĝo Rinkitinko staris sur rokoplena promontoro kaj agis, per siaj altaj turoj, kiel lumturo por gvidi velistojn al la haveno. En Gilgado la perlojn el Pingario aĉetis la kasisto de la Reĝo, kaj la boatoj reiris al la insulo portante riĉajn varojn kaj tiujn nutraĵprovizojn kiujn bezonis la popolo kaj la reĝa familio de Pingario.

La homoj de Pingario neniam vizitis alian landon ol Rinkitinkon, kaj tial malmultaj aliaj landoj sciis ke ekzistas tiu insulo. Sudokcidente estis insulo nomata la Insulo Frikso, kie la loĝantoj ne ŝatas perlojn. Kaj tre norde de Pingario—ses tagojn da veturado per boato, laŭdire—estis ĝemelaj insuloj nomataj Regoso kaj Koregoso, loĝataj de feroca kaj militema popolo.

Multajn jarojn antaŭ la efektiva komenco de ĉi tiu rakonto, dek grandaj boatoj da tiuj ferocaj militistoj el Regoso kaj Koregoso vizitis Pingarion, subite alteriĝante ĉe la norda ekstremo de la insulo. Tie ili komencis prirabi kaj konkeri, laŭ sia kutimo, sed la popolo de Pingario, kvankam nek tiel granda nek tiel forta kiel la malamikoj, sukcesis venki ilin kaj peli ilin ĉiujn reen al la maro, kie granda ŝtormo trafis la invadintojn el Regoso kaj Koregoso kaj detruis ilin kaj iliajn boatojn, tiel ke eĉ ne unu militisto revenis al sia propra lando.

Tiu venkiĝo de la malamikoj ŝajnis eĉ pli mirinda ĉar la perloserĉistoj de Pingario estis mildaj kaj pacemaj personoj kaj malofte kverelis eĉ inter si mem. Iliaj solaj armiloj estis iliaj ostrorastiloj; tamen restas fakto ke ili pelis siajn ferocajn malamikojn el Regoso kaj Koregoso for de siaj bordoj.

# Ĉapitro Unu

Reĝo Kitikuto estis nur knabo kiam tiu rimarkinda batalo okazis, kaj nun lia hararo estis griza; sed li bone memoris tiun tagon kaj, dum la sekvaj jaroj, lia sola konstanta timo estis pri nova invado fare de la malamikoj. Li timis ke ili sendos pli grandan armeon al lia lando, kaj por konkeri kaj por venĝi, kaj tiuokaze li povus malmulte esperi sukcese kontraŭbatali ilin.

Tiu malkvieto flanke de Reĝo Kitikuto instigis lin zorge atenti por trovi nekonatajn boatojn, kaj unu el liaj servistoj patrolis la marbordon konstante, sed li estis tro saĝa por lasi timon malfeliĉigi lin aŭ liajn regatojn. Li estis bona Reĝo kaj loĝis tre kontente en sia bela palaco, kun sia bela Reĝino Gario kaj ilia sola infano, Princo Ingo.

La riĉoj de Pingario kreskis jaron post jaro; kaj ankaŭ la feliĉeco de la popolo kreskis. Eble estis neniu loko, ekster la Lando Oz, kie kontento kaj paco manifestiĝis pli ol sur tiu bela insulo, kaŝita en la sino de la Nonesta Oceano. Se tiuj kondiĉoj restus neĝenite, ne necesus paroli pri Pingario en ĉi tiu rakonto.

Princo Ingo, la heredonto de ĉiuj riĉoj kaj la reĝposteno de Pingario, kreskis ĉirkaŭate de ĉia lukso;

sed li estis maturspirita etulo, kvankam iom tro solena kaj pensema, kaj li neniam povis toleri esti pigra dum eĉ minuto. Li sciis kie situas la plej bonaj ostroj kaŝite laŭlonge de la bordo kaj estis tiel sukcesa ostrotrovisto kiel ĉiu alia viro de la insulo, kvankam li estis tiel neforta kaj malgranda. Li havis propran boateton kaj rastilon por eltreni la ostrojn kaj li estis vere tre fiera kiam li povis porti grandan blankan perlon al sia patro.

Ne estis lernejo sur la insulo, ĉar la popolo de Pingario estis tre for de la civiliziteco kiu donas al niaj modernaj infanoj avantaĝojn kiaj lernejoj kaj kleraj profesoroj, sed la Reĝo posedis plurajn manuskriptajn librojn, kies paĝoj konsistis el ŝafpelo. Ĉar li estis inteligentulo, li povis instrui al sia filo iom da legado, skribado, kaj aritmetiko.

Studante siajn lecionojn Princo Ingo kutimis iri en la arbareton proksiman al la palaco de sia patro kaj rampi en la branĉojn de alta arbo, kie li iam konstruis platformon kun komforta seĝo sursidebla, kaj ĉion kaŝis la baldakeno de folioj. Tie, kie neniu ĝenis lin, li studadis la ŝafpelon sur kiu estis skribitaj la kuriozaj signoj de la Pingaria lingvo.

Reĝo Kitikuto multe fieris pri sia malgranda filo,

tute prave, kaj li baldaŭ alte estimis la juĝkapablon de Ingo kaj opiniis lin inda esti fidata pri multaj ŝtataferoj. Li instruis al la knabo la bezonojn de la popolo kaj kiel juste regi ĝin, ĉar li sciis ke iun tagon Ingo estos Reĝo anstataŭ li. Unu tagon li vokis sian filon al sia flanko kaj diris al li:

"Nia insulo nun ŝajnas sufiĉe paca, Ingo, kaj ni estas feliĉaj kaj prosperaj, sed mi ne povas forgesi tiujn terurajn homojn el Regoso kaj Koregoso. Mia konstanta timo estas ke ili sendos amason da boatoj por serĉi siajn samrasanojn kiujn ni venkis antaŭ multaj jaroj kaj kiujn la maro poste detruis. Se la militistoj venos multnombre ni eble ne povos kontraŭbatali ilin, ĉar mia popolo estas ja malmulte trejnita batali; ili certe kaŭzus al ni multajn vundojn kaj suferadon."

"Ĉu do ni estas malpli fortaj ol dum la tempo de mia avo?" demandis Princo Ingo.

La Reĝo penseme kapneis.

"Tio ne," diris li. "Por ke vi plene komprenu tiun mirindan batalon, mi devos konfidi al vi grandan sekreton. Mi posedas tri Magiajn Talismanojn, kiujn mi de ĉiam gardas zorgege, kaŝante de ĉiuj homoj la fakton ke ili ekzistas. Sed, por ke kiam mi mortos la

sekreto ne perdiĝu, mi decidis informi vin kio estas tiuj talismanoj kaj kie ili estas kaŝitaj. Venu kun mi, mia filo."

Li gvidis lin tra la ĉambroj de la palaco ĝis ili atingis la grandan bankedhalon. Tie, haltinte en la centro de la ĉambro, li klinis sin kaj tuŝis kaŝitan risorton en la kahelkovrita planko. Tuj unu el la kaheloj subeniris kaj la Reĝo etendis manon en la kavaĵon kaj eltiris silkan sakon.

Tiun sako li sekve malfermis, kaj montris al Ingo ke ĝi enhavas tri grandajn perlojn, el kiuj ĉiu estas granda kiel marmora globeto. Unu estis blua kaj unu estis delikate rozkolora, sed la tria estis purblanka.

"Ĉi tiuj tri perloj," diris la Reĝo, parolante per solena, impona voĉo, "estas la plej mirindaj kiujn iam konis la mondo. Ilin donacis al unu el miaj prapatroj la Reĝino de la Marvirinoj, potenca feino kiun foje li bonfortune savis de ŝiaj malamikoj. Danke pro tiu favoro ŝi donis al li ĉi tiujn perlojn. Ĉiu el la trio posedas mirigan potencon, kaj kiu ajn posedas ilin rajtas opinii sin tre bonfortuna. Ĉi tiu blukolora donas al la portanto forton tiel grandan ke nenia forto povas kontraŭi lin. Tiu palruĝe brilanta protektas sian



posedanton kontraŭ ĉiuj minacantaj danĝeroj, negrave el kie ili venas. La tria perlo—ĉi tiu purblanka—kapablas paroli, kaj ĝiaj vortoj estas ĉiam saĝaj kaj helpaj."

"Kion vi diras, mia patro!" kriis la Princo, ege mirante; "ĉu vi diras al mi ke perlo kapablas paroli? Laŭsone tio estas neebla."

"Via dubo ŝuldiĝas al via manko de scio pri fepovoj," respondis la Reĝo serioze. "Aŭskultu, mia filo, kaj vi scios ke mi parolas la veron."

Li tenis la blankan perlon ĉe orelo de Ingo kaj la Princo aŭdis voĉeton klare diri: "Via patro pravas. Neniam dubu tion kion vi ne povas kompreni, ĉar la mondo estas plena de mirindaĵoj."

"Mi petas pardonon de vi, kara patro," diris la Princo, "ĉar klare mi aŭdis la perlon paroli, kaj ĝiaj vortoj estis plenaj de saĝeco."

"La povoj de la aliaj perloj estas eĉ pli grandaj," pludiris la Reĝo. "Se mi estus malriĉa ĉiualimaniere, ĉi tiuj gemoj farus min pli riĉa ol ĉiu alia monarko en la mondo."

"Mi kredas tion," respondis Ingo, rigardante la belajn perlojn tre respektoplene. "Sed diru al mi, mia patro, kial vi timas la militistojn el Regoso kaj

Koregoso kiam vi posedas tiajn mirindajn povojn?"

"La povoj apartenas al mi nur kiam mi portas la perlojn sur mi," respondis Reĝo Kitikuto, "kaj mi ne kuraĝas konstante porti ilin ĉar mi timas ke ili perdiĝus. Tial mi gardas ilin sekure kaŝitaj en ĉi tiu niĉo. La sola danĝero estas ke eble hazarde miaj gardistoj malsukcesos trovi la alvenon de niaj malamikoj kaj lasos la militistajn invadantojn kapti min antaŭ ol mi povos alpreni la perlojn. Tiuokaze mi estus tute ne kapabla rezisti. Mia patro posedis la magiajn perlojn dum la tempo de la Granda Batalo, pri kiu vi tre ofte jam aŭdis, kaj la palruĝa perlo protektis lin kontraŭ damaĝo, dum la blua perlo ebligis ke li kaj lia popolo forpelu la malamikojn. Ofte mi suspektas ke la detruantan ŝtormon kaŭzis la femarvirinoj, sed pri tio mi ne havas pruvon."

"Mi ofte demandis al mi kiel ni sukcesis venki en tiu batalo," komentis Ingo penseme. "Sed la perloj helpos nin se la militistoj revenos, ĉu ne?"

"Ili estas same potencaj kiel ĝis nun," deklaris la Reĝo. "Efektive, mia filo, mi malmulte bezonas timi malamikon. Sed por ke kiam mi mortos la sekreto ne estu kaŝita forde la sekva Reĝo, mi nun donas ĝin

por ke vi gardu ĝin. Memoru ke ĉi tiuj perloj estas la laŭrajta heredaĵo de ĉiuj Reĝoj de Pingario. Se iam mi estos forprenita disde vi, Ingo, gardu bone ĉi tiun trezoron kaj ne forgesu ĝian kaŝejon."

"Mi ne forgesos," diris Ingo.

La Reĝo remetis la perlojn en la kaŝejon kaj la knabo iris al sia propra ĉambro por pripensi la mirindan sekreton kiun lia patro tiutage konfidis al li ke li gardu ĝin.



# La Alveno de Reĝo Rinkitinko



## ĈAPITRO 2

Kelkajn tagojn poste, dum hela sunoplena mateno kiam la venteto blovis milde kaj dolĉe de la oceano kaj la arboj skuis siajn foliŝarĝitajn branĉojn, la Reĝa Gardisto, kies tasko estis patroli la bordon, venis kurante al la Reĝo kun informo ke nekonata boato proksimiĝas al la insulo.

Unue la Reĝo multe timis kaj ekpaŝis cele la kaŝitajn perlojn, sed la sekvan momenton li pensis ke unu boato, eĉ se plena de malamikoj, ne povus

damaĝi lin, do li bridis sian timon kaj marŝis al la plaĝo por trovi kiuj estas la fremduloj. Multaj el la viroj de Pingario ankaŭ kunvenis tie, kaj Princo Ingo sekvis sian patron. Veninte al la bordo de la akvo, ili ĉiuj staris gapante fervore la alvenantan boaton.

Ĝi estis tre granda boato, ili vidis, kaj kovrita per baldakeno el purpura silko, brodita per oro. Ĝin remis dudek viroj, po dek ĉiuflanke. Dum ĝi proksimiĝis, Ingo povis vidi ke en la malantaŭo, sidante sur alta kusenkovrita ŝtatseĝo, estis malgranda viro kiu estis tiel ege dika ke li estis preskaŭ egale larĝa kiel alta. Tiu viro estis vestita per loza silka robo purpura kies faldaĵoj atingis liajn piedojn, kaj sur lia kapo estis ĉapo el blanka veluro kurioze kudrita per oraj fadenoj kaj havanta cirklon da diamantoj kudritaj ĉirkaŭ la rando. Ĉe la kontraŭa ekstremo de la boato staris kuriozforma kaĝo, kaj pluraj grandaj kestoj el santalligno estis stakitaj apud la centro de la veturilo.

Dum la boato proksimiĝis al la bordo la dika malgranda viro surpiediĝis kaj riverencis plurfoje laŭ la direkto de tiuj kiuj kunvenis saluti lin, kaj dum li riverencis li gestis per sia blanka ĉapo energie. Lia vizaĝo estis ronda kiel pomo kaj preskaŭ egale rozkolora. Ĉesinte riverencadi li ridetis tiel dolĉe kaj

feliĉe ke Ingo opiniis ke nepre li estas tre gaja persono.

La pruo de la boato surteriĝis sur la plaĝo, ekĉesigante sian rapidon tiel subite ke la vireto estis surprizita kaj preskaŭ falis kapantaŭe en la maron. Sed li sukcesis ekpreni la seĝon per unu mano kaj la harojn de unu el siaj remistoj per la alia, kaj tiel ekvilibrigis sin. Post tio, denove svingante sian juvelitan ĉapon ĉirkaŭ sian kapon, li kriis per gaja voĉo:

"Nu, finfine, jen mi alvenis!"

"Tion mi rimarkas," respondis Reĝo Kitikuto, riverencante tre digne.

La dikulo ĉirkaŭrigardetis ĉiujn solenajn vizaĝojn antaŭ li kaj ekridis gajege. Eble mi diru ke li duone ridis kaj duone gajkrietis, ĉar la sonoj kiujn li faris estis kuriozaj kaj komikaj kaj tentis ĉiun aŭdanton ridi kun li.

"He, he—ho, ho, ho!" li muĝis. "Ne anticipis min, mi komprenas. Kik-ik-ik-ik! Estas komike—vere komike. Ne sciis ke mi venas, ĉu? Hu, hu, hu, hu! Estas certe amuze. Sed jen mi, malgraŭ tio."

"Ĉit!" diris profunda, muĝe grumbla voĉo. "Vi ridindigas vin."

Ĉiuj rigardis por vidi el kie venis tiu voĉo, sed neniu povis diveni kiu sonigis la riproĉvortojn. La remantoj de la boato estis ĉiuj solenaj kaj silentaj kaj certe neniu sur la bordo parolis. Sed la vireto aspektis tute ne surprizita, eĉ ne ĉagrenita.

Reĝo Kitikuto nun alparolis la fremdulon, dirante ĝentile:

"Vi estas tre bonvena en la Regno Pingario. Eble vi degnos surteriĝi kaj laŭoportune informi nin pri kiun ni honorate rajtas akcepti kiel gaston."

"Dankon; mi faros tion," respondis la malgranda dikulo, paŝante kvazaŭ anaso el sia loko en la boato kaj transirante, iom malfacile, sur la sablan plaĝon. "Mi estas Reĝo Rinkitinko, el la Urbo Gilgado en la Regno Rinkitinko, kaj mi venis al Pingario por mem vidi la monarkon kiu sendas al mia urbo tiom da belaj perloj. Delonge mi deziras viziti ĉi tiun insulon; sekve, kiel mi jam diris, jen mi!"

"Min plezurigas bonvenigi vin," diris Reĝo Kitikuto. "Sed kial Via Moŝto havas tiel malmulte da servistoj? Ĉu ne estas danĝere ke la Reĝo de grava lando longe veturas en unusola nefortika boato, kaj kun nur dudek servistoj?"

"Nu, supozeble," respondis Reĝo Rinkitinko,



ridante. “Sed kion alian mi povis fari? Miaj regatoj ne permesus ke mi iru ien ajn, se ili scius. Do mi simple forkuris.”

“Forkuris!” kriis Reĝo Kitikuto, surprizite.

“Komike, ĉu ne? He, he, he—u, hu!” ridis Rinkitinko, kaj nur tiel mi povas laŭeble literumi la gajajn sonojn de lia ridado. “Imagu, Reĝo forkuras de sia propra popolo—hu, hu—kik, ik, ik, ik! Sed mi devis, ĉu vi komprenas!”

“Kial?” demandis la alia Reĝo.

“Ili timas ke mi miskondutos. Ili ne fidas min. Kik-ik-ik—Ho ve! Ne fidas sian propran Reĝon. Komike, ĉu ne?”

“Nenia damaĝo povas trafi vin sur ĉi tiu insulo,” diris Kitikuto, ŝajnigante ne rimarki la kuriozecon de sia gasto. “Kaj, kiam ajn plaĉos al vi reiri al via propra lando, mi sendos kun vi taŭgan eskorton el mia propra popolo. Intertempe, bonvolu akompani min al mia palaco, kie oni faros ĉion por komfortigi kaj feliĉigi vin.”

“Multe dankas,” respondis Rinkitinko, puŝante sian blankan ĉapon sur sian maldekstran orelon kaj elkore premante la manon de sia fratmonarko. “Mi estas certa ke vi povos komfortigi min se vi havas multe

da manĝaĵoj. Kaj rilate al feliĉeco—ha, ha, ha, ha!—nu, jen mia problemo. Mi estas *tro* feliĉa. Sed atendu! Mi kunportis al vi kelkajn donacojn en ĉi tiuj kestoj. Bonvolu ordoni al viaj servistoj ke ili portu ilin al la palaco."

"Certe," respondis Reĝo Kitikuto, multe plaĉite, kaj tuj li diris la necesajn ordonojn al siaj servistoj.

"Kaj krome," daŭrigis la dika Reĝeto, "ili ankaŭ prenu mian kapron el lia kaĝo."

"Kapron!" kriis la Reĝo de Pingario.

"Precize; mia kapro Bilbilo. Mi ĉiam rajdas lin kien ajn mi iras, ĉar tute ne al mi plaĉas marŝi, ĉar mi estas iomete dika—ĉu ne, Kitikuto?—iomete dika! Hu, hu, hu—kik, ik!"

La Pingarianoj komencis levi la grandan kaĝon el la boato, sed ĝuste tiam bruska voĉo kriis: "Zorgu, friponoj!" kaj ĉar la vortoj laŭŝajne venis el la buŝo de la kapro la servistoj tiom surpriziĝis ke ili maldelikate faligis la kaĝon sur la sablon.

"Jen! Mi avertis vin!" kriis la voĉo kolere. "Vi forfrotis la haŭton de mia maldekstra genuo. Ja kial vi ne milde traktis min?"

"Trankvile, Bilbilo," diris Reĝo Rinkitinko konsole; "ne riproĉu, mia knabo. Memoru ke ili estas

fremduloj, kaj ni estas iliaj gastoj.” Post tio li turnis sin al Kitikuto kaj komentis: “Vi ne havas parolantajn kaprojn sur via insulo, supozeble.”

“Ni tute ne havas kaprojn,” respondis la Reĝo; “nek iajn ajn bestojn kapablajn paroli.”

“Ankaŭ mi volegas ke mia besto ne povu paroli,” diris Rinkitinko, palpebrumante komike al Ingo kaj poste rigardante la kaĝon. “Li estas kelkfoje tre kolerema, kaj li indulgas sin per vortoj tute ne respektaj. Mi opiniis, unue, ke estos bonege havi parolantan kapron, kun kiu mi povos konversacii dum mi rajdos en mia urbo sur lia dorso; sed—kik-ik-ik-ik!—la fripono traktas min kvazaŭ mi estus kamenpurigisto anstataŭ Reĝo. He, he, he, kik, ik! Kamenpurigisto—hu, hu, hu!—kaj mi estas Reĝo! Komike, ĉu ne?” Tiujn lastajn vortojn li parolis al Princo Ingo, kiun li tuŝetis familiare sub la mentono, tre embarasante la knabon.

“Kial vi ne rajdas sur ĉevalo?” demandis Reĝo Kitikuto.

“Mi ne povas grimpi sur ĝian dorson, ĉar mi estas iom dika; jen la kialo. Ki, ki, kik, ik!—iom dika—hu, hu, hu!” Li paŭzis por viŝi la larmojn de gajeco el siaj okuloj kaj aldonis: “Sed mi povas facile suriri

kaj deiri la dorson de Bilbilo."

Nun li malfermis la kaĝon kaj la kapro zorge elmarŝis kaj ĉirkaŭrigardis paŭte. Unu el la remistoj portis el la boato selon el ruĝa veluro kaj sur kiu estis broditaj arĝentaj kardoj, kiun li ligis sur la dorson de la kapro. La dika Reĝo transmetis sian kruron trans la selon kaj sidigis sin komforte, dirante:

"Gvidu, mia nobla gastiganto, kaj ni sekvos."

"Kion! Laŭ tiu kruta monteto?" kriis la kapro. "Deiru de mia dorso tuj, Rinkitinko, alie mi ne movos min eĉ unu paŝon."

"Sed—pripensu, Bilbilo," protestis la Reĝo. "Kiel mi povos ascendi tiun monteton se mi ne rajdos?"

"Marŝu!" muĝe grumblis Bilbilo.

"Sed mi estas tro dika. Vere, Bilbilo, vi surprizas min. Ĉu mi ne portis vin tiel distancen por ke vi povu vidi iom de la mondo kaj ĝui la vivon? Kaj nun vi tiom maldankemas ke vi rifuzas porti min! Interkompense estas pripense, mia knabo. La boato portis vin al ĉi tiu bordo ĉar vi ne scipovas naĝi, kaj nun vi devos porti min laŭ la monteto ĉar mi ne povas grimpi. Nu, Bilbilo, ĉu ne juste?"

"Nu, nu, nu," diris la kapro, malafable, "silentu

kaj mi portos vin. Sed vi vere enuigas min, Rinkitinko, per via senĉesa babilado."

Farinte tiun proteston Bibbili komencis marŝe ascendi la monteton, portante la dikan Reĝon sur sia dorso tute facile.

Princon Ingon kaj lian patron kaj la tutan servistaron de Pingario multe mirigis aŭdi tiun disputon inter Reĝo Rinkitinko kaj lia kapro; sed ili estis tro ĝentilaj por fari kritikajn komentojn dum ĉeestas iliaj gastoj. Reĝo Kitikuto marŝis apud la kapro kaj la Princo sekvis, la servistoj venis plej malantaŭe kun la kestoj el santalligno.

Kiam ili proksimiĝis al la palaco, la Reĝino kaj ŝiaj servistinoj elvenis renkonti ilin kaj la reĝa gasto estis eskortita solene al la grandioza tronĉambro de la palaco. Tie oni malfermis la kestojn kaj Reĝo Rinkitinko montris la multaj belajn silkaĵojn kaj puntojn kaj juvelojn kiuj plenigis ilin. Ĉiu el la korteganoj kaj la damoj ricevis belan donacon, kaj la Reĝo kaj Reĝino ricevis multajn riĉajn donacojn kaj Ingo ne malmultajn. Tiel la tempo pasis plaĉe ĝis la Ĉambelano anoncis ke la manĝo estas preta.

Bilbilo la kapro deklaris ke li preferas manĝi la dolĉan riĉan herbon kiu kreskas abunde sur la tereno



de la palaco, kaj Rinkitinko diris ke la besto neniam povis toleri esti enfermita en stalo; do ili deprenis la selon de lia dorso kaj permesis lin vagi kien ajn li deziras.

Dum la manĝo Ingo dividis sian atenton inter admirado al la belaj donacoj kiujn li ricevis kaj aŭskultado al la gajaj paroloj de la dika Reĝo, kiu ridis kiam li ne manĝis kaj manĝis kiam li ne ridis kaj laŭŝajne multe ĝuis la oportunon.

"Dum kvar tagoj mi loĝis en tiu mallarĝa boato," diris li, "kaj la sola distraĵo estis rigardi la remistojn kaj kvereli kun Bilbilo; do min multe plezurigas denove esti sur la tero kun tiel amikemaj kaj agrablaj homoj."

"Vi multe honoras nin," diris Reĝo Kitikuto, ĝentile riverencante.

"Tute ne—tute ne, mia frato. Ĉi tiu Pingario nepre estas mirinda insulo, ĉar ĝiajn perlojn admiras la tuta mondo; nek mi neos la fakton ke mia regno estus malriĉa sen la riĉoj kaj gloro kiujn ĝi ricevas per negocado per viaj perloj. Tial mi de multaj jaroj volas veni ĉi tien por renkonti vin, sed mia popolo diris: 'Ne! Restu enhejme kaj bone kondutu, alie ni punos vin.'"

# Ĉapitro Du

"Ĉu ili ne trovos ke Via Moŝto mankas en via palaco en Gilgado?" demandis Kitikuto.

"Mi kredas ke ne," respondis Rinkitinko. "Komprenu, unu el miaj lertaj regatoj verkis pergamenon titolitan 'Kiel Bone Konduti', kaj mi opiniis ke estus profitige studi ĝin, ĉar mi kredas ke bona konduto estas unu el la belartoj. Mi ĵus severe riproĉis mian Lordon Kancelieron ĉar li venis matenmanĝi ne kombinte siajn okulbrovojn, kaj mi estis tiom malfeliĉa kaj bedaŭroplena ĉar mi vundis la sentojn de la povrulo ke mi decidis fermi min en mian propran ĉambron kaj studi la rulaĵon ĝis mi scipovos bone konduti—hi, hik, kik, ik, ik!—bone konduti! Lerta ideo, ĉu ne? Multe lerta! Kaj mi dekretis ke neniu eniru mian ĉambron, alie mi ege malplezuros, antaŭ ol mi estos preta eliri. Ili ege timas mian reĝan malplezuron, kvankam ili neniom timas min. Post tio mi metis la pergamenon en mian poŝon kaj eskapis tra la malantaŭa pordo al mia boato—kaj jen mi. Ho, hu-hu, kik-ik! Imagu kiom da ĉagreno estus en Gilgado se miaj regatoj scius kie mi estas jam ĉiminute!"

"Mi volonte vidus tiun pergamenon," diris la solenokula Princo Ingo, "ĉar se ĝi efektive instruas

onin bone konduti ĝi nepre valoras sian pezon per perloj."

"Ho, ĝi estas bonega eseo," diris Rinkitinko, "kaj bele skribita per ansera plumo. Aŭskultu ĉi tion: Vi ĝuos ĝin—ti, hi, hi!—ĝuos ĝin."

Li prenis el sia poŝo pergamenan rulaĵon ligitan per nigra rubando, kaj zorge malrulinte ĝin li laŭtlegis ĉi tion:

"'Bona Persono estas Tiu kiu Neniam estas Malbona.' Kion vi opinias, ĉu? Bela penso, ĉu ne? 'Sekve, por esti Bona, vi devas eviti Tion kio estas Malbona.' Ho, hu-hu-hu!—tre lerte! Kiam mi retroiros mi nomumos la verkinton de tio reĝa hipolorumo, ĉar, tute sendube, li estas la plej saĝa persono en mia regno—kion li ofte mem diris al mi." Dirinte tion, Rinkitinko klinis sin en sia seĝo kaj faris sian kuriozan nelaŭtan ridadon ĝis li tusis, kaj li tusis ĝis li sufokiĝis kaj li sufokiĝis ĝis li ternis. Kaj li ĉifigis sian vizaĝon tiel komike gaje ke malmultaj povis deteni sin de kunridado, kaj eĉ la bona Reĝino devis nelaŭte ridi malantaŭ sia ventumilo.

Kiam Rinkitinko resobriĝis post sia ridegado kaj viŝis siajn okulojn per fajna punta poŝtuko, Princo Ingo diris al li:

“La pergameno diras veron.”

“Jes, ĝi estas tute sendube vera,” respondis Rinkitinko, “kaj se mi povus persvadi Bilbilon legi ĝin li estus multe pli bona kapro ol nun. Jen alia parto: ‘Por eviti diri Malplaĉaĵojn, ĉiam Parolu Agrablaĵojn.’ Tio taŭgas por Bilbilo, tute senerare. Kaj jen parto kiu aplikindas al vi, mia Princo: ‘Bonaj Infanoj malofte estas punataj, pro tio ke ili ne meritas punon.’ Nu, mi opinias tion bone dirita, kaj ĝi montras ke la aŭtoro estas profunda pensanto. Sed la konsilo kiu plej multe impresas al mi estas en la sekva alineo: ‘Eble vi ne trovos ke estas egale Plaĉe Bone Konduti kiel Malbone, sed Aliaj Personoj opinios ke estas pli Plaĉe.’ Ha-hu-ho! kik-ik! ‘Aliaj Personoj opinios ke estas pli Plaĉe!’—hi, hi, hik, kik!—‘pli Plaĉe.’ Jadi—jadi! En tio troviĝas nobla instigo bone konduti, kaj kiam mi havos sufiĉan tempon mi provos ĝin.”

Li denove viŝis siajn okulojn per la punta poŝtuko, kaj subite memorante sian manĝon, li ekprenis siajn tranĉilon kaj forkon kaj komencis manĝi.

# La Batalistoj el la Nordo



## ĈAPITRO 3

Al Reĝo Rinkitinko tiom plaĉis la Insulo Pingario ke li daŭrigis sian reston tagon post tagon kaj semajnon post semajno, bone manĝante, parolante kun Reĝo Kitikuto, kaj dormante. De tempo al tempo li legis sian rulaĵon. "Ĉar," diris li, "kiam mi reiros hejmen, miaj regantoj fervore volos scii ĉu mi lernis 'Kiel Bone Konduti', kaj mi nepre ne seniluziigu ilin."

La dudek remistoj loĝis sur la malgranda ekstremo de la insulo, kun la perloserĉistoj, kaj ŝajne

al ili tute ne gravis ĉu aŭ ne iam ili reiros al la Regno Rinkitinko. La kapro Bilbilo vagis sur la herbokovritaj deklivoj, aŭ inter la arboj, kaj pasigis siajn tagojn precize kiel li deziris. Lia mastro malofte volis rajdi sur li. Bilbilo estis malofta kuriozaĵo por la insulanoj, sed ĉar estis malmulte plezurige paroli kun la kapro ili tenis sin for de li. Tio plaĉis al la besto, kiu ŝajnis bone kontenta esti sola por fari kion li deziras.

Foje Princo Ingo, dezirante esti ĝentila, marŝis al la kapro kaj diris: "Bonan matenon, Bilbilo."

"La mateno ne estas bona," respondis Bilbilo grumble. "Estas nube kaj humide, kaj laŭaspekte pluvos."

"Mi esperas ke vi kontentas en nia regno," pludiris la knabo, ĝentile ignorante la severajn vortojn de la aliulo.

"Ne," diris Bilbilo. "Mi neniam kontentas; do ne gravas al mi ĉu mi estas en via regno aŭ en iu alia regno. Foriru—ĉu vi bonvolos?"


"Certe," respondis la Princo, kaj post tiu forpuŝo li ne reprovis amikiĝi kun Bilbilo.

Nun kiam la Reĝo, lia patro, estas tiom okupata pri sia reĝa gasto, Ingo ofte estis lasita distri sin, ĉar

ne estus permeseble ke knabo partoprenu en la konversaciado de du gravaj monarkoj. Do li dediĉis sin al siaj studoj, kaj tagon post tago li grimpis en la branĉojn de sia plej amata arbo kaj sidis dum horoj en sia "arbosupra ripozejo", legante la valorajn manuskriptojn de sia patro kaj pensante pri tio kion li legas.

Ne supozu ke Ingo estis dorlotata aŭ aroganta ĉar li estas tiom solena kaj studema. Ĉar li estis filo de Reĝo kaj heredonto de trono, li ne rajtis ludi kun la aliaj knaboj de Pingario, kaj li devis esti tiom ofte kun la Reĝo kaj Reĝino, kaj lin ĉirkaŭis la pompo kaj digno de la kortego, ke mankis al li la gajaj oportunoj kiujn kutime havas knaboj. Mi ne dubas ke se li povus vivi kiel aliaj knaboj, li estus tre simila al aliaj knaboj; sed en la praktiko, lin premis liaj ĉirkaŭaĵoj, kaj li estis pli serioza kaj pensema ol konvenas por liaaĝulo.

Ingo estis en sia arbo unu matenon kiam, senaverte, granda nebulo ekkovris la Insulon Pingarion. La knabo apenaŭ povis vidi la arbon apud tiu en kiu li sidas, sed la folioj super li neebligis ke la humideco malsekigu lin, do li rulis sin en sia sidejo kaj profunde ekdormis.



Tiun tutan antaŭtagmezon la nebulo daŭris. Reĝo Kitikuto, kiu sidis en sia palaco parolante kun sia gaja vizitanto, ordonis flamigi la kandelojn, por ke oni povu vidi unu la alian. La bona Reĝino, patrino de Ingo, trovis ke estas tro mallume por labori pri sia brodado, do ŝi kunvokis siajn servistinojn kaj rakontis al ili belegajn rakontojn pri pasintaj temoj, por pasigi la tedajn horojn.

Sed nelonge post la tagmezo la vetero ŝanĝiĝis. La densa nebulo forruliĝis kvazaŭ peza nubo kaj subite la suno ŝutis siajn helajn radiojn sur la insulon.

"Tre bone!" kriis Reĝo Kitikuto. "Ni spertos plaĉan posttagmezon, mi certas," kaj li blovestingis la kandelojn.

Tie li staris momenton senmove, kvazaŭ ŝtonigite, ĉar terura krio el ekster la palaco atingis liajn orelojn—krio tiel plena de timo kaj hororo ke la koro de la Reĝo preskaŭ ĉesis bati. Tuj aŭdiĝis la kurado de piedoj dum ĉiu en la palaco, plene de ektimo, rapidis eksteren por vidi kio okazis. Eĉ dika malgranda Rinkitinko saltis de sia seĝo kaj sekvis sian gastiganton kaj la aliajn tra la arkohava vestiblo.



# Ĉapitro Tri

Post multaj jaroj la plej profundaj timoj de Reĝo Kitikuto realiĝis.

Surteriĝante ĉe la plaĝo, kiu estis nur kelkajn paŝojn for de la palaco mem, estis centoj da boatoj, ĉiu el ili estis plena de amaso da ferocaj batalistoj. Ili saltis sur la teron sovaĝe kriante defion kaj rapidis al la palaco de la Reĝo, supren svingante siajn glavojn kaj lancojn kaj batalhakilojn.

Reĝo Kitikuto, tiel plene surprizita ke li perpleksis, gapis la alvenantan armeon terurate kaj malgajigate.

"Ili estas la homoj el Regoso kaj Koregoso!" li ĝemis. "Ni vere perdiĝis!"

Tiam li ekpensis, unuafoje, pri siaj mirindaj perloj. Turninte sin rapide li rekuris en la palacon kaj rapidis al la halo kie kaŝiĝis la trezoroj. Sed la ĉefo de la batalistoj vidis la Reĝon eniri la palacon kaj ĉasis lin, kredante ke li intencas eskapi. Ĝuste kiam la Reĝo klinis sin por premi la sekretan risorton en la kaheloj, la batalisto ekkaptis lin de malantaŭe kaj sternis lin sur lian dorson sur la plankon, kaj samtempe li kriis al siaj soldatoj alporti ŝnuregojn kaj ligi la kaptiton. Tion ili faris tre rapide, kaj baldaŭ Reĝo Kitikuto trovis sin senpove ligita kaj superfortita de la

malamikoj. En tiu malgajiga kondiĉo lin levis la batalistoj kaj eksteren portis, kie la bona Reĝo vidis hontigan scenon.

La Reĝino kaj ŝiaj servistinoj, la oficiroj kaj servistoj de la reĝa domo kaj ĉiuj loĝantoj en tiu ekstremo de la Insulo Pingario jam estis kaptitaj de la invadantoj kaj ligitaj per ŝnuregoj. Tuj ili komencis porti siajn viktimojn al la boatoj, enĵetante ilin senzorge kvazaŭ ili estus amasoj da varoj.

La Reĝo ĉirkaŭrigardis serĉante sian filon Ingo, sed malsukcesis trovi la knabon inter la kaptitoj. Nek la dika Reĝo, Rinkitinko, estis ie videbla.

La batalistoj svarmadis en la palaco kvazaŭ abeloj en abelujo, serĉante ĉiun kiu kaŝis sin, kaj post iom longa daŭro de la serĉo la ĉefo demandis senpacience: "Ĉu vi trovas iun alian?"

"Ne," liaj soldatoj diris al li. "Ni kaptis ĉiujn."

"Sekve," ordonis la ĉefo, "forprenu ĉion valoran el la palaco kaj distiru ĝiajn murojn kaj turojn, tiel ke eĉ ne unu ŝtono restos sur alia!"

Dum la batalistoj okupas sin pri tiu tasko ni reiru al la knaba Princo, kiu, kiam la nebulo leviĝis kaj la suno ekbrilis, vekiĝis el sia dormo kaj komencis descendi de sia sidejo en la arbo. Sed la terorigaj krioj

de la popolo, miksitaj kun la krioj de la krudaj militistoj, devigis lin heziti kaj aŭskulti atente.

Post tio li rapide grimpis en la arbon, multe super sia platformo, al la plej supraj svingiĝantaj branĉoj. Tiu arbo, kiun Ingo nomis la propra, estis iomete pli alta ol la aliaj ĉirkaŭaj arboj, kaj atinginte la supron li depuŝis la foliojn kaj vidis grandan amason da boatoj sur la bordo—fremdaj boatoj, kun standardoj kiajn li neniam antaŭe vidis. Turninte sin por rigardi la palacon de sia patro, li trovis ĝin ĉirkaŭata de amaso da malamikoj. Tiam Ingo ekkonsciis pri la vero: ke la insulon invadis la barbaraj militistoj el la nordo. Li tiom malfortiĝis pro la teroro ke li eble falus se li ne volvus siajn brakojn ĉirkaŭ branĉon kaj alkroĉus sin ĝis la svensento forpasis. Post tio per sia balteo li ligis sin al la branĉo kaj denove kuraĝis rigardi tra la folioj.

La batalistoj nun okupis sin per portado de Reĝo Kitikuto kaj Reĝino Gario kaj ĉiuj aliaj kaptitoj al la boatoj, kie ili enĵetis ilin kaj kunĉenis ilin. Teruran scenon la Princo devis vidi, sed li sidis tute senmove, kaŝita de la laŭro da foliplenaj branĉoj disde ĉiu person sur la tero. Ingo tute bone sciis ke li neniom



povos helpi siajn amatajn gepatrojn, kaj ke se li descendos li nur estos devigata partopreni en ilia kruela sorto.

Nun procesio de la Norduloj pasis inter la boatoj kaj la palaco, portante la riĉajn meblojn, belegajn drapiraĵojn kaj maloftajn ornamaĵojn kiujn ili ŝtelis el la reĝa palaco, kune kun la manĝaĵoj kaj aliaj rabaĵoj kiujn ili povis akiri. Post tio la viroj el Regoso kaj Koregoso ĵetis ŝnuregojn ĉirkaŭ la marmorajn kupolojn kaj turojn kaj centoj da batalistoj tiris tiujn ŝnuregojn ĝis la kupoloj kaj turoj ekfalis ruiniĝinte sur la teron. Post tio ili dispecigis la murojn mem, ĝis malmulto de la bela palaco postrestis, krom vasta amaso da blankaj marmoraj blokoj faligitaj kaj dispuŝitaj sur la tero.

Princo Ingo amare larmis pro malĝojo rigardante la ruiniĝon de sia hejmo; tamen li estis senpova malhelpi la detruon. Kiam la palaco estis jam plene detruita, kelkaj el la batalistoj eniris siajn boatojn kaj remis laŭ la bordo de la insulo, dum la aliaj marŝis kiel granda korpuso laŭlonge de la insulo mem. Ili estis tiom multenombraj ke ili estiĝis vico etendiĝanta de unu bordo al la alia kaj ili detruis ĉiun domon renkontatan kaj kaptis ĉiun loĝanton.

La perloserĉistoj kiuj loĝis sur la suba ekstremo de la insulo penis eskapi per siaj boatoj, ili estis baldaŭ atingitaj kaj kaptitaj, samkiel la aliaj. Nek estis ia provo rezisti la malamikojn, ĉar la akraj lancoj kaj pikiloj kaj glavoj de la invadantoj teruris la korojn de la sendefenda popolo de Pingario, kies solaj armiloj estis la ostrorastiloj.

Kiam noktiĝis la tuta Insulo Pingario jam estis plene konkerita de la viroj el la Nordo, kaj ĝia tuta popolo estis sklavoj de la konkerintoj. La sekvan matenon la viroj el Regoso kaj Koregoso, kiuj ne povis fari pli da fiagoj, foriris de la sceno de sia triumfo, kunportante siajn kaptitojn kaj kunprenante ankaŭ ĉiun boaton troveblan sur la insulo. Multajn el la boatoj ili plenigis per riĉaj rabaĵoj, per perloj kaj silkaĵoj kaj veluraĵoj, per arĝentaj kaj oraj ornamaĵoj kaj la tuta trezoro kiu famigis Pingarion kiel unu el la plej riĉaj regnoj en la mondo. Kaj la centoj da sklavoj kaptitaj estos devigataj eklabori en la minoj de Regoso kaj la grenkampoj de Koregoso.

Tiel kompleta estis la venko fare de la Norduloj ke ne mirigas ke la batalistoj triumfe kantadis dum ili rerapidis hejmen. Grandaj premioj atendis, por

kiam ili montros al la aroganta Reĝo de Regoso kaj la terura Reĝino de Koregoso la rezultojn de siaj oceana atako kaj konkero.



# La Dizertita Insulo



## ĈAPITRO 4

Dum tiu tuta terura nokto Princio Ingo restis kaŝita en sia arbo. En la mateno li rigardis la Grandan amason da boatoj foriri cele sian propran landon, kunportante liajn gepatrojn kaj samlandanojn, kiel ankaŭ ĉion valoran kiun havis la Insulo Pingario.

Malfeliĉaj vere estis la pensoj de la knabo kiam la lasta boato fariĝis nur makuleto en la distanco, sed Ingo ne kuraĝis deiri de sia sekura sidejo antaŭ ol ĉiuj boatoj de la invadintoj malaperis preter la

horizonto. Tiam li descendis, tre malrapide kaj atente, ĉar li estis febla pro malsato kaj la longa laciga vaĉo, ĉar li estis en la arbo dum dudek kvar horoj sen manĝaĵoj.

La suno brilis sur la belan verdan insulon tiel hele kiel se neniu senkompata invadinto estus trairinta kaj ruiniginta ĝin. La birdoj plu ĉirpis inter la arboj kaj la papilioj flugis de floro al floro tiel feliĉe kiel kiam la lando estis plena de prospera kaj kontenta popolo.

Ingo timis ke nur li restas el la tuta nacio. Eble li devos pasigi sian vivon tie, tute sola. Li ne malsatos, ĉar la maro donos al li ostrojn kaj fiŝojn, kaj la arboj fruktojn; tamen la vivo frontanta lin estis tute ne alloga.

La unua ago de la knabo estis marŝo al kie la palaco iam staris kaj serĉo tra la ruinoj ĝis li trovis kelkajn erojn da manĝaĵo kiujn pretervidis la malamikoj. Li sidis sur bloko el marmoro kaj manĝis, kaj larmoj plenigis liajn okulojn dum li rigardis la ruinojn ĉirkaŭ si. Sed Ingo penis elteni brave, kaj satinginte sin li marŝis al la puto, intencante ĉerpi sitelon da trinkakvo.

Bonfortune ankaŭ tiun puton pretervidis la

invadantoj kaj la sitelo estis ankoraŭ ligita al la ĉeno kiu volviĝis ĉirkaŭ dika ligna vinĉo. Ingo prenis la krankon kaj komencis lasi la sitelon en la puton, kiam subite lin alarmis iom sufokita voĉo elkrianta:

"Atentu, tie supre!"

La sono kaj la vortoj ŝajnis indiki ke la voĉo venis el la fundo de la puto, do Ingo subenrigardis. Nenio estis videbla, pro la mallumo.

"Kiu vi estas?" li kriis.

"Estas mi—Rinkitinko," venis la respondo, kaj la fundo de la puto eĥis: "Tink-i-tink-i-tink!" fantomece.

"Ĉu vi estas en la puto?" demandis la knabo, multe surprizite.

"Jes, kaj preskaŭ droninta. Mi enfalis dum mi forkuris de tiuj teruraj batalistoj, kaj ekde tiam mi staras en ĉi tiu malseka truo, kun la kapo tuj super la akvo. Estas bonfortune ke la puto ne estas pli profunda, ĉar se mia kapo estus sub la akvo, anstataŭ super ĝi—hu, hu, hu, kik, ik!—sub anstataŭ super, pensu—nu, tiuokaze mi ne parolus al vi nun! Ha, hu, hi!" Kaj la puto morne eĥis: "Ha, hu, hi!" kio, kiel vi sendube komprenas, estis rido duone gaja

kaj duone malgaja.

"Mi multe bedaŭras," diris la knabo responde. "Mirigas min ke vi havas emon eĉ iomete ridi. Sed kiel mi eligu vin?"

"Mi konsideradis tion dum la tuta nokto," diris Rinkitinko, "kaj mi kredas ke plej bone estos ke vi subenlasu la sitelon al mi, kaj mi kroĉos min al ĝi dum vi vindos la ĉenon kaj tiel tiros min supren."

"Mi penos fari tion," respondis Ingo, kaj li suben lasis la sitelon tre zorge ĝis li aŭdis la Reĝon voki:

"Mi havas! Nun tiru min—malrapide, mia knabo, malrapide—por ke mi ne frotiĝu kontraŭ la malglatajn flankojn."

Ingo komencis vindi la ĉenon, sed Reĝo Rinkitinko estis tiom dika ke li estis tre peza kaj kiam la knabo sukcesis tiri lin duone supren en la puto lia forto estis jam elĉerpita. Li firmtenis la ĉenon laŭeble longe, sed subite ĝi glitis de lia teno kaj la sekvan minuton li aŭdis Rinkitinkon refali "plump!" en la akvon.

"Domaĝe!" vokis Ingo, vere malfeliĉe; "sed vi estis tiel peza ke mi ne povis malhelpi."

"Ve!" anheletis la Reĝo, el la suba mallumo, dum

li ŝprucis kaj tusis por eligi la akvon el sia buŝo. “Kial vi ne informis min ke vi delasos ĝin?”

“Mi ne havis sufiĉan tempon,” diris Ingo morne.

“Nu, mi ne suferas pro soifo,” deklaris la Reĝo, “ĉar estas sufiĉa akvo en mi por flosigi ĉiujn boatojn de Regoso kaj Koregoso—almenaŭ tiel ŝajnas al mi. Sed ne gravas! Mi ja ne efektive dronis, do kiel gravas?”

“Kion ni sekve faru?” demandis la knabo malkviete.

“Voku ke iu helpu vin,” estis la respondo.

“Estas neniu sur la insulo krom mi mem,” diris la knabo; “—kaj krom vi,” li pludiris, post aldona penso.

“Mi ne estas sur ĝi—ja domaĝe!—sed *en* ĝi,” respondis Rinkitinko. “Ĉu ĉiuj batalistoj jam foriris?”

“Jes,” diris Ingo, “kaj ili kunprenis miajn patron kaj patrinon, kaj nian tutan popolon, ke ili estu iliaj sklavoj,” li aldonis, vane penante depremi ploron.

“Do—do!” diris Rinkitinko softe; li paŭzis momenton, kvazaŭ pensante. Fine li diris: “Ekzistas aferoj pli mavaj ol sklaveco, sed mi neniam imagis ke puto povas esti unu el ili. Diru al mi, Ingo, ĉu vi povus delasi kelkajn manĝaĵojn por mi? Mi estas

preskaŭ morta pro malsato, kaj se vi povus suben sendi al mi kelkajn manĝaĵojn, mi estus enpute entute sata—hu, hu, hik, kik, ik!—entute sata. Ĉu vi komprenas la ŝercon, Ingo?"

"Ne petu min ĝui ŝercon ĝuste nun, Via Moŝto," petis Ingo per malfeliĉa voĉo; "sed se vi estos pacienca mi provos trovi ion manĝeblan por vi."

Li rekuris al la ruinaĵoj de la palaco kaj komencis serĉi erojn da manĝaĵoj per kiuj satiĝos la malsato de la Reĝo, kaj subite li surpriziĝis vidante la kapron Bilbilon, vaganta inter la marmoraj blokoj.

"Kio!" kriis Ingo. "Ĉu la batalistoj ankaŭ ne kaptis vin?"

"Se ili kaptus min," trankvile respondis Bilbilo, "mi ne estus ĉi tie."

"Sed kiel vi eskapis?" demandis la knabo.

"Sufiĉe facile. Mi tenis mian buŝon fermita kaj restis for de la friponoj," diris la kapro. "Mi sciis ke la soldatoj ne atentos maldikan oldan beston kia mi, ĉar al la okulo de fremdulo mi aspektas tute senvalora. Se ili scius ke mi kapablas paroli, kaj ke mia kapo enhavas pli da saĝeco ol cent iliaj propraj pensiloj, mi eble ne eskapus tiel facile."

"Eble vi pravas," diris la knabo.

"Mi supozas ke ili kaptis la oldulon?" senzorge komentis Bilbilo.

"Kiun oldulon?"

"Rinkitinkon."

"Ho, ne! Lia Moŝto estas sur la fundo de la puto," diris Ingo, "kaj mi ne scias kiel reeligi lin."

"Do li restu tie," proponis la kapro.


"Estus kruele. Mi certas, Bilbilo, ke vi amas la bonan Reĝon, vian mastron, kaj ne intencas kion diras viaj vortoj. Kune ni trovu ian metodon savi povran Reĝon Rinkitinkon. Li estas tre gaja kompano, kaj li havas koron ege afablan kaj molan."

"Ho, nu; la oldulo ne estas tre malbona, ensume," agnoskis Bilbilo, parolante per pli amika tono. "Sed liaj ŝercaĉoj kaj dika rido ege enuigas min, kelkfoje."

Princo Ingo nun rekuris al la puto, dum la kapro sekvis pli nehaste.

"Jen Bilbilo!" vokis la knabo al la Reĝo. "Ŝajnas ke la malamikoj ne prenis lin."

"La malamikoj estis bonfortunaj," diris Rinkitinko. "Sed ankaŭ mi, ĉar eble la besto povos helpi min el ĉi tiu truo. Se vi povos delasi ŝnuron en la puton, mi estas certa ke vi kaj Bilbilo, kuntirante, povos treni min al la tersurfaco."



"Estu pacienca kaj ni provos," respondis Ingo kuraĝige, kaj li kuris serĉi ŝnuregon inter la ruinaĵoj. Baldaŭ li trovis ŝnuregon uzitan de la batalistoj kiam ili faligis la turojn, kiun pro sia hasto ili forgesis forpreni, kaj iom malfacile li malligis la nodojn kaj portis la ŝnuregon al la buŝo de la puto.

Bilbilo jam kuŝigis sin por dormi kaj la rekantaĵo de gaja kanto sonis neklare el la puto, pruvante ke Rinkitinko pacience strebas distri sin.

"Mi trovis ŝnuregon!" Ingo suben vokis al li; kaj la knabo faris maŝon en unu finaĵo de la ŝnurego, tra kiun la Reĝo metu siajn brakojn, kaj la alian finaĵon li metis sur la bobenon de la vinĉo. Nun li vekis Bilbilon kaj ligis la ŝnuregon firme ĉirkaŭ la ŝultrojn de la kapro.

"Ĉu vi estas preta?" demandis la knabo, klinante sin super la puto.

"Jes," respondis la Reĝo.

"Kaj mi ne," grumblis la kapro, "ĉar mi ankoraŭ ne finis mian dormon. Olda Rinki estos sufiĉe sekura en la puto ĝis mi dormos unu-du horojn pli."

"Sed estas malseke en la puto," protestis la knabo, "kaj Reĝo Rinkitinko povos reŭmatismiĝi, tiel ke li devos rajdi sur via dorso kien ajn li iros."

# Ĉapitro Kvar

Aŭdinte tion Bilbio eksaltis tuj.

"Ni eligu lin," li diris fervore.

"Tenu firme!" kriis Ingo al la Reĝo. Li kaptis la ŝnuregon kaj helpis Bilbilon tiri. Ili baldaŭ trovis la taskon pli malfacila ol ili antaŭsupozis. Unu-dufoje la pezo de la Reĝo minacis treni kaj la knabon kaj la kapron en la puton, por akompani Rinkitinkon. Sed ili tiris firme, konsciante pri tiu danĝero, kaj fine la Reĝo ekeliĝis el la truo kaj falis sternite sur la teron.

Dum iom da tempo li kuŝis anhelante kaj spiregante por reakiri sian spiron, dum Ingo kaj Bilbilo estis simile lacigitaj pro sia longa peno tiri la ŝnuregon; tiel ke la trio ripozis senmove sur la herbo kaj rigardis silente unu la alian.

Fine Bilbilo diris al la Reĝo:

"Vi surprizis min. Kial vi tiel malsaĝe falis en tiun puton? Ĉu vi ne scias ke tio estas danĝera ago? Vi povus rompi vian kolon per la falo, aŭ droni en la akvo."

"Bilbilo," respondis la Reĝo solene, "vi estas kapro. Ĉu vi imagas ke mi intence falis en tiun puton?"

"Mi imagas nenion," koleris Bilbilo. "Mi scias nur ke tie vi estis."

“Tie? He-he-hik-kik-ik! Tute vere tie mi estis,” ridis Rinkitinko. “Tie en senluma truo, kie ne estis lumo; tie en akvoplena puto, kie la malseko plenege malsekigis min—kik-ik-ik-ik!—plen-plenege!”

“Kiel okazis?” demandis Ingo.

“Mi fuĝadis de la malamikoj,” klarigis la Reĝo, “kaj mi senzorge rigardis trans mian ŝultron samtempe, por vidi ĉu ili ĉasas min. Do mi ne vidis la puton, sed paŝis en ĝin kaj trovis min falanta al la fundo. Mi batis la akvon tre nete kaj komencis barakti por deteni min de dronado, sed baldaŭ mi trovis ke kiam mi staras sur miaj piedoj sur la fundo de la puto, ke mia mentono estas tuj super la akvo. Do mi staris senmove kaj kriis ke oni helpu; sed neniu aŭdis min.”

“Se la batalistoj aŭdus vin,” diris Bilbilo, “ili eltirus vin kaj forportus vin por sklavigi vin. Vi devus labori por vivi, kaj tio estus por vi novaĵo.”

“Labori!” kriis Rinkitinko. “Mi labori? Hu, hu, hik-kik-ik! Absurde! Mi estas tro diketa—eĉ dika—eĉ dikega—mi apenaŭ povas marŝi, kaj mi ne povus perlabori mian salon. Do min ĝojigas ke la malamikoj ne trovis min, Bilbilo. Kiom da aliaj personoj eskapis?”

"Tion mi ne scias," respondis la knabo, "ĉar mi ankoraŭ ne havis sufiĉan tempon por viziti la aliajn partojn de la insulo. Kiam vi estos ripozinta kaj satiginta vian reĝan apetiton, estos eble plej bone ke ni ĉirkaŭrigardu kaj vidu kion lasis al ni la ŝtelemaj batalistoj de Regoso kaj Koregoso."

"Bonega ideo," deklaris Rinkitinko. "Mi estas iom febla pro mia longa enkarceriĝo en la puto, sed mi povos rajdi la dorson de Bilbilo kaj ni do plej bone tuj komencu."

Aŭdinte tion Bilbilo malafable rigardetis sian mastron sed diris nenion, ĉar ja estis la tasko de la kapro porti Reĝon Rinkitinkon kien ajn li deziras iri.

Ili unue traserĉis la ruinaĵojn de la palaco, kaj kie iam estis la kuirejo ili trovis malgrandan kvanton da manĝaĵoj kiujn duone kaŝis bloko da marmoro. Tion ili zorge metis en sakon por gardi ĝin por posta uzo, post kiam la malgranda dika Reĝo unue manĝis tiom da ĝi kiom li volis. Tio pasigis iom longan tempon, ĉar Rinkitinko estis ege malsata kaj amis manĝi nehaste. Fininte la manĝon li rajdsidis sur la dorson de Bilbilo kaj komencis esplori la insulon, dum Princo Ingo marŝis apud li.

Ili trovis ĉie ruinaĵojn kaj detruaĵojn. La domoj de la homoj estis senescepte priŝtelitaj kaj poste disbatitaj aŭ bruligitaj. Eĉ ne unu boato restis sur la bordo, nek estis unusola persono, viro aŭ virino aŭ infano, restanta sur la insulo, escepte de ili mem. La solaj loĝantoj de Pingario nun konsistis el dika malgranda Reĝo, knabo kaj kapro.

Eĉ Rinkitinko, malgraŭ sia gajkoreco, trovis malfacile ridi fronte al tiu ega katastrofo. Eĉ la kapro, kontraŭ sia kutimo, detenis sin de malagrablaj paroloj. Kaj rilate al la povra knabo kies hejmo nun estis dezerto, la larmoj ofte plenigis liajn okulojn dum li rimarkis la ruinitecon de sia kare amata insulo.

Kiam, je la noktiĝo, ili atingis la suban ekstremon de Pingario kaj trovis ĝin same vaka kiel la cetero, la malfeliĉo de Ingo estis preskaŭ pli granda ol li povis toleri. Ĉio estis forprenita forde li—gepatroj, hejmo kaj lando—en tiel malgranda tempopaso ke lia perplekso egalis lian malfeliĉon.

Ĉar neniu domo restis staranta, en kiu ili povos dormi, la tri vagantoj rampis sub la superpendantajn branĉojn de kasiarbo kaj laŭeble komfortigis sin. Tiel lacigitaj kaj elĉerpitaj estis ili de la maltrankvilo kaj



doloroj de la tago ke iliaj ĉagrenoj baldaŭ fadis en la nebulojn de dormolando. Besto kaj Reĝo kaj knabo kune dormis pace ĝis ilin vekis la kantado de la birdoj salutantaj la krespuskon de nova tago.



# La Tri Perloj



## ĈAPITRO 5

Post kiam Reĝo Rinkitinko kaj Princo Ingo banis sin en la maro kaj manĝis simplan matenmanĝon, ili komencis demandi al si kion ili povos fari por plibonigi sian staton.

“La povraj Gilgadanoj,” diris Rinkitinko gaje, “tre malverŝajne iam denove vidos sian Reĝon mem, ĉar miaj boato kaj remistoj estas for kun ĉio alia. Ni frontu la fakton ke ni estas enkarcerigitaj por la resto de nia vivo sur ĉi tiu insulo, kaj ke niaj vivoj estos

kurtaj krom se ni povos akiri pli da manĝaĵoj ol kiom estas en ĉi tiu malgranda sako.”

“Mi ne mortmalsatos, ĉar mi povas manĝi herbon,” komentis la kapro per plezuresprima tono—aŭ tono tiel plezuresprima kiom Bilbilo povis fari.

“Vere, tute vere,” diris la Reĝo. Poste li aspektis pensema dum momento kaj turninte sin al Ingo li demandis: “Ĉu vi opinias, Princo, ke se nepre necese, ni povos manĝi Bilbilon?”

La kapro ĝemis kaj riproĉe rigardis sian mastron dum li diris:

“Monstro! Ĉu vi, vere, manĝus vian malnovan amikon kaj serviston?”

“Ne se mi povus eviti tion, Bilbilo,” respondis la Reĝo afable. “Vi estus rimarkinde malmola manĝaĵo, kaj miaj dentoj ne estas tiel fortikaj kiel antaŭe.”

Dum tiu konversacio okazis Ingo subite memoris la tri perlojn kiujn lia patro iam kaŝis sub la kahelitan plankon de la bankedhalo. Sendube Reĝo Kitikuto estis tiel subite surprizita de la invadantoj ke li trovis nenian oportunon preni la perlojn, ĉar alie la ferocaj batalistoj estus venkitaj kaj forpelitaj el Pingario. Do ili sendube plu estas en sia kaŝloko, kaj Ingo kredis ke ili montriĝos granda helpo por li kaj liaj

kamaradoj dum ĉi tiu horo de bezono. Sed la palaco estis amaso da ruinoj; eble li nun ne povos trovi la lokon kie la perloj estis kaŝitaj.

Li diris nenion pri tio al Rinkitinko, memorante ke lia patro ordonis ke li gardu la sekreton de la perloj kaj iliaj magiaj fortoj. Malgraŭe, la penso ke li povos akiri la mirindajn trezorojn de siaj prapatroj donis al la knabo novan esperon.

Li stariĝis kaj diris al la Reĝo:

"Ni reiru al la alia ekstremo de Pingario. Estas pli plaĉe ol ĉi tie malgraŭ la pereo de la palaco de mia patro. Kaj tie, se ie ajn, ni povos trovi metodon eliri niajn problemojn."

Tiu propono akiris aprobon fare de Rinkitinko kaj la grupeto tuj komencis sian reiron. Ĉar ne estis bezono halti survoje, ili atingis la grandan ekstremon de la insulo ĉirkaŭ la tagmezo kaj tuj komencis traserĉi la ruinojn de la palaco.

Ili trovis, kontentige al si, ke unu ĉambro ĉe la malsupro de turo estis ankoraŭ loĝebla, kvankam la tegmento estis rompita kaj la loko estis iomete kovrita de ŝtonoj. La Reĝo estis, laŭ sia diro, tro dika por forte labori, do li sidiĝis sur blokon de marmoro kaj rigardis dum Ingo purigis la ĉambron de ĝia rubo.

Farinte tion, la knabo traserĉis la ruinojn ĝis li trovis tabureton kaj fotelon kiuj ne estis rompitaj ĝis neuzebleco. Iom da litkovraĵoj kaj matraso ankaŭ troviĝis, do je la noktiĝo la ĉambreto jam estis tre komforta.

La sekvan matenon, dum Rinkitinko ankoraŭ profunde dormis kaj Bilbilo okupadis sin per manĝado de la roskovrita herbo kiu kreskis laŭ la bordo, Princo Ingo komencis traserĉi la falintajn amasojn da marmoro por trovi la lokon kie antaŭe estis la reĝa bankedhalo. Grimpinte trans la ruinojn dum kelka tempo li atingis platan lokon kiun li rekonis, per la kahela planko kaj la rompitaj mebloj dismetitaj, kiel la grandan halon kiun li serĉas. Sed en la centro de la planko, rekte super la punkto kie kaŝiĝis la perloj, kuŝis pluraj grandaj kaj pezaj marmoraj blokoj, kiuj estis ŝiritaj el la diserigitaj muroj.

Tiu misfortuna trovo dum kelka tempo senkuraĝigis la knabon, kiu komprenis kiom senhelpa li estas por forigi tiel vastajn obstaklojn; sed estis tiel grave akiri la perlojn ke li ne kuraĝis cedi al senesperiĝo antaŭ ol ĉia homa peno estos farita, do li sidigis sin por pripensi la aferon tre zorge.

# Ĉapitro Kvin

Intertempe Rinkitinko ellitiĝis kaj marŝis sur la gazonon, kie li trovis Bilbilon kuŝanta kontente sur la herbo.

"Kie estas Ingo?" demandis Rinkitinko, frotante siajn okulojn per siaj fingrartikoj ĉar ilia vido estis malklarigita de tro da dormo.

"Ne demandu min," diris la kapro, maĉante tre kontente remaĉaĵon el dolĉaj herboj.

"Bilbilo," diris la Reĝo, kaŭrante apud la kapro kaj apogante sian dikan mentonon per siaj manoj kaj siajn kubutojn per siaj genuoj, "permesu ke mi konfidu al vi la fakton ke mi estas tedita kaj bezonas distron. Mia bona amiko Kitikuto estas forŝtelita de la barbaroj kaj prenita forde mi, do estas neniu kiu povas inteligente konversaciadi kun mi. Mi estas la Reĝo kaj vi estas la kapro. Bonvolu rakonti al mi."

"Ne," diris Bilbilo, sulkante la frunton, ĉar la vizaĝo de kapro estas tre esprimkapabla.

"Se vi rifuzos, mi estos eĉ pli malfeliĉa, kaj mi scias ke via humoro estas tro dolĉa por permesi tion. Rakontu al mi, Bilbilo."

La kapro rigardis lin kun malestima esprimo. Diris li:

"Oni supozus ke vi estas nur kvarjaraĝa, Rinkitinko! Sed jen—mi obeos vian ordonon. Aŭskultu

atente, kaj la rakonto eblos helpos vin—kvankam mi dubas ke vi komprenos ĝian signifon.”

“Mi estas certa ke la rakonto helpos min,” deklaris la Reĝo, kies okuloj scintiladis.

“Foje,” komencis la kapro.

“Kiam, Bilbilo?” demandis la Reĝo leĝere.

“Ne interrompu; estas malĝentile. Foje estis Reĝo kun kavo en sia kapo, kie kutime oni havas cerbon, kaj—”

“Ĉu la rakonto estas vera, Bilbilo?”

“Kaj la Reĝo kun kava kapo povis babiladi vortojn, kiuj ne havis sencon, kaj ridi sencerbe pro sensencaĵoj. Tiu parto de la rakonto estas sufiĉe vera, Rinkitinko.”

“Do daŭrigu la rakonton, dolĉa Bilbilo. Tamen estas malfacile kredi ke Reĝo povus esti sencerba—krom se, kompreneble, li pruvus tion per la fakto ke li posedas parolantan kapron.”

Bilbilo gapis lin kolere dum plena minuto, silente. Post tio li daŭrigis sian rakonton:

“Tiu vakkapa viro estis akcidente Reĝo, ĉar li naskiĝis reĝa. Ankaŭ la reĝo estis vakkapa pro la sama akcidento, ĉar li naskiĝis sencerba.”

“Povrulo!” komentis la Reĝo. “Ĉu li posedis parolantan kapron?”

# Ĉapitro Kvin

"Jes ja," respondis Bilbilo.

"Do li eraris, efektive, pro sia naskiĝo mem. Ĉik-ik-ik-ik, u, hu!" ridis Rinkitinko, dum lia dika korpo skuiĝis pro amuziĝo. "Sed estas malfacile deteni sin de naskiĝo; ne eblas protesti, ĉu ne, Bilbilo?"

"Kiu do rakontas, mi volas scii," tre kolere diris la kapro.

"Demandu al cerbohavulo, mia knabo; certe mi mem ne povas respondi," respondis la Reĝo, ekridegante gaje denove.

Bilbilo surhufiĝis kaj formarŝis digne, lasante Rinkitinkon denove ridadi pro la amara mieno de la vizaĝo de la besto.

"Ho, Bilbilo, vi kaŭzos mian morton iutage—nepre vi kaŭzos!" anhelegis la Reĝo, elprenante sian puntan poŝtukon por viŝi siajn okulojn; ĉar, kiel ofte, li ridis ĝis fluis larmoj.

Bilbilo estis profunde ĉagrenita kaj rifuzis eĉ turni sian kapon por rigardi sian mastron. Por eskapi de Rinkitinko li vagis inter la ruinoj de la palaco, kie li trovis Princon Ingon.

"Bonan matenon, Bilbilo," diris la knabo. "Mi planis trovi vin, por konsulti vin pri grava afero. Se vi bonvolos reiri kun mi mi certas ke via bona

juĝkapablo estos granda helpo."

La koleran kapron tre trankviligis la respektoplena tono per kiu la knabo parolis al li, sed li tuj demandis:

"Ĉu vi ankaŭ konsultos tiun vakkapan Reĝon tie?"

"Mi bedaŭras aŭdi vin paroli pri via afabla mastro tiel," diris la knabo serioze. "Ĉiuj homoj meritas respekton, ĉar ili estas la plej altaspecaj vivantoj, kaj Reĝoj meritas pli da respekto ol aliaj, ĉar ili estas postenigitaj regi multajn homojn."

"Tamen," diris Bilbilo plene konvinkite, "la kapo de Rinkitinko estas certe sencerba."

"Tion mi malvolonte kredus," insistis Ingo. "Sed ĉiuokaze lia koro estas afabla kaj milda kaj tio estas pli bona ol saĝeco. Li estas gaja malgraŭ misfortunoj kiuj plorigus aliulojn kaj li neniam diras malafablajn vortojn kiuj vundas la sentojn de liaj amikoj."

"Tamen," grumblis Bilbilo, "li estas—"

"Ni forgesu ĉion escepte de lia bona naturo, kiu metas novan koron en nin kiam ni malfeliĉas," konsilis la knabo.

"Sed li estas—"

"Bonvolu veni kun mi," interrompis Ingo, "ĉar la afero pri kiu mi volas paroli estas tre grava."

Bilbilo sekvis lin, kvankam la knabo ankoraŭ aŭdis

la kapron murmuradi ke la Reĝo ne havas cerbon. Rinkitinko, vidante ilin eniri la ruinojn, ankaŭ sekvis, kaj atinginte ilin petis sian matenmanĝon.

Ingo malfermis la sakon da manĝaĵoj kaj dum li kaj la Reĝo manĝis la knabo diris:

"Se mi povus trovi metodon forpreni kelkajn el la blokoj de marmoro kiuj falis en la bankedhalon, mi kredas ke mi povus trovi rimedon per kiu ni povus eskapi de ĉi tiu senhava insulo."

"Do," murmuris Rinkitinko, per buŝo plena, "ni movu la blokojn de marmoro."

"Sed kiel?" demandis Princo Ingo. "Ili estas pezegaj."

"Ha, jes, kiel?" respondis la Reĝo, ŝmacante kontente per siaj lipoj. "Jen serioza demando. Sed—mi scias! Ni vidu kion diras pri tio mia fama pergameno." Li viŝis siajn fingrojn per tuko kaj poste, preninte la rulaĵon el poŝo interne de sia brodita bluzo, li malrulis ĝin kaj laŭtlegis la ĉisekvantajn vortojn: "'Neniam tretu sur la piedfingrojn de alia persono.'"

La kapro elspiris brue kaj malestime tra sia nazo; Ingo silentis; la Reĝo rigardis de unu al la alia demandeme.

"Jen precize la solvo!" deklaris Rinkitinko.

"Tute certe," diris Bilbilo malestime, "ĝi informas nin precize kiel movi la blokojn de marmoro."

"Ho, ĉu?" respondis la Reĝo, kaj post tio dum momento li frotis la supron de sia kalva kapo perplekse. La sekvan momenton li ekridis gajege. La kapro rigardis Ingon kaj ĝemis.

"Kion mi diris al vi?" demandis la besto. "Ĉu mi pravis aŭ malpravis?"

"Ĉi tiu rulaĵo," diris Rinkitinko, "vere estas majstroverko. Ĝia konsilo ege valoras. 'Neniam tretu sur la piedfingrojn de alia persono.' Ni pripensu tion. La konkludo estas ke ni tretu sur niaj propraj piedfingroj, kiuj doniĝis al ni tiucele. Tial, se mi paŝus sur la piedfingrojn de alia persono, mi estus la alia persono. Hu, hu, hu!—la alia persono—hi, hi, hik-kik-ik! Amuze, ĉu ne?"

"Ĉu mi ne diris—" komencis Bilbilo.

"Ne gravas kion vi diris, mia knabo," muĝis la Reĝo. "Neniu stultulo povus solvi tion tiel bele kiel mi mem."

"Ni ankoraŭ devas decidi kiel forpreni la blokojn de marmoro," sugestis Ingo maltrankvile.

"Ligu ŝnuregon al ili kaj tiru," diris Bilbilo. "Ne

plu atentu Rinkitinkon, ĉar li ne estas pli saĝa ol la persono kiu verkis tiun sencerban rulaĵon. Nur alportu ŝnuregon, kaj ni ligos Rinkitinkon al unu ĝia finaĵo kiel pezaĵon kaj mi helpos vin tiri."

"Dankon, Bilbilo," respondis la knabo. "Mi alportos ŝnuregon tuj."

Bilbilo trovis ke estas malfacile rampi trans la ruinojn al la planko de la bankedhalo, sed malmultajn lokojn kapro ne povas atingi kiam ĝi penas, do Bilbilo fine sukcesis, kaj eĉ dika malgranda Rinkitinko fine partoprenis kun ili, kvankam multe senspire.


Ingo ligis unu finaĵon de la ŝnurego ĉirkaŭ blokon de marmoro kaj poste faris maŝon alifinaĵe por ĉirkaŭiri la kapon de Bilbilo. Kiam ĉio estis preta la knabo prenis la ŝnuregon kaj helpis la kapron tiri; tamen, malgraŭ sia penado, la giganta bloko ne moviĝis el sia loko. Vidante tion, Reĝo Rinkitinko antaŭeniris kaj komencis helpi, kaj la pezo de lia korpo devigis la pezan marmoron gliti unu-du metrojn for de sia kuŝejo.

Sed la laboro estis malfacila kaj ili ĉiuj devis longe ripozi antaŭ ol entrepreni movi la sekvan blokon.

"Agnosku, Bilbilo," diris la Reĝo, "ke mi iom utilas en la mondo."

"Via pezo multe helpis," agnoskis la kapro, "sed se via kapo estus tiel plena kiel via stomako la tasko estus eĉ pli facila."


Kiam Ingo preparis ligi la ŝnuregon duafoje li ĝoje trovis ke se ili movos unu plian blokon de marmoro



li povos malkovri la kahelon kun la sekreta risorto. Do la trio tiris per nova energio kaj ĝojige la bloko moviĝis kaj ruliĝis sur sian flankon, lasante Ingan libera depreni la trezoron laŭplaĉe.

# Ĉapitro Kvin

Sed la knabo tute ne intencis lasi Bilbilon kaj la Reĝon partopreni en la sekreto de la reĝaj trezoroj de Pingario; do, kvankam kaj la kapro kaj ĝia mastro postulis scii kial ili devis movi la marmorajn blokojn kaj kiel tio helpos, Ingo petis ilin atendi ĝis la sekva



mateno, kiam li esperis kontentigi ilin ke ilia laborego ne estis vana.

Malmulte fidante tiun promeson de nura knabo, la kapro grumblis kaj la Reĝo ridis; sed Ingo ne atentis iliajn mokojn kaj ekkomencis labori preparante

fiŝkaptan stangon, kun ŝnuro kaj hoko. Dum la posttagmezo li vadis al kelkaj rokoj proksimaj al la bordo kaj atendis pacience ĝis kapti sufiĉajn perkojn por iliaj vesper- kaj maten-manĝoj.

"Ha," diris Rinkitinko, rigardante la belan kaptaĵon kiam Ingo revenis al la bordo; "ili bonege gustos kuirite; sed ĉu vi scipovas kuiri ilin?"

"Ne," estis la respondo. "Mi ofte kaptis fiŝojn sed neniam kuiris ilin. Eble Via Moŝto komprenas la kuirarton."

"Kuiro kaj moŝteco estas du apartaj aferoj," ridis la malgranda Reĝo. "Mi ne povus kuiri fiŝon eĉ se tio savus min de morto pro malsato."

"Rilate al mi," diris Bilbilo, "mi neniam manĝas fiŝojn, sed mi povas informi kiel kuiri ilin, ĉar mi ofte rigardis dum la kuiristoj en la palaco laboris." Do, per la helpo de la kapro, la knabo kaj la Reĝo sukcesis prepari kaj kuiri la fiŝojn, kaj post tio manĝis ilin bonapetite.

Tiun nokton, kiam Rinkitinko kaj Bilbilo ambaŭ profunde dormis, Ingo kaŝe marŝis senbrue tra la lunlumo al la senpersona bankedhalo. Tie, surgenuiĝinte, li tuŝis la sekretan risorton kiel instruis al li lia patro kaj ĝojige al li la kahelo subiris kaj malkaŝis

la aperturon. Imagu kiel la koro de la knabo bategis pro ekscitiĝo dum li malrapide puŝis sian manon en la kavaĵon kaj ĉirkaŭpalpis por trovi ĉu la valoregaj perloj ankoraŭ restas tie. Post momento liaj fingroj tuŝis la silkan sakon kaj, sen paŭzi por fermi la niĉon, li premis la trezoron kontraŭ sian bruston kaj kuris en la lunlumon por ekzameni ĝin. Atinginte lumoplenan lokon li komencis malfermi la sakon, sed li rimarkis Bilbilon kuŝantan sur la apuda herbo. Do, tremante pro timo vidiĝi, li kuris al alia loko, kaj kiam li paŭzis li aŭdis Rinkitinkon ronkadi vigle. Denove li fuĝis kaj sekvis vojeton al la marbordo, kie li kaŭris sub dekliveto kaj komencis malfermi la ŝnurojn kiuj ligis la buŝon de la sako. Sed nun nova timo atakis lin.

"Se la perloj glitus de mia mano," li pensis, "kaj ruliĝus en la akvon, mi eble perdus ilin por ĉiam. Mi nepru trovu pli sendanĝeran lokon."

Tien kaj tien li vagis, ankoraŭ firme tenante la silkan sakon per ambaŭ manoj, kaj fine li iris al la arbareto kaj grimpis en la altan arbon kie li estis farinta siajn platformon kaj sidejon. Sed tie estis plene mallume, do li trovis ke necesos sidi pacience ĝis la mateno antaŭ ol li kuraĝos tuŝi la perlojn. Dum tiuj

horoj da atendado li havis tempon por pripensado kaj li riproĉis sin pro sia multa timo posedi la trezorojn de sia patro.

"Tiuj perloj apartenas al nia familio jam de generacioj," li pensis, "tamen ankoraŭ neniu perdis ilin. Se mi simple atente zorgos mi certe ne bezonos timi pri ilia sekureco."

Kiam tagiĝis kaj li povis klare vidi, Ingo malfermis la sakon kaj elprenis la Bluan Perlon. Ne eblis ke aliaj vidos lin, do li uzis iom da tempo ekzamenante ĝin mire, dirante al si: "Ĉi tiu donos al mi forton."

Depreninte sian dekstran ŝuon li metis la Bluan Perlon en ĝin, kaj puŝis ĝin en la pintan piedfingrejon. Post tio li ŝiris pecon de sia poŝtuko kaj puŝis ĝin en la ŝuon por teni la perlon en tiu loko. La ŝuoj de Ingo estis longaj kaj pintaj, samkiel ĉiuj ŝuoj uzataj en Pingario, kaj la pintoj kurbiĝis supren, tiel ke estis granda vaka spaco preter la loko kiun atingis la piedfingroj de la knabo kiam la ŝuo estis sur lia piedo.

Surmetinte la ŝuon kaj liginte la laĉojn li malfermis la sakon kaj elprenis la Palruĝan Perlon. "Ĉi tiu protektos min kontraŭ danĝero," diris Ingo, kaj depreninte la ŝuon de sia maldekstra piedo li zorge



metis la perlon en la vakan piedfingrejon. Tiun ankaŭ li sekurigis en tiu loko per strio ŝirita el la poŝtuko.

Surmetinte la duan ŝuon kaj laĉinte ĝin, la knabo tiris el la silka sako la trian perlon—tiun kiu estis purblanka—kaj tenante ĝin apud sia orelo li demandis:

"Ĉu vi bonvolos konsili al mi kion fari, dum ĉi tiu mia horo de misfortuno?"

Klare la voĉeto de la perlo respondis:

"Mi konsilas ke vi iru al la Insuloj Regoso kaj Koregoso, kie vi povos liberigi viajn sklavigitajn gepatrojn."

"Kiel mi povus fari tion?" kriis Princo Ingo, kiun mirigis aŭdi tian konsilon.

"Hodiaŭ nokte," parolis la voĉo de la perlo, "estos ŝtormo, kaj en la mateno boato drivos sur la bordon. Prenu tiun boaton kaj remu al Regoso kaj Koregoso."

"Kiel mi, febla knabo, tiros la boaton tiel distancen?" li demandis, dubante la eblecon.

"La Blua Perlo donos al vi forton," estis la respondo.

"Sed eble mia boato rompiĝos kaj mi dronos antaŭ ol atingi Regoson kaj Koregoson," protestis la knabo.

"La Palruĝa Perlo protektos vin kontraŭ damaĝo,"

murmuris la voĉo, softa kaj nelaŭta sed tute klara.

"Do mi agos laŭ via konsilo," deklaris Ingo, parolante firme ĉar tiu promeso donis al li kuraĝon, kaj dum li forprenis la perlon de sia orelo ĝi flustris:

"Kiu estas saĝa kaj sentima, tiu nepre sukcesos."

Remetinte la Blankan Perlon en la fundon de la silka sako, Ingo ligis ĝin sekure ĉirkaŭ sian kolon kaj butonumis sian talion super ĝi por kaŝi la trezoron de ĉiuj rigardantaj okuloj. Post tio li nerapide grimpis de la arbo kaj reiris al la ĉambro kie ankoraŭ dormas Reĝo Rinkitinko.

La kapro manĝetadis sur la herbo sed aspektis malafabla kaj kolerema. Kiam la knabo diris bonan matenon, dum li pasis, Bilbilo faris tute nenian respondon. Dum Ingo eniris la ĉambron la Reĝo vekiĝis kaj demandis:

"Kio estas tiu mistera sekreto via? Mi sonĝadis pri ĝi, kaj mi ankoraŭ ne reakiris mian spiradon post la tiregado al tiuj pezaj blokoj. Diru al mi la sekreton."

"Sekreto konigita ne plu estas sekreto," respondis Ingo, ridante. "Krome, temas pri familia sekreto, kiun decas ke mi gardu al mi mem. Sed mi povas diri al vi almenaŭ unu aferon: Ni foriros de la insulo morgaŭ matene."

La Reĝo aspektis perpleksa pro tiu deklaro.

"Mi ne estas kapabla naĝanto," diris li, "kaj, kvankam mi estas sufiĉe dika por flosi sur la surfaco de la akvo, mi nur balanciĝus kaj tute nenien atingus."

"Ni ne naĝos, sed rajdos komforte en boato," promesis Ingo.

"Ne estas boato sur ĉi tiu insulo!" deklaris Rinkitinko, rigardante la knabon miroplene.

"Vere," diris Ingo. "Sed boato venos al ni matene." Li parolis certecoplene, ĉar li plene fidis la promeson de la Blanka Perlo; sed Rinkitinko, kiu sciis nenion pri la tri eksterordinaraj juveloj, komencis timi ke la malgranda Princo freneziĝis pro malfeliĉo kaj misfortuno.

Pro tio la Reĝo ne plu demandis al la knabo sed provis gajigi lin rakontante al li spritaĵojn. Li mem ridis pro ĉiuj rakontetoj, laŭ sia gaja maniero, kaj Ingo partoprenis libere en la ridado ĉar lian koron senpezigis la espero savi siajn karajn gepatrojn. Ne post la atako al Pingario fare de la ferocaj batalistoj la knabo estis tiel esperoplena kaj feliĉa.

Dum Rinkitinko rajdis sur la dorso de Bilbilo, la trio trairis la insulon kaj trovis en la centra parto kelkajn arbustojn kaj arbojn sur kiuj estis maturaj

fruktoj. Ili kolektis ilin libere, ĉar—escepte de la fiŝoj kaptitaj de Ingo—ili estis ilia sola manĝaĵo, kaj ju malpli ili havis, des pli ŝajnis grandiĝi la apetito de Rinktinko.

"Mi neniam estas pli feliĉa," diris li ĝemante, "ol kiam mi manĝas."

Ĉirkaŭ la vesperiĝo la ĉielo nubiĝis kaj baldaŭ granda ŝtormo ekfuriozis. Princo Ingo kaj Reĝo Rinkitinko rifuĝis en la protektanta ĉambro kiun ili pretigis kaj tie Bilbilo ankaŭ kunestis. La kapron kaj la Reĝon iom ĝenis la violenteco de la ŝtormo, sed Ingon ĝi ne ĝenis, ĉar lin plaĉis tiu pruvo ke la Blanka Perlo estas fidinda.

Dum la tuta nokto la vento kriegis ĉirkaŭ la insulo; tondro ruliĝis, fulmo ekbrilis kaj pluvo torente falis. Sed jam je la mateniĝo la ŝtormo ĉesis kaj kiam la suno leviĝis neniu spuro de la tempesto restis escepte de kelkaj falintaj arboj.



# La Magia Boato



ĈAPITRO 6

Princo Ingo ellitiĝis kun la suno kaj, akompanate de Bilbilo, li komencis marŝadi laŭ la bordo serĉe al la boato kiun la Blanka Perlo promesis al li. Eĉ ne dum momento li dubis ke li trovos ĝin kaj antaŭ ol li longe marŝis lia okulo ekvidis nigran objekton ĉe la akvorando.

"Jen la boato, Bilbilo!" li kriis ĝoje, kaj kurinte al ĝi li trovis ke efektive ĝi ja estas granda spacoplena boato. Kvankam drivinte sur la plaĝon, ĝi estis perfekte bonstata kaj neniel suferis pro la ŝtormo.

# Ĉapitro Ses

Ingo staris dum kelkaj momentoj gapante la belan veturilon kaj demandante al si el kie ĝi povus esti veninta. Certe ĝi estis malsimila al ĉiu boato kiun ĝis tiam li vidis. Ekstere ĝi estis pentrita brile nigra, tute sen alia koloraĵo; sed la tuta interno de la boato estis tegita per pura arĝento, polurita tiel forte ke la surfaco similis spegulon kaj brilegis pro la sunradioj. La ŝegoj havis sur si blankajn kusenojn kaj la kusenoj estis belege broditaj per oraj fadenoj. Ĉe unu ekstremo, sub la larĝa benko, estis malgranda barelo kun arĝentaj ringoj, kiun la knabo trovis plena de freŝa dolĉa akvo. Granda kesto el sandalligno, ligita kaj ornamita per arĝento, staris en la alia ekstremo de la boato. Ingo levis la kovrilon kaj trovis la keston plena de marbiskvitoj, kukoj, viando en ladskatoletoj, kaj maturaj sukoplenaj melonoj; sufiĉaj bonsanigaj manĝaĵoj por nutri la grupon dum longa tempo.

Kuŝante sur la fundo de la boato estis du brilantaj remiloj, kaj supre, sed nun retrorulita, estis baldakeno el arĝenta ŝtofo por deteni la varmegon de la suno.

Ne mirigas ke la knabo ĝojegis pro la alveno de tiu bela boato; sed pripensinte li timis ke ĝi estos tro granda por ke li povu remi ĝin longan distancon.

Krom se, vere, la Blua Perlo donos al li nekutiman forton.

Dum li konsideris tiun aferon, Reĝo Rinkitinko venis anaspaŝante al li kaj diris:

"Nu, nu, nu, mia Princo, viaj vortoj plenumiĝis! Jen la boato, tute certe, sed kiel ĝi venis ĉi tien—kaj kiel vi sciis ke ĝi venos al ni—estas enigmo kiun mi ne povas solvi. Mi ne dubas nian bonfortunon, tamen, kaj mia koro bobeladas pro ĝojo, ĉar en ĉi tiu boato mi reiros tuj al mia Urbo Gilgado, de kiu mi restas jam multe tro longe for."

"Mi ne deziras iri al Gilgado," diris Ingo.

"Domaĝe, mia amiko, ĉar vi estus tre bonvena. Sed vi povos resti sur ĉi tiu insulo, se vi deziras," pludiris Rinkitinko, "kaj reirinte hejmen mi sendos kelkajn miajn regatojn savi vin."

"La boato estas mia, Via Moŝto," diris Ingo trankvile.

"Eble, eble," estis la senzorga respondo, "sed mi estas la Reĝo de grava lando, kaj vi estas knaba Princo sen menciinda regno. Sekve, ĉar mi estas pli grava ol vi, estas juste kaj dece ke mi prenos vian boaton kaj reiros per ĝi al mia propra lando."

"Mi bedaŭras malsamopinii ol Via Moŝto," diris

Ingo, "sed anstataŭ iri al Gilgado mi opinias ke pli gravas ke ni iru al la insuloj Regoso kaj Koregoso."

"He? Kio?" kriis la mirigita Reĝo. "Al Regoso kaj Koregoso! Por fariĝi sklavoj de la barbaroj, same kiel la Reĝo via patro? Ne, ne, mia knabo! Via Onĉjo Rinki eble havas vakan pensilon, kiel pretendas Bilbilo, sed li estas multe tro saĝa por meti sian kapon en buŝon de leono. Ne amuzas esti sklavo."

"La popolo de Regoso kaj Koregoso ne sklavigos nin," deklaris Ingo. "Male, mia intenco estas liberigi miajn karajn gepatrojn, ankaŭ mian tutan popolon, kaj revenigi ilin al Pingario."

"Ĉik-ik-ik-ik-ik! Tre komike!" ridis Rinkitinko, palpebrumante al la kapro, kiu sulkis la frunton responde. "Via aŭdaco senspirigas min, Ingo, sed la aventuro estas tamen ĉarma, mi devas agnoski. Se mi ne estus tiel dika, mi tuj konsentus al via plano, kaj verŝajne povus konkeri tiun amason da ferocaj batalistoj tute sen helpo—tute sen—ĉu ne, Bilbilo? Sed malfeliĉigas min diri ke mi ja estas dika, kaj ne vere batalpreta. Kaj rilate al via intenco fari kion, laŭ mia agnosko, mi mem ne povas fari, Ingo, nu mi timas ke vi forgesas ke vi estas nur knabo, efektive iom malgranda knabo."

"Ne, mi ne forgesas tion," estis la respondo de Ingo.

"Do bonvolu pripensi ke vi kaj mi kaj Bilbilo estas ne sufiĉe fortaj, kiel armeo, por konkeri potencan nacion de spertaj militistoj. Ni povus provi, kompreneble, sed vi estas tro juna por morto, kaj mi estas tro maljuna. Venu kun mi al mia Urbo Gilgad, kie vi estos multe honoratos. Mi derigos ke miaj profesoroj instruu al vi bonan konduton. Nu kion vi diras?"

Ingo iom perpleksis pri kiel respondi al tiuj argumentoj, ĉar li sciis ke Reĝo Rinkitinko kredas ilin saĝaj; do, post iom da pensado, li diris:

"Mi faros interkonsenton kun Via Moŝto, ĉar mi ne deziras ke manku en mi respekto pri tiel inda persono kaj grava Reĝo kiel vi. Ĉi tiu boato estas mia, kiel mi diris, kaj dum la foresto de mia patro vi fariĝis mia gasto; tial mi pretendas ke mi meritas iom da konsidero, same kial vi."

"Tute sendube," akordis Rinkitinko. "Kiun interakordon vi proponas, Ingo?"

"Ni ambaŭ eniru la boaton, kaj vi unue provos remi nin al Gilgado. Se vi sukcesos, mi volonte akompanos vin; sed se vi malsukcesos, mi remos la boaton al Regoso, kaj vi devos veni kun mi sen plia protesto."

# Ĉapitro Ses

"Justa kaj inda interkonsento!" kriis la Reĝo, multe plaĉite. "Tamen, kvankam mi estas heroeca persono, mi ne antaŭvidas ĝui remi tiel grandan boaton la tutan vojon al Gilgado. Sed mi faros mian plejeblon kaj akceptos la rezulton."

Tiel pace decidinte la aferon, ili preparis enboatiĝi. Plia provizo da fruktoj estis metita en la boaton kaj Ingo ankaŭ rastis kvanton da bongustegaj ostroj kiaj abundas sur la bordo de Pingario sed kiujn li ĝis nun ne povis atingi pro manko de boato. Tion li faris laŭ sugesto de la ĉiam malsata Rinkitinko, kaj kiam la ŝelhavaj ostroj estis jam metitaj malantaŭ la akvobarelon kaj abunda kvanto da herbo estis enboatigita por Bilbilo, ili decidis ke ili pretas komenci sian vojaĝon.

Montriĝis tute ne facila tasko enboatigi Bilbilon, ĉar li estis rimarkinde mallerta kapro kaj unufoje, kiam Rinkitinko puŝis lin, li falis en la akvon kaj preskaŭ dronis antaŭ ol ili povis elakvigi lin. Sed tute ne trafis ilin la penso postlasi la kuriozan beston. Lia parolkapablo preskaŭ homigis lin laŭ la vidpunkto de la knabo, kaj la dika Reĝo tiom kutimis al sia malafabla kompano ke nenio instigus lin apartiĝi de li. Fine Bilbilo falis sternite en la fundon de la boato, kaj Ingo helpis lin moviĝi al la antaŭa parto, kie estis

suficâ spaco por ke li kuŝu tie.

Rinkitinko nun prenis lokon en la arĝente tegita veturilo kaj la knabo venis la lasta, forpuŝante la boaton dum li enboaten saltis, tiel ke ĝi flosis libere sur la akvo.

"Nu, nun ni iras al Gilgado!" kriis la Reĝo, prenante la remilojn kaj metante ilin en la ingojn. Post tio li komencis remi laŭeble plej forte, samtempe kantante kuriozan kanton kies vortoj diris:

"Voj' al Gilgad', bela pad'
Por dika Reĝo kaj knabo brava,
Por kolera kapro—malseka apro—
Kaj arĝenta ŝip' kun ligna rip'.
Kun koro gaja, animo rava
Ni rapidas al bela Gilgad'!"

"Ne, Rinkitinko; bonvolu, ne! Tio marmalsanigas min," grumblis Bilbilo.

Rinkitinko ĉesis remi, ĉar jam li estis senspira kaj lia ronda vizaĝo estis kovrita de grandaj gutoj da ŝvito. Kaj kiam li rigardis trans sian ŝultron li trovis ĉagrenate ke la boato apenaŭ estas movinta sin eĉ tridek centimetrojn for de sia antaŭa pozicio.

Ingo diris nenion kaj ŝajnigis ne rimarki la mal-

sukceson de la Reĝo. Do nun Rinkitinko, kun aspekto de seriozeco sur sia dika ruĝa vizaĝo, deprenis sian purpuran robon kaj suprenrulis la manikojn de sia tuniko kaj denove provis.

Tamen li ne sukcesis pli ol antaŭe kaj aŭdinte Bilbilon fari raŭkan ridon kaj vidinte rideton sur la vizaĝo de la knaba Princo, Rinkitinko subite faligis la remilojn kaj komencis krii ride pro sia propra malsukceso. Viŝante sian brovon per flava silka poŝtuko li kantis gajvoĉe:

"Velista bravo, kapa kavo—
La boaton mi ne povas remi.
Do mi agnoskas: prave mokas
Min la senutila kapro."

"Bonvolu ellasi min el viaj versoj," diris Bilbilo spiregante pro kolero.

"Kiam mi ridindigas min, Bilbilo, mi fariĝas kapro," respondis Rinkitinko.


"Neniel," insistis Bilbilo. "Nenio povus fari el vi anon de mia supera raso."

"Supera? Nu, Bilbilo, kapro estas nur besto, sed mi estas Reĝo!"

"Mi pretendas ke supera estas inteligento," diris la kapro.

Rinkitinko tute ne atentis tiun komenton, sed turninte sin al Ingo li diris:

"Plejbone ni reiru al la bordo, ĉar la boato estas




tro peza por esti remita al Gilgado aŭ iu alia loko. Efektive, estos malfacile por ni reatingi la teron."

"Mi prenu la remilojn," sugestis Ingo. "Ne forgesu nian interakordon."

"Tute ne," respondis Rinkitinko. "Se vi povos remi

nin al Regoso, aŭ al iu alia loko, mi senproteste iros kun vi."

Do la Reĝo prenis la lokon de Ingo en la malantaŭo de la boato kaj la knabo prenis la remilojn kaj komencis remi. Kaj nun, mirigante Rinkitinkon—kaj



eĉ Ingon—la remiloj fariĝis senpezaj kiel plumoj tuj kiam la Princo ekprenis ilin. Tujtuje la boato komencis glisadi rapide tra la akvo kaj, vidante tion, la knabo turnis la pruon cele la nordon. Li ne sciis precize kie situas Regoso kaj Koregoso, sed li ja sciis ke la insuloj

situas norde de Pingario, do li decidis fidi ke la bonŝanco kaj la gvido fare de la perloj portos ilin tien.

Iom post iom la Insulo Pingario fariĝis malgranda en ilia vidpovo dum la boato rapidis antaŭen, ĝis je la fino de horo ili tute ne plu povis vidi ĝin kaj ilin ĉirkaŭis la purpura akvo de la Nonesta Oceano.

Princo Ingo ne laciĝis pro la tasko remadi; efektive, tute ne ŝajnis al li esti laboro. Unufoje li ĉesis sufiĉe longe por meti la stangojn de la baldakeno en la truojn faritajn por ili, en la randojn de la boato, kaj por etendi la arĝentan baldakenon super la stangojn, ĉar Rinkitinko plendis pro la varmego de la suno. Sed la baldakeno detenis la varmegajn radiojn kaj kaŭzis ke la interno de la boato estu plaĉe frideta.

"Jen glora veturo!" kriis Rinkitinko, dum li kuŝiĝis en la ombro. "Mi trovas granda senŝarĝiĝo nian foreston de tiu morna insulo Pingario."

"Eble dum mallonga tempo estos senŝarĝiĝo," diris Bilbilo, "sed vi iras al la lando de viaj malamikoj, kiuj verŝajne pikos vian tutan dikan korpon per lancoj kaj sagoj."

"Ho, mi esperas ke ne!" kriis Ingo, kiun malfeliĉigis tiun penso.

"Ne gravas," diris la Reĝo trankvile, "oni povas

morti nur unufoje, memoru, kaj kiam la malamikoj mortigos min mi petos ankaŭ mortigi Bilbilon, tiel ke ni restos kunaj en la morto kiel en la vivo."

"Ili eble estos kanibaloj; tiuokaze, ili rostos kaj manĝos nin," sugestis Bilbilo, kiu volis timigi sian mastron.

"Kiu scias?" respondis Rinkitinko, timtreme. "Sed gajiĝu, Bilbilo; eble ili ja ne mortigos nin, eble eĉ ne kaptos nin; do ni ne anticipu niajn problemojn. Ne mienu tiel kolere, mia sprita kvarpiedulo, kaj mi kantos por distri vin."

"Via kanto eĉ pli profunde kolerigus min," grumblis la kapro.

"Tute neeble, kara Bilbilo. Vi ne povus esti pli malafabla eĉ se vi strebus. Do jen fama kanto por vi."

Dum la knabo plu remadis senpaŭze kaj la boato rapidis trans la akvon, la gaja Reĝo, kiu neniam povis esti malgaja aŭ serioza dum multaj sinsekvaj minutoj, malantaŭen klinis sin sur siajn broditajn kusenojn kaj kantis tion:

"Gaja knabino sur la mar'—
    Kantu tu-ral-u-ral-i-do!
Sidis sur genuo de l' ŝipcar'

Serĉo perokula ŝia far'
Tamen min ne vidis tie, ĉar—
Kantu tu-ral-u-ral-i-do!"

"Ĉu plaĉas al vi tio, Bilbilo?"

"Al mi ĝi ne plaĉas," plendis la kapro. "Ĝi memorigas min pri la aligatoro kiu provis fajfi."

"Ĉu li sukcesis, Bilbilo?" demandis la Reĝo.

"Li fajfis egale bone kiel vi kantas."

"Ha, ha, ha, ha, hik, kik, ik!" ridis la Reĝo. "Do sendube li belege fajfis, ĉu ne, mia amiko?"

"Mi ne estas via amiko," respondis la kapro, skuante siajn orelojn malafable.

"Tamen mi estas via amiko," estis la gaja respondo de la Reĝo, "kaj por pruvi tion mi kantos al vi plian verson."

"Ne, mi petegas!"

Sed la Reĝo kantis tion:

"La vento blovis ŝian ŝuon—
Kantu tu-ral-u-ral-i-do!
La ŝu' altflugis en la bluon
Knabino perdis la ŝuduon;
Ne povis sekvi post la pruon—
Kantu tu-ral-u-ral-i-do!"

"Ĉu ne dolĉa kanto, mia bela kapro?"

"Ĉu dolĉa, vi demandas?" koleris Bilbilo. "Mi opinias ĝin egale dolĉa kiel manĝaĵo el mustardo kaj vinagro."

"Sed ne tiel dolĉa kiel via humoro, mi agnoskas. Ha, Bilbilo, via humoro hontigus eĉ mielon."

"Ne kverelu, mi petegas," pledis Ingo. "Ĉu ni ne jam sufiĉe malĝojas?"

"Sed ĉi tiu kverelo estas gaja," diris la Reĝo, "kaj tiel Bilbilo kaj mi ofte amuzas nin. Aŭskultu nun la plej lastan verson:

"Knabino perdis ŝuon, ploris
Kantu tu-ral-u-ral-i-do!
Kapitanon novedzin' amoris
Kaj manĝi l' larmojn ŝi fervoris
Kaj honton de l' knabin' ŝi voris
Kantu tu-ral-u-ral-i-do!"

"Eĉ pli aĉe!" grumblis Bilbilo, tre malestime. "Min plezurigas ke tiu estis la lasta verso, ĉar plia verso tiuspeca eble svenigus min."

"Mi timas ke via orelo ne komprenas muzikon," diris la Reĝo.

“Mi ankoraŭ ne aŭdis muzikon,” deklaris la kapro. “Certe vi havas fortan imagon, Reĝo Rinkitinko, se vi kredas viajn kantojn muziko. Ĉu vi memoras la rakonton pri la urso kiu dungiĝis kiel vartistino?”

“Mi ne memoras ĝin ĝuste nun,” diris Rinkitinko, palpebrumante al Ingo.

“Nu, la urso provis lulkanti por endormigi la bebon.”

“Kaj?” diris la Reĝo.

“Al la urso multe plaĉis ĝia propra voĉo, sed ĝi preskaŭ morttimigis la bebon.”

“He, he, he, he, hu, hu, hu! Vi estas gaja fripono, Bilbilo,” ridis la Reĝo; “gaja fripono malgraŭ viaj malgajaj mienoj. Tamen, se mi ne amuzis vin, mi almenaŭ plezurigis min, ĉar mi multege amas bonan kanton. Do ni ne plu parolu pri la afero.”

Tutdume la knaba Princo remadis la boaton. Li tute ne laciĝis, ĉar la remiloj kiujn li tenis ŝajne mem movis sin. Li malmulte atentis la konversacion inter Rinkitinko kaj la kapro, sed li plenigis siajn pensojn per kion li devos fari kiam li atingos la insulojn Regoso kaj Koregoso kaj frontos siajn malamikojn. Kiam la aliaj fine silentiĝis, Ingo demandis:

“Ĉu vi scipovas batali, Reĝo Rinkitinko?”



“Mi neniam provis,” estis la respondo. “Kiam minacis danĝero mi ĉiam trovis ke estas pli facile forkuri ol fronti la malamikojn.”

“Sed ĉu vi *povus* batali?” demandis la knabo.

“Mi eble provus, se ne estus oportuno eskapi per forkurado. Ĉu vi havas taŭgan armilon per kiu mi batalus?”

“Mi havas nenian armilon,” agnoskis Ingo.

“Do ni uzu argumentojn kaj persvadon anstataŭ batali. Ekzemple, se ni povus persvadi la batalistojn de Regoso kuŝiĝi, por ke mi tretu sur ilin, ili dispremiĝus facile.”

Princo Ingo ne anticipis subtenon de la Reĝo, do lin ne senkuraĝigis tiu respondo. Efektive, li pensis, venko per batalo estus tute neebla, tamen la Blanka Perlo ja ne konsilus ke li iru al Regoso kaj Koregoso se la misio estus senespera. Ŝajnis al li, post plia pripenso, ke li devos fidi la cirkonstancojn por decidi siajn agojn kiam li atingos la insulojn de la barbaroj.

Jam Ingo sentis plenan fidon al la Magiaj Perloj. La Blanka Perlo ja donis al li la boaton, kaj la Blua Perlo donis al li la forton por remi ĝin. Li kredis ke la Palruĝa Perlo protektos lin kontraŭ ĉia eventuala danĝero; do li maltrankvilis ne pri si sed pri siaj

kompanoj. Reĝo Rinkitinko kaj la kapro ne havis protektan magion, do Ingo ĵuris al si fari ĉion eblan por eviti damaĝon al ili.

Tri tagojn kaj tri noktojn la boato arĝente tegita rapidis haste trans la oceanon. La matenon de la kvara tago, pro ilia rapidega veturado, Ingo vidis antaŭ si la bordojn de la du grandaj insuloj Regoso kaj Koregoso.

"La perloj ĝuste gvidis min!" li flustris al si. "Nun, se mi estos saĝa, kaj sinzorga, kaj brava, mi kredas povi savi miajn patron kaj patrinon kaj popolon."



# La Ĝemelaj Insuloj



## ĈAPITRO 7

La Insulo Regoso estis dek kvin kilometrojn larĝa kaj sesdek kvin longa kaj ĝin regis granda kaj potenca Reĝo nomata Goso. Proksime al la bordoj estis verdaj kaj fekundaj kampoj, sed malpli proksimaj al la maro estis krutaj montetoj kaj montoj, tiel rokoplenaj ke nenio povis kreski tie. Sed en tiuj montoj estis minoj de oro kaj arĝento, kiujn devis fosi la sklavoj de la Reĝo, fermite en obskuraj subteraj koridoroj tiucelaj. Dum la paso de tempo la sklavoj fosis gigantajn

kavernojn en kiuj ili loĝis kaj dormis, kaj neniam vidis la taglumon. Kruelaj mastroj kun vipoj staris super tiuj povruloj, kiujn kaptis en multaj landoj la atakogrupoj de Reĝo Goso, kaj la mastroj tute volonte vipis la sklavojn se ili paŭzis eĉ momente dum sia laborado.

Inter la verdaj bordoj kaj la montoj estis arbaroj da densaj interplektitaj arboj, inter kiuj oni trançis nelarĝajn padojn kondukantajn al la minkavoj. Sur la ebenaj verdaj kampoj, ne distance de la oceano, la granda Urbo Regoso estis konstruita, en kiu situis la palaco de la Reĝo. Tiun urbon loĝis miloj da ferocaj batalistoj de Goso, kiuj ofte eniris siajn boatojn kaj etendis sin trans la maron al la najbaraj insuloj por konkeri kaj rabi, kiel ĉe Pingario. Kiam ili ne estis for pro iu el tiuj ekspedicioj, en la Urbo Regoso ili svarmis kaj la urbo tiel fariĝis danĝera loko por iu ajn pacema persono, ĉar la batalistoj estis egale senleĝaj kiel ilia Reĝo.

La Insulo Koregoso situis proksime al la Insulo Regoso; tiel proksime, efektive, ke oni povus ĵeti ŝtonon de unu bordo al la alia. Sed Koregoso estis nur duone tiel granda kiel Regoso kaj anstataŭ esti

montoplena ĝi estis riĉa kaj plaĉa lando, kovrata de kampoj da greno. La kampoj de Koregoso provizis manĝaĵojn por la batalistoj kaj civitanoj de ambaŭ landoj, dum la minoj de Regoso riĉigis ilin ĉiujn.

Koregoson regis Reĝino Koro, kiu estis edzino de Reĝo Goso; sed tiel severa kaj kruela estis la naturo de tiu Reĝino ke la popolo ne povis decidi kiun el la regantoj ili plej timis.

Reĝino Koro loĝis en sia propra Urbo Koregoso, kiu situis sur tiu flanko de la insulo kiu frontis Regoson, kaj ŝiaj sklavoj, plejparte virinoj, devis plugi la teron kaj semi kaj rikolti la grenon.

De Regoso al Koregoso etendiĝis ponto el boatoj, unu apud la alia, sur kiuj estis tabuloj etenditaj trans la randojn tiel ke oni povis marŝi sur ili. Tiel estis facile transiri de unu insulo al la alia kaj kiam estis danĝero la ponto estis facile forprenebla.

La indiĝenoj de Regoso kaj Koregoso konsistis el la batalistoj, kiuj nenion alian faris ol batali kaj rabadi, kaj la tremantaj servistoj kiuj servis ilin. Reĝo Goso kaj Reĝino Koro militis kontraŭ la tuta cetera mondo. Aliaj insulanoj hatis kaj timis ilin, ĉar iliajn sklavojn ili kruele mistraktis kaj absolute nenian

kompaton ili donis al la feblaj aŭ malsanaj.

Kiam revenis la boatoj irintaj al Pingario, ŝarĝite per riĉaj ŝtelaĵoj kaj amaso da kaptitoj, estis multa ĝojo en Regoso kaj Koregoso kaj la Reĝo kaj Reĝino okazigis bonegan festenon por la batalistoj kiuj efektivigis tiel grandan konkeron. Tiu festeno okazis por la batalistoj sur la tereno de la palaco de Reĝo Goso, kaj kun ili en la granda tronĉambro ĉiuj kapitanoj kaj estroj de la batalistoj kunvenis kun Reĝo Goso kaj Reĝino Koro, kiu venis de sia insulo por partopreni en la festo. Tiam ĉiujn rabaĵojn ŝtelitajn disde la Reĝo de Pingario oni dividis laŭ la rangoj, la Reĝo kaj la Reĝino prenis duonon, la kapitanoj kvaronon, kaj la resto dividiĝis inter la batalistoj.

La tagon tuj post la festeno Reĝo Goso sendis Reĝon Kitikuton kaj ĉiujn Pingarianojn labori en la minoj sub la montoj, unue kunĉeninte ilin tiel ke ili ne povos eskapi. La milda Reĝino de Pingario kaj ĉiuj ŝiaj servistinoj, kune kun la kaptitaj infanoj, estis donitaj al Reĝino Koro, kiu laborigis ilin en siaj grenkampoj.

Tiam la regantoj kaj batalistoj de tiuj teruraj insuloj kredis esti por ĉiam detruintaj Pingarion. Sen ĝiaj riĉoj, kun ĉiuj domoj detruitaj, ĝiaj boatoj



kaptitaj kaj la tuta popolo sklavigita, kiel verŝajne estus ke ili iam denove aŭdus pri la dizertita insulo? Tial la popolojn de Regoso kaj Koregoso surprizis kaj perpleksigis ke unu matenon ili rimarkis proksimiĝi al iliaj bordoj el la sudo nigran boaton en kiu estis knabo, dikulo kaj kapro. La batalistoj demandis unu al la alia kiuj ili povus esti, kaj el kie ili venis? Neniu iam venis al tiuj insuloj propravole, tio estis certa.

Princo Ingo gvidis sian boaton al la suda ekstremo de la Insulo Regoso, kiu estis la alteriĝejo plej proksima al la urbo, kaj kiam la batalistoj vidis tiun agon ili iris al la bordo por renkonti lin, kondukate de granda kapitano nomata Buzubo.

"Tiuj homoj certe malbonintencas kontraŭ ni," diris Rinkitinko maltrankvile al la knabo. "Tute sendube ili intencas kapti kaj sklavigi nin."

"Ne timu, sinjoro," respondis Ingo, per trankvila voĉo. "Restu kviete en la boato kun Bilbilo ĝis mi estos parolinta kun tiuj homoj."

Li haltigis la boaton kvar metrojn de la bordo, kaj ekstarante en sia loko li solene riverencis al la amaso da homoj frontantaj lin. Diris la granda Kapitano Buzubo malafablavoĉe:

# Ĉapitro Sep

"Nu, etulo, kiu vi estas? Kaj kial vi aŭdacas veni, neinvitite kaj tute sola, al la Insulo Regoso?"

"Mi estas Ingo, Princo de Pingario," respondis la knabo, "kaj mi venis ĉi tien por liberigi miajn gepatrojn kaj mian popolon, kiujn vi fie sklavigis."

Kiam ili aŭdis tiun aŭdacan parolon granda rido aŭdiĝis de la amaso da batalistoj, kaj kiam la rido ĉesis la kapitano diris:

"Vi amas ŝerci, mia beba Princo, kaj la ŝerco estas ne malbona. Sed kial vi volonte ĵetis vian kapon en la buŝon de leono? Kiam vi estis libera, kial vi ne restis libera? Ni ne sciis ke ni lasis eĉ unu personon en Pingario! Sed ĉar vi sukcesis eskapi de ni, nu, do estas vere afable veni ĉi tien tute propravole por esti nia sklavo. Kiu estas la komika dikulo kun vi?"

"Tiu estas Lia Moŝto, Reĝo Rinkitinko de la granda Urbo Gilgado. Li akompanis min por certigi ke vi plene kompensos ĉion ŝtelitan el Pingario."

"Eĉ pli bone!" ridis Buzubo. "Li estos bela sklavo por Reĝino Koro, kiu amas tikli dikulojn kaj saltigi ilin."

Reĝo Rinkitinko pleniĝis per hororo kiam li aŭdis

tion, sed la Princo respondis aŭdace kiel antaŭe, dirante:

"Nin ne timigas fanfaronoj, kredu min; nek ni estas feblaj kiel vi imagas. Ni havas magiajn povojn tiel grandajn kaj terurajn ke neniu amaso da batalistoj povus kontraŭstari nin, kaj tial mi petas vin cedi vian urbon kaj vian insulon al ni, por ke ni ne dispremu vin per nia potenco."

La knabo parolis tre serioze kaj fervore, sed liaj vortoj nur vekis novan ridadon. Do dum la homoj de Regoso ridadis Ingo movis la boaton firme sur la sablan plaĝon kaj elsaltis. Li ankaŭ helpis Rinkitinkon eliri, kaj kiam la kapro sen helpo saltis sur la sablon, la Reĝo suriris la dorson de Bilbilo, tremante iomete interne sed penante aspekti laŭeble kuraĝa.

Estis aro da maldelikataj haroj inter la oreloj de la kapro, kaj tiun Ingo firme tenis per sia maldekstra mano. La knabo sciis ke la Palruĝa Perlo protektos ne nur lin sed ĉiun kiun li tuŝas, kontraŭ ĉia damaĝo, kaj ĉar Rinkitinko estis rajdanta la kapron kaj Ingo tenis sian manon sur la besto, la trio ne estus damaĝebla per io farata de la batalistoj. Sed Kapitano Buzubo ne sciis tion, kaj la grupo de tri uloj aspektis

tiel febla kaj ridinda ke li kredis ke estos facile kapti ilin. Do li turnis sin al siaj soldatoj kaj kun mangesto diris:

"Kaptu la entrudiĝintojn!"

Tuj du aŭ tri el la batalistoj antaŭenpaŝis por obei, sed mirige al ili ili ne povis atingi iun el la tri uloj; iliaj manoj estis haltigitaj kvazaŭ de nevidebla fera muro. Sen atenti tiujn provojn kapti, Ingo antaŭeniris malrapide kaj la kapro sampaŝis kun li. Kaj kiam Rinkitinko vidis ke li estas sekura kontraŭ damaĝo li faris unu el siaj grandaj gajaj ridoj, kaj tio alarmis la batalistojn kaj nervozigis ilin. La okuloj de Kapitano Bezubo grandiĝis pro surprizo dum la trio senpaŭze antaŭeniris kaj pelis liajn soldantojn retren; nek li mem estis libera de teroro pro la magio protektanta tiujn fremdajn vizitantojn. Rilate al la batalistoj, ili baldaŭ teroriĝis kaj fuĝis panike suprenirante deklivon urben, kaj Buzubo devis ĉasi ilin kaj krii punminacojn antaŭ ol povi haltigi ilin kaj devigi ilin formi batalvicon.

Ĉiuj soldatoj de Regoso portis lancojn kaj pafarkojn kaj sagojn, kaj kelkaj oficiroj havis glavojn kaj batalhakilojn; do Buzubo ordonis ke ili restu firme kaj pafu por mortigi la proksimiĝantajn

fremdulojn. Tion ili penis fari. Ingo estis la plej antaŭa, do la batalisto pafis flugon da akraj sagoj rekte kontraŭ la bruston de la knabo, dum aliaj ĵetis siajn longajn lancojn kontraŭ lin.

Ŝajnis al Rinkitinko ke la malgranda Princo nepre pereos starante antaŭ tiu hajlo de murdaj ĵetaĵoj; sed la potenco de la Palruĝa Perlo ne dizertis lin, kaj kiam la sagoj kaj lancoj atingis pozicion tri centimetron for de lia korpo ili resaltis kaj falis sendamaĝe ĉe liaj piedoj. Nek Rinkitinko nek Bilbilo estis eĉ plejete damaĝita, kvankam ili staris tute apud Ingo.

Buzubo staris dum momento rigardante la knabon kaj silente mirante. Post tio, rekonsciiĝinte, li kriis per laŭta voĉo:

"Denove! Ĉiuj kune, viroj. Neniu iam defios nian potencon kaj plu vivos!"

Denove flugo da sagoj kaj lancoj rapidis cele la trion, kaj ĉar multe pli da batalistoj de Regoso jam grupiĝis kun siaj kompanoj, la aero dum momento senlumiĝis pro la mortigaj ĵetaĵoj. Sed denove ĉiuj falis sendanĝere pro la potenco de la Palruĝa Perlo, kaj Bilbilo, kiu fariĝis tre kolera pro la provoj damaĝi lin kaj lian grupon, subite kuris antaŭen, forpuŝante



la tenon de Ingo, kaj kapfrapis la vicon da batalistoj, kiuj staradis mirigite de la malsukceso konkeri.

Surprizite de la atako fare de la kapro, dekduo da batalistoj ekfalis kune, kriante pro timo, kaj iliaj kamaradoj, ne sciante kio okazis sed imagante ke iliaj malamikoj atakas ilin, turnis sin kaj kuris al la urbo laŭeble plej forte. Bilbilo, ankoraŭ kolera, nur ĝustatempe kaptis la grandan kapitanon turniĝantan por sekvi siajn soldatojn, kaj Buzubo unue sterniĝis kapantaŭe sur la teron, poste ruliĝis du-trifoje, kaj fine saltis al siaj piedoj kaj kuris kriante, sekvante siajn venkitajn batalistojn. Tiu kapbato fare de la kapro estis tre malfacila por Reĝo Rinkitinko, kiu preskaŭ falis de la dorso de Bilbilo pro la ŝoko de la bato; sed la malgranda dika Reĝo vindis siajn brakojn ĉirkaŭ la kolon de la kapro kaj fermis siajn okulojn kaj tenis laŭeble plej firmege. Nur kiam li aŭdis Ingon diri triumfe, “Ni venkis en la batalo sen eĉ unufoje frapi!” Rinkitinko kuraĝis remalfermi siajn okulojn. Kaj li vidis la batalistojn kurantaj en la Urbon Regoson kaj barantaj la pezajn pordegojn, kaj li multe pli facile spiris pro tiu vidaĵo.

“Sen eĉ unufoje frapi!” diris Bilbilo indigne. “Tio ne estas tute vera, Princo Ingo. Vi ne batalis, mi

agnoskas tion, sed mi plurfoje batis tute bonrezulte, kaj mi pretendas esti konkerinta la malkuraĝajn batalistojn tute sen helpo."

"Vi kaj mi kune, Bilbilo," diris Rinkitinko milde. "Sed kiam vi sekvafoje batkuros, bonvolu akurate antaŭaverti min, por mi deiru de via dorso kaj povu aklami vin kiel la solan atakinton."

Ĉar neniu nun restis por kontraŭi ilian antaŭeniron, la trio marŝis al la pordegoj de la urbo, kiuj estis fermitaj kontraŭ ili. La pordegoj estis feraj kaj peze baritaj, kaj sur la supro de la altaj muroj de la urbo amaso da batalistoj nun aperis armite per sagoj kaj lancoj kaj aliaj bataliloj. Ĉar Buzubo iris rekte al la palaco de Reĝo Goso kaj raportis sian venkiĝon, rakontante pri la potenca magio de la knabo kaj de la dika Reĝo kaj de la kapro, kaj demandis kion fari ĉisekve.

La granda kapitano ankoraŭ tremadis pro timo, sed Reĝo Goso ne kredis pri magio, kaj nomis Buzubon malkuraĝa feblulo. Tuj la Reĝo komencis mem komandi siajn soldatojn, kaj li ordonis ke ili okupu la murojn kaj pafu mortige se iu el la tri fremduloj proksimiĝos al la pordegoj.

Kompreneble nek Rinkitinko nek Bilbilo sciis kiel

ili estis protektitaj kontraŭ damaĝo do unue ili emis malaprobi la ordonon kiun faris la knabo ke la trio devas resti ĉiam kune kaj oni devas ĉiam tuŝi unu la alian. Sed kiam Ingo klarigis ke alie lia magio ne savos ilin de damaĝo, ili akceptis obei, ĉar ili nun jam vidis sufiĉon por konvinkiĝi ke la Princon vere protektas ia nevidebla potenco.

Dum ili proksimiĝis al la pordegoj nova pluvo da sagoj kaj lancoj descendis sur ilin, kaj same kiel antaŭe eĉ ne unu ĵetaĵo tuŝis iliajn korpojn. Reĝo Goso, kiu estis sur la muro, miregis kaj iom maltrankviliĝis, sed li dependis de la forto de siaj pordegoj kaj ordonis al siaj soldatoj ke ili plu pafadu ĝis plene eluziĝos ĉiuj iliaj armiloj.

Ingo lasis ilin pafadi laŭvole, dum li staris antaŭ la grandaj pordegoj kaj ekzamenis ilin zorge.

"Eble Bilbilo povos forbati la pordegojn," sugestis Rinkitinko.

"Ne," respondis la kapro; "mia kapo estas dura, sed ne pli dura ol fero."

"Do," respondis la Reĝo, "ni restu ekstere; precipe ĉar ni ne povas eniri."

Sed Ingo estis tute ne certa ke ili ne povos eniri. La pordegoj malfermiĝis internen, kaj tri pezajn

riglilojn tenis en pozicio fortikaj krampoj nititaj al la ŝtalaj plakoj. Al la knabo estis dirite ke la potenco de la Blua Perlo ebligos ke li efektivigu ian ajn fortagon, kaj li kredis ke tio estas vera.

La batalistoj, komandate de Reĝo Goso, ankoraŭ ĵetadis sagojn kaj sagetojn kaj lancojn kaj hakilojn kaj grandajn ŝtonojn sur la invadantojn, tute sensukcese. La tero sub ili estis dense kovrita de armiloj, sed eĉ ne unu el la tri uloj antaŭ la pordegoj estis iometete vundita. Kiam ĉio havebla estis jam ĵetita kaj nenia armilo restis ĉemane, la mirantaj batalistoj vidis la knabon meti sian ŝultron kontraŭ la pordegojn kaj disrompi la gigantajn nitojn kiuj tenis la riglilojn en pozicio. Mil soldatoj ne povus fari tion, sed la malgranda maldika knabo faris ĝin ŝajne plenfacile. La pordegoj ekmalfermiĝis kaj Ingo antaŭenmarŝis en la urbostraton kaj vokis al Reĝo Goso ke li cedu.

Sed Goso nun estis tiom timoplena kiel liaj batalistoj. Li kaj liaj soldatoj kutimis al militado kaj rabado kaj ili antaŭe portis teroron en multaj landojn, sed jen la malgranda knabo, dikulo kaj kapro ne estis vundeblaj per lia tuta militlerto, lia abunda armeo kaj miloj da mortigaj armiloj. Krome,

ili ne nur defiis la tutan armeon de Reĝo Goso sed ili rompis la grandegajn pordojn de la urbo—kvazaŭ ili konsistus el papero—kaj tia montriĝo de enorma forto devigis la fireĝon timi pri sia pluvivo. Kiel ĉiuj tiranoj kaj kaperistoj, Goso estis en sia koro malkuraĝulo, kaj nun paniko kaptis lin kaj li turnis sin kaj fuĝis pro la trankvila antaŭeniro de Princo Ingo el Pingario. La batalistoj estis kiaj sia mastro, kaj ĵetinte ĉiujn armilojn trans la muron kaj estante senhelpaj penante kontraŭi la fremdulojn, ili ĉiuj svarmis sekvante Goson, kiu forlasis sian urbon kaj transiris la ponton el boatoj al la Insulo Koregoso. Okazis fervorega bataktado inter la malkuraĝaj batalistoj por transiri la ponton, kaj multaj estis puŝitaj en la akvon kaj devis naĝi; sed fine ĉiu batalisto de Regoso atingis la bordon de Koregoso kaj post tio ili forŝiris la ponton el boatoj kaj tiris ilin sur sian propran bordon, esperante ke la kvanto da nekovrita akvo neebligos ke la magiaj invadantoj sekvu ilin.


La humilaj citivanoj kaj servistoj de Regoso, kiuj estis teruritaj kaj mistraktataj de la krudaj batalistoj dum la tuta vivo, ne nur multe miris pro tiu subita konkeriĝo de siaj mastroj sed multe ĝojis. Dum la



Reĝo kaj lia armeo fuĝis al Koregoso, la popolanoj ĉirkaŭbrakis unu la alian kaj dancis ĝoje, kaj post tio ili turnis sin por vidi kiaj estas la konkerintoj de Regoso.



# Rinkitinko Grave Eraras



## ĈAPITRO 8

La dika Reĝo rajdis sian kapron tra la stratoj de la konkerita urbo kaj la knaba Princo marŝis fiere apud li, dum ĉiuj homoj klinis siajn kapojn humile al siaj novaj mastroj, kiujn ili pretis servi sammaniere kiel Reĝon Goson.

Eĉ ne unu batalisto restis en la tuta Regoso por kontraŭi la triumfan trion; la ponto el boatoj estis detruita; Ingo kaj liaj kompanoj estis ekster danĝero—almenaŭ provizore.

La gaja malgranda Reĝo rekonis tiun fakton kaj

ĝojis ĉar li eskapis ĉian damaĝon dum la batalo. Kiel ĉio okazis tion li ne sciis, eĉ ne povis diveni, sed li kontentis esti sekura kaj libera ekposedi la urbon de la malamikoj. Do, pasante tra la vicojn da respekto-plenaj civitanoj survoje al la palaco, la Reĝo puŝis sian kronon iomete retren sur sia kalva kapo kaj kunfaldis siajn brakojn kaj kantis per sia plej bona voĉo la ĉisekvajn liniojn:

"Ho, jen la armeo de Reĝ' Rinkitink'!
Ĝi estas negranda, kaj eĉ ne el zink'!
Malamikojn ĝi traktis pli tuje ol ink'—
Rink-i-tink, tink-i-tink, tink!
Heroa la Reĝo, kaj ankaŭ Bilbil';
Malamikoj forkuris ade po mil;
Ĉar venkis la ulojn vivanta batil'—
Rink-i-tink, tink-i-tink, tink!"

"Kial vi ne iomete kreditas Ingon?" demandis la kapro. "Se mi ĝuste memoras, li mem faris parton de la konkerado."

"Tiel estis," respondis la Reĝo, "kaj tial mi konigas laŭdon al ni, Bilbilo. Kiuj malplej agas, ofte plej laŭte proklamas sin kaj tiel ricevas la plejan gloron. Ingo

faris tiom ke ekzistas danĝero ke oni opinios lin pli grava ol ni, do plej bone estas tute ne mencii lin.”

Kiam ili atingis la palacon, kiu estis giganta konstruaĵo, plene meblita per reĝaj grandiozaĵoj, Ingo formale ekposedis ĝin kaj ordonis al la domestro ke li gvidu ilin al la plej belaj ĉambroj en la konstruaĵo. Estis multaj plaĉaj ĉambraroj, sed Rinkitinko proponis al Ingo ke ili kune uzu unu el la plej grandaj litĉambroj.

“Ĉar,” diris li, “ni ne certas ke olda Goso ne revenos kaj provos rekapti sian urbon, kaj necesas memori ke mi ne havas protektan magion. Se venos danĝero dum mi estas sola, mi povos esti facile mortigita aŭ kaptita, sed se vi estos apud mi vi povos savi min kontraŭ damaĝo.”

La knabo rekonis la saĝecon de tiu plano, kaj elektis belan grandan litĉambron sur la dua etaĝo de la palaco, kaj ordonis ke oni enmetu kaj pretigu du orajn litojn por Reĝo Rinkitinko kaj li mem. Al Bilbilo li donis ĉambraron alifianke de la palaco, kie servistoj portis al la kapro freŝtonditan herbon kiel manĝaĵon kaj faris por li molan liton sur kiu kuŝi.

Tiun vesperon la knaba Princo kaj la dika Reĝo festenis tre formale en la altkupola manĝhalo de la

palaco, kie kvardek servistoj servis ilin. La reĝa ĉefkuiristo, fervora favorigi la konkerintojn de Regoso, preparis siajn plej elegantajn kaj plej gustoplenajn manĝaĵojn por ili, kiujn Rinkitinko manĝis tre grandapetite kaj trovis tiel bonegaj ke li ordonis venigi la reĝan ĉefkuiriston en la bankedhalon kaj donacis al li oran butonon kiun la Reĝo tondis de sia propra jako.

"Vi nepre akceptu ĝin," diris li al la ĉefkuiristo, "ĉar mi mem tiom manĝis ke mi tute ne plu povas uzi tiun malsupran butonon."

Al Rinkitinko multege plaĉis denove loĝi en komforta palaco kaj manĝi ĉe bone provizita tablo. Lia ĝojo pligrandiĝis ĉiumomente, tiel ke post kelka tempo li fariĝis tiel gaja kaj feliĉa kiel antaŭ la detruiĝo de Pingario. Kaj, kvankam li estis multe timoplena dum la defio fare de Ingo je la armeo de Reĝo Goso, li nun komencis fari ŝercon el ĝi.

"Nu, mia knabo," diris li, "vi vipis la grandan nigrabarban Reĝon ĝuste kvazaŭ li estus lernejano, eĉ kvankam vi uzis tute nenian militecan armilon. Li humiliĝis pro timo al via magio, kaj tio memorigas al mi ke mi devas postuli ke vi klarigu. Kiel vi faris tion, Ingo? Kaj el kie venis la mirinda magio?"



Eble la Princo saĝe agus se li klarigus la rolon de la magiaj perloj, sed tiumomente li ne emis fari tion. Anstataŭe, li respondis:

"Paciencu, Via Moŝto. La sekreto ne apartenas al mi, do bonvolu ne peti ke mi konigu ĝin. Ĉu ne sufiĉas, por nun, ke la magio savis vin kontraŭ la morto hodiaŭ?"

"Ne kredu min sendanka," respondis la Reĝo fervore. "Miliono da lancoj falis sur min de la muro, kaj pluraj ŝtonoj grandaj kiel montoj, tamen neniu el ili eĉ vundis min!"

"La ŝtonoj ne estis grandaj kiel montoj, sinjoro," diris la Princo ridetante. "Ili estis, efektive, ne pli grandaj ol via kapo."

"Ĉu vi estas certa pri tio?" demandis Rinkitinko.

"Plene certa, Via Moŝto."

"Kiom trompas aspektoj!" ĝemis la Reĝo. "Ĉi tiu kvereleto memorigas al mi la rakonton pri Tom Tiko, kiun mia patro ofte rakontis al mi."

"Mi neniam aŭdis tiun rakonton," Ingo respondis.

"Nu, kiel li rakontis ĝin, ĝi estas tia:

"Tom eliris kaj rigardis,
Petola kulo lin ekgardis;

Sed Tom ne sciis ke jen kul',
'Jen kato!' diris lia okul'.

"Ĝi pikis, vere granda ĝi!
'Ĉu porko?' sin demandis li.
Li tiam aŭdis ĝin muĝanta,
Kaj kriis: 'Ho, ja elefanta!'

"Sed—jen de l' kulo reelflugo
Doloro ĉesis en la pugo,
Li diris: 'Estis, ho okul',
Malgranda, eta, eta pul'.'"

"Vere," diris Ingo, ridante, "la kulo estis tre simila al la ŝtonoj kiuj ŝajnis grandaj kiel montoj."

Post sia manĝo ili inspektis la palacon, kiu estis plena de rabaĵoj ŝtelitaj de Reĝo Goso el multaj nacioj. Sed la tageventoj lacigis ilin kaj ili enlitiĝis frue en sia granda dormoĉambro.

"En la mateno," diris la knabo al Rinkitinko, dum li senvestis sin por enlitiĝi, "mi komencos serĉi miajn patron kaj patrinon kaj la Pingarianojn. Kaj, trovinte kaj savinte ilin, ni ĉiuj reiros hejmen, kaj estos feliĉaj kiel antaŭe."

Ili zorge riglis la pordon de sia ĉambro, por ke neniu eniru, kaj poste eniris siajn litojn, kie Rinkitinko tuj endormiĝis. La knabo kuŝis veka dum kelka tempo pripensante la tagaventurojn, sed baldaŭ ankaŭ li endormiĝis, kaj tiom laca estis li ke nenio ĝenis lian dormon ĝis li vekiĝis la sekvan matenon kiam sunradio lumis en liajn okulojn, rampinte en la ĉambron tra la malferma fenestro apud la lito de Reĝo Rinkitinko.

Decidinte komenci serĉi siajn gepatrojn tute sen nenecesa prokrasto, Ingo tuj eliris la liton kaj komencis vesti sin, dum Rinkitinko, en la alia lito, ankoraŭ dormis pace. Sed kiam la knabo surmetis ambaŭ siajn ŝtrumpojn kaj komencis serĉi siajn ŝuojn, li povis trovi nur unu. La maldekstra ŝuo, en kiu estis la Palruĝa Perlo, mankis.

Plena de maltrankvilo pro tiu trovo, Ingo traserĉis la tutan ĉambron, serĉante sub la litoj kaj divanoj kaj seĝoj kaj malantaŭ la drapiraĵoj kaj en la anguloj kaj en ĉiu alia ebla loko kie ŝuo povus esti. Li provis la pordon, kaj trovis ĝin ankoraŭ riglita; do, pli kaj pli maltrankvile, la knabo devis agnoski ke la valora ŝuo ne estas en la ĉambro.

Kun koro forte batanta li vekis sian kompanon.



“Reĝo Rinkitinko,” diris li, “ĉu vi scias kio okazis al mia maldekstra ŝuo?”

“Via ŝuo!” krietis la Reĝo, larĝe oscedante kaj frotante siajn okulojn por eligi la dormon. “Ĉu vi perdis ŝuon?”


“Jes,” diris Ingo. “Mi serĉis ĉie en la ĉambro, kaj ne povas trovi ĝin.”

“Sed kial ĝeni min pri tia trivialaĵo?” demandis Rinkitinko. “Ŝuo estas nur ŝuo, kaj vi facile ricevos novan. Sed, jen! Eble vian ŝuon mi ĵetis kontraŭ la katon dum la nokto.”

“La katon!” kriis Ingo. “Kio okazis?”

“Nu, dum la nokto,” klarigis Rinkitinko, sidiĝante kaj komencante vesti sin, “min vekis la miaŭado de kato sidanta sur muro de la palaco tuj ekster mia fenestro. Ĉar la bruo ĝenis min, mi en la mallumo etendis manon kaj prenis ion kaj ĵetis ĝin kontraŭ la katon, por fortimigi la beston. Mi ne sciis kion mi ĵetas, kaj mi estis tro dormema, do ne gravis al mi; sed verŝajne mi ĵetis vian ŝuon, ĉar nun ĝi mankas.”

“Do,” diris la knabo, per senespera voĉtono, “via malzorgemo ruinigis min kaj ankaŭ vin, Reĝo Rinkitinko, ĉar en tiu ŝuo estis kaŝita la magia forto kiu protektis nin kontraŭ danĝero.”


SONIGU

# Ĉapitro Ok

La vizaĝo de la Reĝo fariĝis tre seriozaspekta kiam li aŭdis tion kaj li nelaŭte fajfis pro surpriziĝo kaj bedaŭro.

"Jadi! Kial vi ne avertis min pri tio?" li demandis tre malkviete. "Kaj kial vi gardis tiom necesan povon en malnova ŝuo? Kaj kial vi ne metis la ŝuon sub kapkusenon? Vi ege eraris, mia knabo, kiam vi ne konfidis la sekreton al mi, via fidela amiko, ĉar tiuokaze la ŝuo ne estus nun perdita."

Al ĉio ĉi Ingo ne povis respondi. Li sidis sur la flanko de sia lito, kun pendanta kapo, plene senkonsola, kaj vidante tion, Rinkitinko kompatis lin pro lia malfeliĉo.

"Sed jen!" kriis la Reĝo; "ni tuj eliru kaj serĉu la ŝuon kiun mi ĵetis kontraŭ la katon. Sendube ĝi ankoraŭ nun kuŝas sur la korto de la palaco."

Tiu propono vigligis la knabon. Li tuj malfermis la pordon kaj havante sur siaj piedoj nur ŝtrumpojn li kuris malsupren laŭ la ŝtuparo, tuj sekvate de Rinkitinko. Sed kvankam ili serĉis ambaŭflanke de la muro de la palaco kaj en ĉiu ebla fendeto kaj angulo kie ŝuo povus troviĝi, ili malsukcesis trovi ĝin.

Post duonhoro da zorga serĉado la knabo diris lamente:

"Nepre iu trapasis, dum ni dormis, kaj prenis la

necesegan ŝuon, ne sciante ĝian valoron. Por ni, Reĝo Rinkitinko, ĉi tio estos aĉa misfortuno, ĉar nin ĉirkaŭas danĝeroj kontraŭ kiuj ni nun havas nenian protekton. Bonfortune mi havas ankoraŭ la alian ŝuon, en kiu estas la magia povo kiu donas al mi forton; do ne ĉio estas perdita."

Kaj li rakontis al Rinkitinko, per nemultaj vortoj, la sekreton pri la mirindaj perloj, kaj kiel li retrovis ilin en la ruinoj kaj kaŝis ilin en siaj ŝuoj, kaj kiel ili ebligis al li forpeli Reĝon Goson kaj liajn soldatojn el Regoso kaj kapti la urbon. La Reĝo miregis, kaj post la fino de la rakonto li diris al Ingo:

"Kion vi faris pri la alia ŝuo?"

"Nu, mi lasis ĝin en nia litĉambro," respondis la knabo.

"Do mi konsilas ke vi tuj iru preni ĝin," pludiris Rinkitinko "ĉar nin forte ĉagrenus perdi la duan ŝuon, kaj ne nur tiun kiun mi ĵetis kontraŭ la katon."

"Vi pravas!" kriis Ingo, kaj ili retrorapidis al sia litĉambro.

Enirante la ĉambron ili trovis maljunulinon balanta kaj disflugiganta multan polvon.

"Kie estas mia ŝuo?" demandis la Princo, malkviete.

La maljunulino ĉesis balai kaj rigardis lin stulte,

ĉar ŝi ne estis tre inteligenta.

"Ĉu vi parolas pri la sola senpara ŝuo kuŝinta sur la planko kiam mi eniris?" ŝi fine demandis.

"Jes—jes!" respondis la knabo. "Kie ĝi estas? Diru al mi kie ĝi estas!"

"Nu, mi ĵetis ĝin en la rubaĵojn, ekster la malantaŭa barilo," diri ŝi, "ĉar ĝi estis nur sola ŝuo senpara, do ĝi estas tute senutila."

"Montru al ni la vojon al la rubaĵoj—tuj!" ordonis la knabo severe, ĉar lin multe timigis tiu nova misfortuno minacanta lin.

La maljunulino forlamis kaj ili sekvis ŝin, konstante urĝante ŝin rapidi; sed kiam ili atingis la rubaĵojn neniu ŝuo troveblis.

"Estas terure!" lamentegis la juna Princo, preta plori pro la perdo. "Ni nun estas plene ruinigitaj, kaj subigitaj al niaj malamikoj. Nek mi povos liberigi miajn karajn patron kaj patrinon."

"Nu," respondis Rinkitinko, apogante sin per malnova barelo kaj aspektante tre solena, "la okazo estas certe misfortuna, negrave kiel ni rigardas ĝin. Mi supozas ke iu trapasis ĉi tie kaj, vidinte la ŝuon en la rubaĵoj, forportis ĝin. Sed neniu povus scii pri la magia povo kiun la ŝuo enhavas kaj sekve ne uzos

ĝin kontraŭ ni. Mi kredas, Ingo, ke ni devas de nun dependi de niaj intelektoj por liberigi nin el nia nuna katastrofa situacio."

Kun malĝojaj koroj ili reiris al la palaco, kaj enirinte malgrandan ĉambron kie neniu povis observi ilin aŭ aŭdi ilin, la knabo prenis la Blankan Perlon el ĝia silka sako kaj tenis ĝin apud sia orelo, kaj demandis:

"Kion mi faru nun?"

"Informu neniun pri via perdo," respondis la Voĉo de la Perlo. "Se viaj malamikoj ne scios ke vi estas senpova, ili timos vin same kiel ĝis nun. Gardu la sekreton, estu pacienca, kaj ne timu!"

Ingo obeis tiun konsilon kaj ankaŭ avertis Rinkitinkon diri nenion al iu ajn pri la perdiĝo de la ŝuoj kaj la magiaj povoj en ili. Li alvokis la ŝufariston de Reĝo Goso, kiu baldaŭ portis al li novan paron da ruĝaj ledaj ŝuoj kiuj tre bone taŭgis al li. Metinte ilin sur siajn piedojn, la Princo, akompanate de la Reĝo, komencis marŝi tra la urbo.

Kien ajn ili iris oni klinis sin profunde antaŭ la konkerinto, kvankam kelkaj, memorante la teruran forton de Ingo, forkuris timante kaj tremante. Ili kutimis al severaj mastroj kaj ankoraŭ ne sciis kiel ilin

traktos la posteulo de Reĝo Goso. Ĉar ne estis bezono uzi la povojn montritajn dum la antaŭa tago, lian nunan senhelpecon ne suspektis iu ajn el la Regosanoj, kiuj ankoraŭ konsideris lin mirinda magiisto.

Ingo ne kuraĝis perforte eniri la minojn, nuntempe, nek li povis provi konkeri la Insulon Koregoso, kie lia patrino estas sklavigita; do li komencis prireguligi la Urbon Regoso, kaj establinte sin tre pompe en la reĝa palaco li komencis regi la popolon afable, komplezante al eĉ la plej humilaj homoj.

La Reĝo de Regoso kaj liaj sekvantoj transsendis spionojn al la insulo kiun ili forlasis dum sia fuĝo, kaj tiuj spionoj retroiris por informi ke la terura knaba konkerinto ankoraŭ okupas la urbon. Tial neniu el ili provis reiri al Regoso sed daŭris loĝi sur la najbara urbo Koregoso, kie ili pasigis la tagojn time kaj treme, kaj penis komploti kaj plani metodojn superforti la Princon de Pingario kaj la dikan Reĝon de Gilgado.



# Donaco por Zella



ĈAPITRO 9

Nu, okazis, tiun matenon dum tiu sama tago kiam la Princo de Pingario spertis la perdiĝon de siaj senprezaj ŝuoj, ke hazarde laŭlonge de la vojo kiu bordis la flankon de la reĝa palaco, marŝis malriĉa braĝobruligisto nomata Nikoroĉjo, kiu intencis reiri al sia hejmo en la arbaro.

Nikoroĉjo kunportis hakilon kaj faskon da torĉoj sur sia ŝultro kaj li marŝis rigardante la teron, ĉar li estis profunde pensanta pri la stranga maniero laŭ kiu potenca Reĝo Goso kaj lia urbo estis konkeritaj de

knaba Princo kiu venis el Pingario.

Subite la braĝobruligisto ekvidis ŝuon kuŝantan sur la tero, tuj preter la alta muro de la palaco kaj rekte antaŭ li. Li prenis ĝin kaj, vidinte ke ĝi estas bela ŝuo, kvankam multe tro malgranda por lia propra piedo, li metis ĝin en sian poŝon.

Nelonge poste, ĉirkaŭirinte angulon de la muro, Nikoroĉjo atingis rubaĵaron kie, kuŝanta inter amaso da rubaĵoj, estis alia ŝuo—la parulo de tiu kiun li jam antaŭe trovis. Ankaŭ tiun li metis en sian poŝon, dirante al si:

"Nun mi havas belan paron da ŝuoj por mia filino Zella, al kiu multe plaĉos trovi ke mi portis al ŝi donacon el la urbo."

Kaj dum la braĝobruligisto turnis sin en la arbaron kaj paŝadis laŭ la pado cele sian hejmon, Ingo kaj Rinkitinko ankoraŭ serĉadis la mankantajn ŝuojn. Kompreneble ili ne sciis ke Nikoroĉjo trovis ilin, nek la honestulo supozis ke li prenis ion pli valoran ol paron da forĵetitaj ŝuoj kiujn neniu deziras.

Nikoroĉjo devis marŝi plurajn kilometrojn tra la arbaro antaŭ ol povi atingi la malgrandan kabanon el ŝtipoj kie atendas lian revenon lia edzino kaj ankaŭ lia filineto Zella, sed li kutimis al longa marŝado kaj

paŝadis laŭ la pado gaje fajfante por distri sin.

Malmultaj homoj, kiel mi jam diris, iam trairis la senlumajn kaj kunplektiĝintajn arbarojn de Regoso, krom por iri al la minoj en la pretera monto, ĉar multaj danĝeraj bestoj kaŝis sin en la sovaĝaj ĝangaloj, kaj Reĝo Goso neniam sciis, kiam li sendis mesaĝiston al la minoj, ĉu aŭ ne tiu sekure alvenos tien.

Tamen la braĝobruligisto bone konis la sovaĝan arbaron, kaj precipe tiun parton ĝian kuŝantan inter la urbo kaj lia hejmo. Ĝi estis la plejamata loĝejo de la feroca besto Ĉogenmugero, timegata de ĉiu loĝanto de la Insulo Regoso. Ĉogenmugero estis tiom olda ke ĉiu opiniis ke sendube ĝi estas tie ekde la kreiĝo de la mondo, kaj ĉiun jaron de ĝia vivo la gigantaj skvamoj kiuj kovras ĝian korpon fariĝis pli densaj kaj pli duraj kaj ĝiaj makzeloj fariĝis pli larĝaj kaj ĝiaj dentoj fariĝis pli akraj kaj ĝia apetito fariĝis pli vorema ol iam antaŭe.

Dum antaŭaj epokoj estis multaj drakoj en Regoso, sed Ĉogenmugero tiom amis la drakojn ke li manĝis ĉiujn jam antaŭ longe. Estis ankaŭ grandaj serpentoj kaj krokodiloj en la arbarmarĉoj, sed ĉiun voris la malsata Ĉogenmugero. La popolo de Regoso bone



sciis ke ne utilas kontraŭi la Grandan Beston, do kiam iu el ili misfortune renkontis ĝin li kalkulis sin jam pereinta.

Ĉion ĉi Nikoroĉjo bone sciis, sed la sorto ĉiam favoris lin dum liaj veturoj tra la arbaro, kaj kvankam li fojfoje renkontis multajn sovaĝajn bestojn kaj batalis ilin per sia akra hakilo, ĝis tiu tago li neniam renkontis la teruran Ĉogenmugeron. Efektive, li tute ne pensadis pri la Granda Besto dum li marŝis, sed subite li aŭdis la bruadon de rompiĝantaj arboj kaj sentis tremadon de la tero kaj vidis la gigantajn makzelojn de Ĉogenmugero malfermiĝi antaŭ li. Tiam Nikoroĉjo kalkulis sin pereinta kaj lia koro preskaŭ ĉesis batadi.

Li kredis ke ne eblas eskapi. Neniu iam kuraĝis kontraŭi Ĉogenmugeron. Sed Nikoroĉjo malvolis morti sen montri al la monstro, iumaniere, ke li estas manĝata malgraŭ protestoj. Do li levis sian hakilon kaj faligis ĝin sur la ruĝan etendiĝantan langon de la monstro—kaj plene fortranĉis ĝin!

Dummomente la braĝobruligisto apenaŭ kredis kion vidas liaj okuloj, ĉar li nenion sciis pri la perloj kiujn li portas en sia poŝo nek pri la magia povo kiun ili donas al lia brako. Tamen, lia sukceso kuraĝigis

lin denove bati, kaj ĉifoje la giganta skvamokovrita makzelo de Ĉogenmugero estis splitita kaj la besto kriegis pro teruriĝoplena kolero.

Nikoroĉjo deprenis sian mantelon, por ebligi al si pli libere agi, kaj li komencis fervore reatakadi. Sed nun la hakilon ŝajnis rezisti la malmolaj skvamoj kaj ĝi tute ne damaĝis ilin. La besto antaŭeniris kun kolere gapantaj fiokuloj, kaj Nikoroĉjo ekprenis sian mantelon kaj metis ĝin sub sian brakon kaj turnis sin por fuĝi.

Tiu estis malsaĝa ago, ĉar Ĉogenmugero povis kuri kiel la vento. Post momento ĝi atingis la braĝobruligiston kaj ekkunpremis siajn kvar vicojn de akraj dentoj. Sed ili ne tuŝis Nikoroĉjon, ĉar li ankoraŭ tenis firme sian mantelon proksima al sia korpo, kaj en la poŝo de la mantelo estis la ŝuoj de Ingo, kaj en la pintoj de la ŝuoj estis la magiaj perloj. Trovinte sin sendifekta, Nikoroĉjo surmetis sian mantelon, denove prenis sian hakilon, kaj post nelonge jam dispecigis Ĉogenmugeron—tasko kiu montriĝis ne nur facila sed tre agrabla.

"Sendube mi estas la plej forta homo en la tuta mondo!" pensis la braĝobruligisto, dum li fiere rekomencis marŝi, "ĉar Ĉogenmugero estas la

teroranto de Regoso ekde la komenco de la mondo, kaj nur mi sola kapablis detrui la beston. Tamen estas kurioze ke neniam antaŭ nun mi trovis kiom forta persono mi estas."

Li renkontis neniun plian aventuron kaj je la tagmezo li atingis malgrandan klaran spacon en la arbaro kie staras lia modesta kabano.

"Bonan informon! Mi havas bonegajn informojn por vi," li kriis, dum liaj edzino kaj filineto venis saluti lin. "Reĝo Goso estas konkerita de knaba Princo de la fora insulo Pingario, kaj mi hodiaŭ mem—sen helpo—detruis Ĉogenmugeron per la forto de mia brako."

Tio ja estis bonega informo. Ili kondukis Nikoroĉjon en la domon kaj sidigis lin en fotelon kaj devigis lin diri ĉion kion li scias pri la Princo de Pingario kaj la dika Reĝo de Gilgado, kaj ankaŭ la detalojn de sia mirinda batalo kontraŭ potenca Ĉogenmugero.

"Kaj nun, mia filino," diris la braĝobruligisto, kiam li jam la trian fojon rakontis ĉiujn siajn informojn, "jen bela donaco kiun mi portis al vi el la urbo."

Dirante tion li tiris la ŝuojn el la poŝo de sia mantelo kaj transdonis ilin al Zella, kiu dekdufoje



kisis lin kiel page kaj al kiu multe plaĉis la donaco. La knabineto neniam antaŭe surhavis ŝuojn, ĉar ŝiaj gepatroj estis tro malriĉaj kaj ne povis aĉeti tiajn luksaĵojn por ŝi, do nun, posedi ilin, kiuj ne estis multe uzitaj, ĝojplenigis la koron de la infano. Ŝi admiris la ruĝan ledon kaj la gracian bukliĝon de la pintaj piedfingroj. Kiam ŝi provis ilin sur siaj piedoj, ili taŭgis kvazaŭ specife faritaj por ŝi.

La tutan posttagmezon, dum ŝi helpis sian patrinon prizorgi la domon, Zella pensadis pri siaj belaj ŝuoj. Ili ŝajnis pli gravaj al ŝi ol la veno al Regoso de la konkeranta Princo de Pingario, aŭ eĉ la morto de Ĉogenmugero.

Kiam Zella kaj ŝia patrino ne laboris en la kabano, kuirante aŭ kudrante, ili ofte traserĉis la najbaran arbaron por trovi mielon kiun la sovaĝaj abeloj lerte kaŝis en kavaj arboj. La tagon post la reveno de Nikoroĉjo, dum ili eliris denove serĉi mielon, Zella decidis surmeti siajn novajn ŝuojn, ĉar ili protektos ŝiajn piedojn kontraŭ la vergetoj kiuj kovras la teron. Ŝi kutimis al la vergetoj, kompreneble, sed kiel utilas belaj komfortaj ŝuoj, se oni ne uzas ilin?

Do ŝi dance promenis, tre feliĉe, sekvate de sia patrino, kaj baldaŭ ili atingis arbon en kiu estas

profunda kavaĵo. Zella enmetis siajn manon kaj brakon en la spacon kaj trovis la arbon plena de mielo, do ŝi komencis elfosi ĝin per ligna padeleto. Ŝia patrino, kiu tenis la sitelon, subite kriis averte:

"Atentu, Zella; la abeloj venas!" kaj tuj la bonulino kuris rapide cele la domon por eskapi.

Tamen Zella ne havis tempon pli ol sufiĉe por turni sian kapon kiam densa abelsvarmo ekĉirkaŭis ŝin, kaj la abeloj koleris ĉar ili trovis ŝin ŝtelanta ilian mielon kaj ili firme* intencis piki la knabinon pune. Ŝi konis la danĝeron kaj anticipis grave vundiĝi per la amaso da pikantaj abeloj, sed surprize al ŝi la bestetoj ne kapablis flugi sufiĉe proksimen al ŝi por puŝi siajn sagetsimilajn pikojn en ŝian karnon. Ili svarmadis ĉirkaŭ ŝi kvazaŭ obskura nubo, kaj ilia kolera zumado estis terursona, sed la knabineto restis nevundita.

Ekrekonante tion, Zella ne plu timis sed plu elĉerpis mielon ĝis ŝi havis ĉiom kiom estis en la arbo. Post tio ŝi reiris al la kabano, kie ŝia patrino ploradas kaj lamentas la sorton de sia amata infano, kaj la bonulinon multe mirigis la trovo ke Zella eskapis senvunde.

Denove ili eniris la arbaron por serĉi mielon, kaj kvankam la patrino ĉiam forkuris kiam ajn la abeloj

alproksimiĝis, Zella tute ne atentis la bestetojn sed daŭris labori, tiel ke antaŭ la horo por la vespermanĝo la siteloj estis denove superfluantaj per bongustega mielo.

“Pro tia bonfortuno kiel hodiaŭ,” diris ŝia patrino, “ni baldaŭ kolektos sufiĉan mielon por ke vi portu ĝin al Reĝino Koro.” Ĉar montriĝas ke la fireĝino tre amis mielon kaj Zella kutimis, unufoje dum ĉiu jaro, iri al la Urbo Koregoso, por porti al la Reĝino provizon da dolĉa mielo por ŝia tablo. Kutime ŝi alportis nur unu sitelon.

“Sed ĉifoje,” diris Zella, “mi povos alporti du sitelojn al la Reĝino, kiu certe pagos bonan prezon pro ĝi.”

“Estas vere,” respondis ŝia patrino, “kaj, ĉar la knaba Princo eble ekpensos konkeri Koregoson kaj ne nur Regoson, mi opinias ke estos plej bone ke vi komencu vian veturon al Reĝino Koro morgaŭ matene. Ĉu vi ne akordas kun mi, Nikoroĉjo?” ŝi pludiris, turnante sin al sia edzo, la braĝobruligisto, kiu vespermanĝas.

“Mi samopinias,” li respondis. “Se Zella iru al la Urbo Koregoso, estos bone ke ŝi komencu morgaŭ matene.”

# La Ruzeco de Reĝino Koro



## ĈAPITRO 10

Estu certa ke al la Reĝino de Koregoso tute ne plaĉis ke Reĝo Goso kaj ĉiuj liaj batalistoj loĝas en ŝia urbo post sia fuĝo el sia propra urbo. Ili estis sovaĝnaturaj kaj kverelemaj viroj ĉiam, kaj ilia temperamento ne pliboniĝis post ilia konkeriĝo fare de la Princo de Pingario. Krome, ili voradis la manĝprovizaĵojn de Reĝino Koro kaj troplenigis la domojn de ŝiaj propraj regatoj, kiuj grumblis kaj plendis ĝis ilia Reĝino plene enuis pro tio.

"Fi!" ŝi diris al sia edzo, Reĝo Goso, "vi estas pelita el via urbo de knabo, ridinde dika Reĝo kaj virkapro! Kial vi ne reiras batali ilin?"

"Neniu homo povas batali kontraŭ la povoj de magio," respondis la Reĝo per malafabla voĉo. "Tiu knabo aŭ estas feo aŭ protektata de feoj. Ni eskapis vivaj nur ĉar ni hastis forkuri; sed se ni reirus al Regoso, la sama terura povo kiu rompegis la urbopordegojn disatomigus nin."

"Ba! vi estas kovardo!" kriis la Reĝino, moke.

"Mi ne estas kovardo," diris la granda Reĝo. "Mi mortigis enbatale dekojn da malamikoj miaj; per la forto de mia glavo kaj mia bona dekstra brako mi konkeris multajn naciojn; kaj dum mia tuta vivo homoj timas min. Sed neniu kuraĝus fronti la gigantan povon de la Princo de Pingario, eĉ kvankam li estas nur knabo. Tio ne estus kuraĝo, tio estus malsaĝo."

"Do frontu lian povon per ruzemo," sugestis la Reĝino. "Akceptu mian konsilon, kaŝe transiru al Regoso dum la nokto, kiam estos obskure, kaj kaptu aŭ detruu la knabon dum li dormas."

"Neniu armilo povas tuŝi lian korpon," estis la respondo. "Lia vivo estas sorĉita kaj li ne estas



damaĝebla."

"Ĉu la dika Reĝo posedas magiajn povojn, aŭ la kapro?" demandis Koro.

"Mi kredas ke ne," diris Goso. "Ni ja ne povus damaĝi ilin, same kiel ne la knabon, sed ili ne ŝajnis havi nekutiman forton, kvankam la kapo de la kapro estas pli dura ol murrompilo."

"Nu," meditis la Reĝino, "certe eblas iel konkeri tiun feblan knabon. Se vi timas entrepreni la taskon, mi mem iros. Per ia ruzo mi sukcesos kapti lin. Li ne kuraĝos defii Reĝinon kaj nenia magio povas kontraŭstari la ruzemon de virino."

"Agu laŭvole," respondis la Reĝo, figrimacante, "kaj se vi pendiĝos per la dikfingroj aŭ estos ĵetita en karceron, vi estos juste rekompencita pro via supozo ke vi povos sukcesi kie trejnita batalisto ne aŭdacas eĉ provi."

"Mi ne timas," respondis la Reĝino. "Nur soldatoj kaj tiranemuloj estas kovardaj."

Malgraŭ tiu aserto, Reĝino Koro ne estis tiel kuraĝa kiel ruza. Dum pluraj tagoj ŝi pripensis tiun aŭ tiun planon, kaj penis decidi kiu plano plej verŝajne sukcesus. Ŝi neniam vidis la knaban Princon sed ŝi aŭdis tiom da rakontoj pri li de la venkitaj

batalistoj, kaj precipe de Kapitano Buzubo, ke ŝi sciis respekti lian povon.

Insigate de la scio ke ŝi neniam povos forsendi siajn nebonvenajn gastojn antaŭ ol Princo Ingo estos superregita kaj Regoso reakirita por Reĝo Goso, la Reĝino de Koregoso fine decidis fidi la fortunon kaj sian propran intelekton por venki naivan knabon, negrave kiom fortan. Ingo ne povus suspekti kion ŝi faros, ĉar ŝi mem ne sciis. Ŝi intencis agi aŭdace kaj fidi al la ŝanco ke ŝi venkos.

Estas evidente ke se la ruzema Reĝino scius ke Ingo perdis ĉiun sian magion, ŝi ne dediĉus tiom da tempo al la simpla temo kiel kapti lin, sed kiel ĉiuj aliaj ŝin imponis la miriga montro de povo kiun li faris konkerante Regoson, kaj estis nenia kialo kredi ke la knabo estas malpli forta nun.

Unu matenon Reĝino Koro kuraĝe eniris boaton, kaj, kunprenante kvar virojn kiel eskorton kaj gardistojn, ŝi estis remita trans la mallarĝan markolon al Regoso. Princo Ingo sidis en la palaco ludante damojn kun Reĝo Rinkitinko kiam servisto venis al li, dirante ke Reĝino Koro alvenis kaj deziras paroli

kun li.

Tre heziteme, ĉar li timis ke la fireĝino eble trovos ke li nun jam perdis siajn magiajn povojn, la knabo ordonis enkonduki ŝin, kaj ŝi baldaŭ eniris la ĉambron kaj profunde kliniĝis antaŭ li, mokrespekte.

Koro estis granda virino, preskaŭ tiel alta kiel Reĝo Goso. Ŝi havis flagrantajn nigrajn okulojn kaj la malpalan haŭtkoloron kiun oni vidas ĉe ciganoj. Ŝia temperamento, kiam ŝi estis malplezurigita, estis vere terura, kaj ŝia vizaĝo havis fimienon kiun ŝi penis kovri per dolĉa rideto—ofte kiam ŝi celis plej fian agon.

"Mi venis," diris ŝi per nelaŭta voĉo, "por honori la noblan Princon de Pingario. Oni diras ke Via Moŝto estas la plej forta persono en la mondo, kaj nevenkebla en bataloj, kaj tial mi volas ke vi estu mia amiko, kaj ne mia malamiko."

Nu, Ingo ne sciis respondi al tiu parolo. Li ne ŝatis la aspekton de la virino kaj li timis ŝin kaj li ne kutimis al trompado kaj li ne sciis maski siajn verajn sentojn. Do li uzis iom da tempo por pripensi sian respondon, kiun fine li faris ĉivorte:

"Mi ne deziras malpaci kun Via Moŝto, kaj la sola

kialo de mia alveno ĉi tien estas liberigi miajn patron kaj patrinon, kaj mian popolon, kiujn vi kaj via edzo sklavigis, kaj reakiri la rabaĵojn kiujn Reĝo Goso ŝtelis de la Insulo Pingario. Tion mi esperas baldaŭ efektivigi, kaj se vi vere deziras esti mia amiko, vi povos multe helpi min."

Dum li parolis Reĝino Koro studadis la vizaĝon de la knabo kaŝe, el la anguloj de siaj okuloj, kaj ŝi diris al si: "Li estas tiel juna kaj naiva ke mi kredas povi sola kapti lin, kaj facile. Li ne aspektas tre terura kaj mi suspektas ke Reĝo Goso kaj liaj batalistoj ektimis pro nenio." Post tio, voĉe ŝi diris al Ingo:

"Mi deziras inviti vin, potenca Princo, kaj vian amikon, la grandan Reĝon de Gilgado, viziti mian modestan povran palacon ĉe Koregoso, kie ĉiuj miaj regatoj honoros vin. Ĉu vi venos?"

"Nuntempe," respondis Ingo, maltrankvile, "mi devas rifuzi vian afablan inviton."

"Estos festenado, kaj dancistinoj, kaj ludoj kaj piroteknikaĵoj," diris la Reĝino, parolante kvazaŭ fervorante logi lin kaj je ĉiu vorto venante paŝon pli proksimen al kie li staras.

"Mi ne povus ĝui ilin dum miaj povraj gepatroj



estas sklavoj," diris la knabo, malfeliĉe.

"Ĉu vi certas pri tio?" demandis Reĝino Koro, kaj jam ŝi estis tre proksima al Ingo. Subite ŝi antaŭen klinis sin kaj ĵetis ambaŭ siajn longajn brakojn ĉirkaŭ la korpon de Ingo, tenante lin per firma teno kia de ŝraŭbtenilo.

Nun Rinkitinko eksaltis antaŭen por savi sian amikon, sed Koro fortege piedfrapis kaj batis la Reĝon rekte sur lia stomako—tre delikata loko por piedfrapo, precipe kiam oni estas dika. Post tio, ankoraŭ strikte ĉirkaŭbrakumante Ingon, la Reĝino laŭte kriis:

"Mi havas lin! Enportu la ŝnurojn."

Tuj la kvar viroj kiujn ŝi kunportis kuris en la ĉambron kaj ligis la manojn kaj piedojn de la knabo. Post tio ili kaptis Rinkitinkon, kiu ankoraŭ frotadis sian somakon, kaj simile ligis lin.

Ridante pro fitriumfo, Reĝino Koro nun kondukis siajn kaptitojn al la boato kaj reiris kun ili al Koregoso.

Granda estis la mirego de Reĝo Goso kaj liaj batalistoj kiam ili vidis ke la potenca Princo de Pingario, kiu antaŭe fuĝigis ilin ĉiujn, estas kaptita de virino. Kvankam kovardoj, ili nun dense amasiĝis

ĉirkaŭ la knabon kaj mokkriis al li, kaj kelkaj el ili batus lin se la Reĝino ne elkrius:

"Detenu la manojn! Li estas mia kaptito, memoru—ne via."

"Nu, Koro, kion vi faros pri li?" demandis Reĝo Goso.

"Mi sklavigos lin, por ke li distru min dum miaj neokupataj horoj. Ĉar li estas belaspekta knabo, kaj milda, kvankam li ja fortimigis tiom terure ĉiujn vin la grandajn batalistojn."

La Reĝo sulkis la frunton pro tiu parolo, ĉar ne plaĉis al li esti mokata, sed li nenion pli diris. Li kaj liaj soldatoj reiris tiun saman tagon al Regoso, reestablinte la ponton el boatoj. Kaj ili okazigis sovaĝan karnavalon da ĝojado, kaj en la palaco de la Reĝo kaj en la urbo, kvankam la povraj homoj de Regoso kiuj ne estis batalistoj ĉiuj bedaŭris ke la afabla juna Princo estas kaptita de siaj malamikoj kaj ne plu povas regi ilin.

Kiam ŝiaj nebonvenaj gastoj jam reiris al Regoso kaj la Reĝino estis sola en sia palaco, ŝi ordonis venigi Ingon kaj Rinkitinkon antaŭ ŝin kaj forpreni iliajn ligilojn. Ili venis sufiĉe malfeliĉe, sciante ke ili estas en serioza missituacio kaj je la dispono de kruela

mastrino. Ingo antaŭe konsiliĝis kun la Blanka Perlo, kiu konsilis ke li elportu brave sian misfortunon, promesante pliboniĝon tre baldaŭ. Konsolite de tiu promeso, Ingo frontis la Reĝinon per digna mieno kiu indikis kaj fieron kaj kuraĝon.

"Nu, junuleto," diris ŝi, gajatone ĉar al ŝi plaĉis ŝia sukceso, "vi lerte ruzis je mia povra edzo kaj ege timigis lin, sed pri tiu friponago mi emas pardoni vin. Denun mi intencas ke vi estu mia paĝio, kio signifas ke vi devos venigi por mi kaj porti por mi kion ajn mi deziras. Kaj mi konsilas vin ke vi obeu ĉiun mian kapricon sendemande kaj senprokraste, ĉar kiam mi koleras mi fiiĝas, kaj kiam mi fiiĝas, iun neeviteble trafas vipo. Ĉu vi komprenas min?"

Ingo riverencis, sed ne respondis. Ŝi turnis sin al Rinkitinko kaj diris:

"Rilate al vi, mi ne povas decidi kiel utiligi vin por mi, ĉar vi estas multe tro dika kaj mallerta por labori en la kampoj. Tamen, eble mi povos uzi vin kiel pinglokusenon."

"Kio!" kriis Rinkitinko hororoplene, "ĉu vi puŝus pinglojn en la Reĝon de Gilgado?"

"Kial ne?" respondis Reĝino Koro. "Vi estas dika kiel pinglokuseno, kiel vi mem nepre devas agnoski,

kaj kiam ajn mi bezonus pinglon mi povus alvoki vin.” Post tio ŝi ridis pro lia timoplena aspekto kaj demandis: “Krome, ĉu vi estas tikliĝema?”

Jam tiun demandon Rinkitinko timegis. Li ĝemis pro malespero kaj gestis per sia kapo.

“Mi volonte tiklus la plandojn de viaj piedoj per plumo,” pludiris la kruelulino. “Bonvolu depreni viajn ŝuojn.”

“Ho, via Moŝto!” pledis povra Rinkitinko, “mi petegas ke vi permesu ke mi amuzu vin alimaniere. Mi povas danci, aŭ kanti por vi.”

“Nu,” ŝi diris, tremante pro ridado, “vi rajtas kanti—se la kanto estas gaja. Sed vi ne aspektas tre gajhumora.”

“Mi *sentas* min gajhumora—ja vere, Via Moŝto!” protestis Rinkitinko, fevora eskapi de tiklado. Sed eĉ dum li protestis ke li “sentas sin gaja”, lia ronda ruĝa vizaĝo havis mienon de hororo kaj malkvieto kiu estis vere komika.

“Kantu, do!” ordonis Reĝino Koro, multe amuzite.

Rinkitinko ĝemis pro senŝarĝiĝo kaj, grakinte kaj penante subpremi siajn plorsingultojn li komencis kanti ĉi tiun kanton—milde, unue, sed fine elmuĝante ĝin plenvoĉe:

"Ho!
Estis Beba Tigro, li loĝis en me-na-ĝe-ri'—
Vula-vala-vila—liberiĝi volis li;
Ĉiu kredis ke li mildas, ne povus mildi pli—
Vula-vala-vila—Be-ba Ti-gro!

"Ho!
Oni premis la piedon, kapon amkaresis—
Vula-vala-vila—prioste interesis;
Sed li kreskis kaj li kreskis kaj kreski li ne ĉesis—
Vula-vala-vila—ki-a Ti-gro!

"Ho!
Oni venis al la besto kaj li ekkomence batis—
Vula-vala-vila—senĉese mordis, gratis!
Kolere rompis kaĝon, eskapon vere ŝatis—
Vula-vala-vila ve-ra Ti-gro!"

"Kaj ĉu la kanto havas celon?" demandis Reĝino Koro, kiam Reĝo Rinkitinko finis sian kanton vere vigle.

"Se jes," respondis Rinkitinko, "temas pri averto ne ludi kun tigroj."



La malgranda Princo ne povis ne rideti pro tiu sagaca respondo, sed Reĝino Koro sulkis la frunton kaj akre rigardis la Reĝon.

"Ho," diris ŝi; "mi kredas scii la diferencon inter tigro kaj dorlothundeto. Sed mi memoros la averton, malgraŭ tio."

Ĉar, malgraŭ siaj sukcesoj kiam ŝi kaptis ilin, ŝi iom timis tiujn personojn kiuj antaŭe montris tiom da eksterordinaraj povoj.



# Zella Iras al Koregoso



## ĈAPITRO 11

La arbaro en kiu loĝis Nikoroĉjo kun siaj edzino kaj filino situis inter la montoj kaj la Urbo Regoso, kaj multe uzata pado serpentumis inter la arboj, kondukante de la urbo al la minoj. Tiun padon uzis la mesaĝistoj de la Reĝo, kaj kaptitoj estis ankaŭ sendataj laŭ tiu vojo el Regoso por labori en la subteraj kavernoj.

Nikoroĉjo konstruis sian kabanon ĉ. du kilometrojn for de tiu pado, por ke lin ne fiĝenu la sovaĝaj kaj senleĝaj soldatoj de Reĝo Goso, sed la

familion de la braĝobruligisto ĉirkaŭis multaj bestoj apenaŭ malpli danĝere renkonteblaj, kaj ofte dum la nokto ili povis aŭdi sovaĝajn bestojn muĝadi kaj ĉirkaŭpaŝadi proksime al la kabano. Ĉar Nikoroĉjo atentis siajn proprajn aferojn kaj neniam ĉasis la sovaĝajn bestojn por damaĝi ilin, la bestoj jam konsideris lin unu el la naturaj loĝantoj de la arbaro kaj ne ĝenis lin aŭ lian familion. Tamen Zella kaj ŝia patrino malofte vagis tre for de la hejmo, escepte de kiam ili faris taskojn kiaj portado de mielo al Koregoso, kaj tiam Nikoroĉjo avertis ilin esti tre zorg-atentaj.

Do kiam Zella komencis sian veturon al Reĝino Koro, portante la du sitelojn da mielo per siaj manoj, ŝi entreprenis danĝeran aventuron kaj estis nenia certo ke ŝi revenos sekura al siaj amantaj gepatroj. Sed ili estis malriĉaj, kaj la mono de Reĝino Koro, kiun ili anticipis ricevi pro la mielo, ebligus ke ili aĉetu multajn bezonaĵojn; do ili opiniis ke estas plej bone ke Zella iru. Ŝi estis kuraĝa knabineto kaj malriĉuloj ofte devas riski hazardojn kiajn riĉuloj ne devas.

Pasanta lignohakisto jam alportis la informon al la kabano de Nikoroĉjo ke Reĝino Koro kaptis la



konkerintan Princon de Pingario kaj ke Goso kaj liaj batalistoj denove estas en sia urbo Regoso; sed tiuj baraktoj kaj konkeroj estis aferoj kiuj, kvankam interesaj, ne rilatis al la malriĉa braĝobruligisto aŭ lia familio. Ili pli maltrankvilis pro la raporto ke la batalistoj fariĝis pli senzorgemaj ol eĉ antaŭe, kaj ĝoje ĝenas ĉiujn vulgarulojn; do ili diris al Zella ke ŝi detenu sin de la ordinara pado laŭeble, por ke ŝi ne renkontu iun el la soldatoj de la Reĝo.

"Kiam necesos elekti inter la batalistoj kaj la sovaĝaj bestoj," diris Nikoroĉjo, "vi trovos la bestojn pli kompatemaj."

La knabineto plej bone vestis sin por la veturo kaj ŝia patrino ĵetis bluan silkan ŝalon sur ŝiajn kapon kaj ŝultrojn. Sur ŝiaj piedoj estis la belaj ruĝaj ŝuoj kiujn ŝia patro portis al ŝi el Regoso. Tiel preparite, ŝi kisadiaŭis siajn gepatrojn kaj eliris leĝerkore, portante la sitelojn da mielo per ambaŭ manoj.

Necesis ke Zella transiru la padon kondukantan de la minoj al la urbo, sed jam estante aliflanke ŝi verŝajne neniun renkontos, ĉar ŝi decidis trairi la arbaron kaj tiel atingi la ponton el boatoj sen eniri la Urbon Regoson, kie oni eble interrompus ŝin. Dum

unu-du horoj ŝi trovis la marŝadon sufiĉe facila, sed poste la arbaro, kiu tiuloke estis nekonata de ŝi, fariĝis multe interplektita. La arboj estis pli densaj kaj grimpoplantoj interplektiĝis inter ili. Ŝi devis turni sin tien kaj tien por povi trairi, kaj fine ŝi atingis lokon kie reto da grimpoplantoj kaj brančoj efike baris ŝian pluiron.

Zella ĉagreniĝis, unue, kiam ŝi renkontis tiun obstaklon, sed demetinte siajn sitelojn ŝi provis forpuŝi la branĉojn. Je ŝia tuŝo ili apartiĝis kvazaŭ magie, disrompiĝante kvazaŭ sekiĝintaj vergetoj, kaj ŝi trovis sin kapabla facile trapasi. Aliloke granda ŝtipo estis falinta trans ŝian padon, sed la knabineto facile levis ĝin kaj forĵetis ĝin, kvankam ses ordinaraj viroj apenaŭ povus movi ĝin.

La infanon iom maltrankviligis tiu atesto pri forto pri kiu ŝi antaŭe ne sciis ke ŝi posedas ĝin. Por certigi al si ke ne temas pri iluzio, ŝi provis sian nove trovitan povon multmaniere, trovante ke nenio estas tro granda nek tro peza por ke ŝi povu levi ĝin. Kaj, sufiĉe nature, la knabino kuraĝiĝis pro tiuj eksperimentoj kaj komencis fidi ke ŝi povos protekti sin negrave kia katastrofo okazos. Kiam, post kelka tempo, sovaĝa apro kuris kontraŭ ŝin, muĝante terure

kaj minacante ŝin per siaj grandaj elstaraj pintodentoj, ŝi ne grimpis arbon por eskapi, kiel antaŭe ĉiam kiam ŝi renkontis tiajn bestojn, sed staris senmove kaj frontis la apron. Kiam ĝi estis tre proksima kaj Zella vidis ke ĝi ne povas damaĝi ŝin—fakto kiu miregigis kaj la beston kaj la knabinon—ŝi subite subetendis manon kaj kaptis ĝin per unu orelo kaj ĵetis la grandan beston tre foren inter la arboj, kie ĝi falis kapantaŭe sur la teron, muĝante pli laŭte ol antaŭe pro surpriziĝo kaj timo.

La knabino ridis gaje pro tiu evento kaj, preninte siajn du sitelojn, rekomencis sian veturon tra la arbaro. Ne estas kronikite ĉu la sovaĝa apro rakontis sian aventuron al la aliaj bestoj aŭ ĉu ili hazarde vidis lian venkiĝon, sed estas certe ke Zella ne estis denove ĝenita. Bruna urso rigardis ŝin preteriri tute sen moviĝi ŝiadirekten kaj granda pumo—besto timegata de ĉiuj homoj—forrampis de la pado dum ŝi proksimiĝis, kaj ekmalaperis inter la arbojn.


Tiel ĉio favoris la veturon de la knabino kaj ŝi tiel bone rapidis ke je la tagmezo ŝi eliris el la rando de la arbaro kaj trovis sin tre proksima al la ponto el boatoj kondukanta al Koregoso. Tion ŝi transiris sekure kaj sen renkonti iujn el la krudaj batalistoj



kiujn ŝi tiom timis, kaj kvin minutojn poste la filino de la braĝobruligisto petis eniron ĉe la malantaŭa pordo de la palaco de Reĝino Koro.



# La Ekscitiĝo de Bilbilo la Kapro



## ĈAPITRO 12

Nia rakonto nun devas reiri al unu el la rolantoj kiujn ni devis neglekti. La temperamento de Bilbilo la kapro ĉiuokaze ne estis tre dolĉa, kaj kiam ajn li emis plendi li emis esti tre grumblema. Do, kiam lia mastro ekloĝis en la palaco de Reĝo Goso por trankvile vivi kun la knaba Princo, kaj pasigis sian tempon per damludado kaj manĝado kaj aliaj distraĵoj, li tute ne bezonis utiligi Bilbilon por io ajn, kaj enfermis la kapron en supraetaĝan ĉambron por malebligi ke li vagadu tra

la urbo kaj kverelu kun la civitanoj. Sed tio tute ne plaĉis al Bilbilo. Li fariĝis tre kolerema kaj malagrabla pro sia soleco kaj ne parolis afable al la servistoj kiuj venis porti al li manĝaĵojn; tial tiuj personoj decidis ne plu servi lin, ĉar ili rankoris lian paroladon kaj al ili ne plaĉis ke ilin riproĉas maldika, neprizorgita kapro, eĉ kvankam ĝi apartenas al konkerinto. La servistoj forrestis de la ĉambro kaj Bilbilo fariĝis pli malsata kaj pli kolera ĉiuhore. Li provis manĝi la tapiŝojn kaj ornamaĵojn, sed trovis ilin tute sennutraj. Ne estis herbo havebla krom se li eskapus el la palaco.

Kiam Reĝino Koro venis kapti Ingon kaj Rinkitinkon, ambaŭ kaptitoj tiom pleniĝis per malespero pro sia propra misfortuno ke ili tute ne pripensis la kapron, kiu restis sola en sia ĉambro. Nek Bilbilo sciis ion ajn pri la ŝanĝitaj fortunoj de siaj kamaradoj antaŭ ol li aŭdis kriojn kaj laŭtan ridadon el la suba korto. Rigardante el fenestro, intencante riproĉi tiujn kiuj aŭdacas tiel ĝeni lin, Bilbilo vidis la korton tute plena de batalistoj kaj sciis per tio ke la palaco iel denove falis en la manojn de la malamikoj.

Nu, kvankam Bilbilo estis ofte ege malafabla al Reĝo Rinkitinko, ankaŭ al la Princo, kaj kelkfoje li



uzis severajn vortojn parolante al ili, li estis sufiĉe inteligenta por scii ke ili estas liaj amikoj, kaj por scii ke Reĝo Goso kaj liaj soldatoj estas liaj malamikoj. Pro subita kolero, provokite de sia vido al la batalistoj kaj la scio ke li estas sub la regado de la danĝeraj viroj de Regoso, Bilbilo kapbatis la pordon de sia ĉambro kaj rompmalfermis ĝin. Post tio li kuris al la supro de la ŝtuparo kaj vidis Reĝon Goson grimpi la ŝtupojn sekvate de longa vico de siaj ĉefkapitanoj kaj batalistoj.

La kapro klinis sian kapon, tremante pro furiozo kaj ekscitiĝo, kaj ĝuste kiam la Reĝo atingis la plejsupran ŝtupon la besto kuris antaŭen kaj kapbatis Lian Moŝton tiom feroce ke la granda potenca Reĝo, kiu ne anticipis atakon, faldiĝis kaj falis surdorsen. Lia granda pezo renversbatis la sekvan bataliston kaj li siavice batis la sekvan bataliston kaj renversis lin, tiel ke tuje la tuta vico de la malamikoj de Bilbilo faladis pied-super-kapen ĝis la fundo de la ŝtuparo, kie ili amasiĝis, baraktante kaj kriante kaj pro la konfuzo batante unu la alian per siaj pugnoj, ĝis ĉiu el ili estis kontuzita kaj doloroplena.

Fine Reĝo Goso sukcesis eligi sin el la amaso kaj rekuris supren laŭ la ŝtuparo, vere ege kolera. Bilbilo

pretis por li kaj duafoje kapbatis la Reĝon tiel ke li falis al la fundo de la ŝtuparo; sed ĉifoje la kapro ankaŭ senekvilibriĝis kaj sekvis la Reĝon, falante plene sur la konfuzitan amason da soldatoj. Tie li piedbatis tiom ferocege per siaj kalkanoj ke li baldaŭ liberigis sin kaj kuris el la pordejo de la palaco.

"Haltigu lin!" kriis Reĝo Goso, kurante post li.

Sed la kapro estis nun tiom sovaĝa kaj ekscitita ke ne plu estis sekure por iu ajn, stari blokante lian kuron. Neniu el la viroj estis armita kaj kiam unu-du provis forturni la kapron, Bilbilo sternis ilin sur la teron. La plej multaj batalistoj, tamen, estis sufiĉe saĝaj por ne provi influi lian fuĝon.

Kurante laŭ la strato, Bilbilo trovis sin proksimiĝanta al la ponto el boatoj kaj sen paŭzi por pensi pri kien ĝi kondukos lin li transiris kaj plukuris. Post kelkaj momentoj granda ŝtona konstruaĵo blokis lin. Ĝi estis la palaco de Reĝino Koro, kaj vidinte la pordegojn de la korto tute malfermaj, Bilbilo tra-rapidis sen malgrandigi sian rapidon.



# Zella Savas la Princon



ĈAPITRO 13

La fia Reĝino de Koregoso estis tre malbonhumora ĉimatene, ĉar unu el ŝiaj sklavestroj venis de la kampoj por diri ke nombro de ŝiaj sklavoj ribelis kaj rifuzas labori.

“Venigu ilin al mi!” ŝi kriis sovaĝe. “Vigla vipado eble ŝanĝos ilian decidon.”

Do la sklavestro foriris alvenigi la ribelantojn kaj Reĝino Koro sidiĝis por matenmanĝi, kun fimieno.

Princo Ingo ricevis ordonon stari malantaŭ sia

nova mastrino kun granda ventumilo el pavplumoj, sed li tiom malkutimis al tia servado ke li mallerte tuŝetis ŝian orelon per la ventumilo. Tuj ŝi ekkoleregis kaj frapis la Princon dufoje per sia mano—kaj la frapoj lasis postan senton, ĉar ŝia mano estis granda kaj malmola kaj ŝi ne emis milde agi. Ingo suferis la frapojn sen retiri sin aŭ krieti, kvankam ili vundis lian fieron multe pli ol lian korpon. Sed Reĝo Rinkitinko, kiu agis kiel servisto de la Reĝino kaj ĵus enportis ŝian kafon, estis tiom surprizita kiam li vidis la junan Princon punata ke li renversis la ujon kaj la varmega kafo fluis trans la sinon de la plej bona matenrobo de la Reĝino.

Koro saltis el sia seĝo kriegante pro kolero kaj povra Rinkitinko sendube ricevus teruran batadon se ne revenus la sklavestro je tiu momento kaj altirus la atenton de la virino. La estro alkondukis ĉiujn sklavinojn el Pingario, kiuj estis ŝarĝitaj per ĉenoj kaj estis tiel feblaj kaj malsanaj ke ili apenaŭ povis marŝi, kaj tute ne labori en la kampoj.

La okuloj de Princo Ingo obskuriĝis per lamentolarmoj kiam li trovis kiel lia povra regataro estis mistrakata, sed lia propra embaraso estis tiel senhelpa ke li ne povis helpi ilin. Bonfortune la patrino de la

knabo, Reĝino Gario, ne estis inter la slavoj, ĉar Reĝino Koro metis ŝin en la reĝan laktejon por fari buteron.

"Kial vi rifuzas labori?" demandis Koro per severa voĉo, ĉar la sklavinoj el Pingario staris antaŭ ŝi, tremante kaj kun subenklinitaj okuloj.

"Ĉar mankas al ni forto por fari la taskojn kiujn viaj estroj postulas," respondis unu el la virinoj.

"Do vi estos vipataj ĝis revenos via forto!" kriis la Reĝino, kaj turninte sin al Ingo, ŝi ordonis: "Alportu al mi la vipon kun la sep ŝnuroj."

Elirinte la ĉambron, demandante al si kiel li povos savi la malfeliĉulinojn el ilia nemeritita puniĝo, Ingo renkontis knabinon kiu eniradis tra la malantaŭa pordo, kiu demandis:

"Ĉu vi povas diri al mi kie mi trovos Ŝian Moŝton, Reĝinon Koron?"

"Ŝi estas en la ĉambro kun la ruĝa kupolo, kie verdaj drakoj estas pentritaj sur la muroj," respondis Ingo; "sed ŝi havas koleran kaj malgracan humoron hodiaŭ. Kial vi deziras vidi ŝin?"

"Mi havas mielon vendotan," respondis la knabino, kiu estis Zella, ĵus veninta de la arbaro. "La Reĝino multe amas mian mielon."

# Ĉapitro Dek Tri

“Vi povas iri al ŝi, se vi deziras,” diris la knabo, “sed atentu ne kolerigi la kruelan Reĝinon, alie ŝi eble mistraktos vin fie.”

“Kial ŝi mistraktus min, kiu portas al ŝi la mielon kiun ŝi tiom amas?” demandis la infano naive. “Sed mi dankas vin pro via averto; kaj mi penos ne kolerigi la Reĝinon.”

Kiam Zella komencis foriri, la okuloj de Inga subite ekvidis ŝiajn ŝuojn kaj tuj li rekonis ilin kiel siajn. Ĉar nur en Pingario estis ŝuoj tiel formitaj: kun altaj kalkanumoj kaj pintaj piedfingrejoj.

“Haltu!” li kriis per voĉo de ekscitiĝo, kaj la knabino obeis, mirante. “Diru al mi,” li pludiris, pli milde, “el kie vi akiris tiujn ŝuojn?”

“Mia patro portis ilin al mi el Regoso,” ŝi respondis.

“El Regoso!”

“Jes. Ili estas belaj, ĉu ne?” demandis Zella, rigardante siajn piedojn por admiri ilin. “Mia patro trovis unu el ili apud la muro de la palaco, kaj la alian sur rubaĵaro. Do li portis ilin al mi kaj ili taŭgas al miaj piedoj perfekte.”

Jam Ingo tremadis pro fervora ĝojo, kiun kompreneble ne povis kompreni la knabino.

“Kiel vi nomiĝas, fraŭlineto?” li demandis.

"Mi nomiĝas Zella, kaj mia patro estas Nikoroĉjo, la braĝobruligisto."

"Zella estas bela nomo. Mi estas Ingo, Princo de Pingario," diris li, "kaj la ŝuoj kiujn vi nun portas, Zella, apartenas al mi. Ili ne estis forĵetitaj, kiel supozis via patro, sed ili estis perditaj. Ĉu vi bonvolos permesi ke mi rehavu ilin?"

La okuloj de Zella pleniĝis per larmoj.

"Ĉu do mi devos fordoni miajn belajn ŝuojn?" ŝi demandis. "Ili estas la solaj ŝuoj kiujn iam mi posedis."

Ingo kompatis la povran infanon, sed li sciis kiom grave estas reposedi la Magiajn Perlojn. Do li diris, petegante:

"Bonvolu permesi ke mi havu ilin, Zella. Vidu! Mi interŝanĝos por ili la ŝuojn kiujn mi nun surhavas, kiuj estas pli novaj kaj pli belaj ol la aliaj."

La knabino hezitis. Ŝi volis plaĉi al la knaba Princo, tamen ŝi malvolis interŝanĝi la ŝuojn kiujn ŝia patro portis al ŝi kiel donacon.

"Se vi donos al mi la ŝuojn," daŭrigis la knabo, maltrankvile, "mi promesas riĉigi kaj prosperigi vin kaj viajn patron kaj patrinon. Efektive, mi promesas plenumi kian ajn peton vi faros al mi," kaj li sidiĝis sur la planko kaj detiris la ŝuojn kiujn li surhavas kaj



etendis ilin al la knabino.

"Mi provos ĉu ili taŭgos al mi," diris Zella, deprenante sian maldekstran ŝuon—tiun en kiu estis la Palruĝa Perlo—kaj komencante surmeti unu el la ŝuoj de Ingo.

Ĝuste tiam Reĝino Koro, kolera pro la devo atendi sian vipon kun la sep ŝnuroj, kuris en la ĉambron kaj trovis Ingon. Vidante la knabon sidanta sur la planko apud Zella, la virino saltis cele lin por bati lin per siaj firmaj pugnoj; sed Ingo nun jam surmetis la ŝuon kaj la batoj de la Reĝino ne povis atingi lian korpon.

Tiam Koro ekvidis la vipon kuŝantan apud Ingo kaj preninte ĝin ŝi penis vipi lin per ĝi—tute vane.

Dum Zella sidis hororoplena pro tiu sceno, la Princo, kiu komprenis ke li devas ne malŝpari tempon, etendis sian manon kaj tiris la dekstran ŝuon de la piedo de la knabino, kaj rapide metis ĝin sur sian piedon. Post tio li stariĝis kaj, frontante la furiozan sed miregantan Reĝinon, li diris al ŝi per trankvila voĉo:

"Sinjorino, bonvolu doni al mi tiun vipon."

"Mi rifuzas!" respondis Koro. "Mi vipos tiujn Pingariajn virinojn per ĝi."

La knabo ekkaptis la vipon kaj per nerezistebla forto li tiris ĝin el la mano de la Reĝino. Sed ŝi tiris el sia

mamzono akran ponardon kaj rapide kiel fulmo ŝi celis piki la koron de Ingo. Li nur staris senmove kaj ridetis, ĉar la klingo resaltis kaj falis brue sur la plankon.

Tiam, fine, Reĝino Koro komprenis la magian povon kiu teruris ŝian edzon sed kiun ŝi mokis pro sia senscio, ne kredante je ĝi. Ŝi ne sciis ke la povo de Ingo estis antaŭe perdita kaj nun estas retrovita, sed ŝi komprenis ke la knabo ne estas ordinara malamiko kaj krom se ŝi ankoraŭ sukcesos superruzi lin ŝia regado en la Insulo Koregoso finiĝis. Por gajni tempon, ŝi reiris al la ruĝkupola ĉambro kaj sidigis sin en sian tronon, antaŭ kiu grupiĝis la plorantaj sklavinoj el Pingario.

Ingo estis preninta manon de Zella kaj helpis ŝin surmeti la ŝuojn kiujn li estis doninta al ŝi interŝanĝe por siaj propraj. Ŝi trovis ilin tre komfortaj kaj ne sciis ke ŝi perdis ion per la transdono.

"Venu kun mi," tiam diris la knaba Princo, kaj li gvidis ŝin antaŭ Reĝinon Koron, kiu tiumomente riproĉadis Rinkitinkon. Al la estro Ingo diris:

"Donu al mi la ŝlosilojn kiuj malŝlosas tiujn ĉenojn, por ke mi liberigu ĉi tiujn povrulinojn."

"Ne faru tion!" kriegis Reĝino Koro.

"Se vi intermiksos vin, sinjorino," diris la knabo, "mi metos vin en karceron."

Per tio Rinkitinko sciis ke Ingo jam reakiris siajn Magiajn Perlojn kaj la malgranda dika Reĝo tiom ĝojegis ke li dancis kaj saltadis tra la tuta ĉambro. Sed la Reĝinon alarmis la minaco kaj la sklavestro, timante la konkerinton de Regoso, tremante transdonis la ŝlosilojn.

Ingo rapide deprenis ĉiujn ligilojn de la virinoj de sia lando kaj konsolis ilin, dirante al ili ke ili ne plu laboros sed baldaŭ retrovos sin en siaj hejmoj en Pingario. Post tio li ordonis ke la sklavestro iru venigi ĉiujn sklavigitajn infanojn, kaj konduki ilin al iliaj patrinoj. La viro obeis kaj foriris tuj por plenumi sian taskon, sed Reĝino Koro, fariĝante pli kaj pli maltrankvila, eksaltis de sia trono kaj antaŭ ol Ingo povis haltigi ŝin jam kuris tra la ĉambron kaj tra la pordon en la korton de la palaco, intencante eskapi. Rinkitinko sekvis ŝin, kurante laŭeble rapide.

Ĝuste tiumomente Bilbilo, sovaĝe fuĝante el Regoso, turnis sin tra la pordegojn de la korto, kaj ĉar li venis el unu direkto kaj Reĝino Koro iris laŭ la kontraŭa direkto, ili ekbatis unu la alian tre forte. La virino ekflugis tra la aero, trans la kapon de Bilbilo, kaj surteriĝis ekster la pordegoj, kie ŝia krono ruliĝis en fosaĵon kaj ŝi stariĝis, duonkonscie, kaj

daŭrigis sian fuĝon. Bilbilon ankaŭ iomete konfuzis la neanticipita renkonto, sed li daŭrigis sian kuron iom blinde kaj tial batis povan Rinkitinkon, kiu ĉasadis Reĝinon Koron. Ili ruliĝis unu super la alian plurfoje kaj post tio Rinkitinko sidiĝis kaj Bilbilo sidiĝis kaj ili rigardis unu la alian miregante.

"Bilbilo," diris la Reĝo, "vi mirigas min!"

"Via Moŝto," diris Bilbilo, "mi anticipis ke vi pli afable traktos min."

"Vi interrompis min," diris Rinkitinko.

"Estis multa spaco tiel ke vi ne bezonis uzi mian vojon," deklaris la kapro.

Ekvenis Ingo elkurante kaj li diris: "Kie estas la Reĝino?"

"Ŝi foriris," respondis Rinkitinko, "sed ŝi ne povas iri multe foren, ĉar ĉi tiu estas insulo. Tamen, mi trovis Bilbilon, kaj nia grupo denove unuiĝis. Vi retrovis viajn magiajn povojn, kaj denove ni mastras la situacion. Do ni estu dankemaj."

Dirinte tion, la bona malgranda Reĝo surpiediĝis kaj relamis en la tronĉambron por helpi konsoli la virinojn.

Baldaŭ la infanoj de Pingario, kiujn la sklavestro kungrupigis, estis enkondukitaj kaj redonitaj al siaj

patrinoj, kaj okazis granda ĝojado inter ili, estu certa pri tio.

"Sed kie estas Reĝino Gario, mia kara patrino?" demandis Ingo; sed la virinoj ne sciis kaj pasis iom longa tempo antaŭ ol la sklavestro memoris ke unu el la sklavinoj el Pingario estis metita en la reĝan laktejon. Eble tiu estis la virino kiun serĉas la knabo.

Ingo tuj ordonis ke li gvidu ilin al la buterdomo, sed kiam ili alvenis tien Reĝino Gario estis nenie en la loko, kvankam la knabo trovis silkan skarpon kiun li rekonis kiel skarpon kiun iam surportadis lia patrino. Post tio ili komencis traserĉi la tutan insulon Koregoson, sed ili nenie povis trovi la patrinon de Ingo.

Kiam ili reiris al la palaco de Reĝino Koro, Rinkitinko trovis ke la ponto el boatoj estis denove forprenita, apartigante ilin de Regoso, kaj pro tio ili suspektis ke Reĝino Koro fuĝis al la insulo de sia edzo kaj kunprenis Reĝinon Garion. Ingo multe perpleksis pri kion fari kaj reiris kun siaj amikoj al la palaco por diskuti la aferon.

Zella nun ploradis ĉar ŝi ne vendis sian mielon kaj ne povis reiri al siaj gepatroj sur la insulo Regoso, sed la knaba Princo konsolis ŝin kaj promesis ke ŝi

estos protektata ĝis ŝi povos reesti en sia hejmo. Rinkitinko trovis la monujon de Reĝino Koro, kiun pro manko de tempo ŝi ne kunprenis, kaj donis al Zella plurajn orajn pecojn por la mielo. Post tio Ingo ordonis al la servistoj en la palaco ke ili preparu festenon por ĉiuj virinoj kaj infanoj el Pingario kaj preparu por ili litojn en la granda palaco, kiu estis sufiĉe granda por loĝigi ilin ĉiujn.

Post tio la knabo kaj la kapro kaj Rinkitinko kaj Zella eniris privatan ĉambron por pripensi kion sekve fari.



# La Eskapo



## ĈAPITRO 14

“Nia eraro,” diris Rinkitinko, “konsistas el konkeri nur unu el ĉi tiuj ĝemelaj insuloj je unu fojo. Kiam ni konkeris Regoson, niaj malamikoj ĉiuj venis al Koregoso, kaj nun kiam ni konkeris Koregoson, la Reĝino fuĝis al Regoso. Kaj ĉiufoje ili forprenis la ponton el boatoj, por ke ni ne povu sekvi ilin.”

“Kio okazis al nia propra boato, en kiu ni venis el Pingario?” demandis Bilbilo.

“Ni lasis ĝin sur la bordo de Regoso,” respondis la

Princo, "sed mi demandas al mi ĉu eble ni povos rehavi ĝin."

"Kial ne demandi la Blankan Perlon?" sugestis Rinkitinko.

"Jen bona ideo," respondis la knabo, kaj tuj li tiris la Blankan Perlon el ĝia silka sako kaj tenis ĝin apud sia orelo. Farinte tion, li demandis: "Kiel mi povos rehavi nian boaton?"

La Voĉo de la Perlo respondis: "Iru al la suda ekstremo de la Insulo Koregoso, kaj kunfrapu viajn manojn trifoje kaj la boato venos al vi."

"Tre bone!" kriis Ingo, kaj post tio li turnis sin al siaj kompanoj kaj diris: "Ni povos rehavi nian boaton kiam ajn ni deziros; sed kion ni faru poste?"

"Portu min hejmen en ĝi!" pledis Zella.

"Venu kun mi al mia Urbo Gilgado," diris la Reĝo, "kie vi estos tre bonvenaj kaj rajtos resti por ĉiam."

"Ne," respondis Ingo, "mi devas savi miajn patron kaj patrinon, kaj ankaŭ mian popolon. Jam mi havas la virinojn kaj infanojn el Pingario, sed la viroj estas kun mia patro en la minoj de Regoso, kaj mia kara patrino estas forprenita de Reĝino Koro. Antaŭ ol ĉiuj estos savitaj mi ne povos konsenti foriri de ĉi tiuj insuloj."

"Tute prave!" kriis Bilbilo.

“Repensinte,” diris Rinkitinko, “mi konsentas kun vi. Se vi zorgos dormi en viaj ŝuoj, kaj neniam demetos ilin denove, mi kredas ke vi povos plenumi la taskon kiun vi entreprenis.”

Ili interkonsiliĝis dum longa tempo pri sia agmaniero kaj fine decidiĝis ke plej bone estos provi liberigi unue Reĝon Kitikuton, kaj kun li la virojn el Pingario. Tio provizos al ili armeon kiu povos helpi ilin kaj poste ili povos marŝi al Regoso kaj devigi Reĝinon Koron cedi la Reĝinon de Pingario. Zella diris al ili ke ili povos iri en sia boato laŭ la bordo de Regoso al loko kontraŭ la minoj, tiel ili povos eviti konflikon kun la batalistoj de Reĝo Goso.

Ĉar decidiĝis ke jen la plej bona agplano, ili decidis komenci la sekvan matenon, ĉar la nokto jam nun proksimiĝas. La servistoj estis plene okupataj per prizorgado de la virinoj kaj infanoj, do Zella entreprenis prepari manĝon por Ingo kaj Rinkitinko kaj si kaj baldaŭ preparis belan manĝon en la kuirejo de la palaco, ĉar ŝi estis bona kuiristineto kaj ofte helpis sian patrinon. La manĝon ŝi estigis en malgranda ĉambro kiu elrigardis al la ĝardenoj kaj Rinkitinko opiniis ke la plej bona parto ĝia estas la dolĉa mielo, kiun li ŝmiris sur la panbuletojn kiujn bakis Zella. Rilate al Bilbilo, li



vagis tra la tereno de la palaco kaj trovis herbon kiu fariĝis por li bona manĝo.

Dum la vespero Ingo parolis kun la virinoj kaj feliĉigis ilin, promesante ke baldaŭ li rekunigos ilin kun iliaj edzoj kiuj laboras en la minoj kaj resendos ilin al ilia propra insulo Pingario.

La sekvan matenon la knabo ellitiĝis sunleviĝe frue kaj trovis ke Zella jam preparis belan matenmanĝon. Kaj post la manĝo ili iris al la plej suda parto de la insulo, kiu ne estas tre for; Rinkitinko rajdis sur la dorso de Bilbilo kaj Ingo kaj Zella sekvis ilin, man-en-mane.

Kiam ili atingis la randon de la akvo la knabo antaŭeniris kaj kunfrapis siajn manojn trifoje, kiel instrukciis al li la Blanka Perlo. Kaj post kelkaj momentoj ili trovis tre for la nigran boaton kun la arĝenta tegaĵo, venantan rapide iliadirekten de la maro. Baldaŭ ĝi surteriĝis sur la plaĝon kaj ili ĉiuj eniris ĝin.

Al Zella plaĉegis la boato, kiu estis la plej bela kiun iam ŝi vidis, kaj la mirindaĵo ke ĝi venas al ili tra la akvo sen remisto iom timigis ŝin pri la feveturilo. Sed Ingo prenis la remilojn kaj komencis remi kaj tuj la boato ekiris rapide cele al Regoso. Ili ĉirkaŭiris la pinton de tiu insulo kie la urbo estis konstruita kaj

rimarkis ke la bordo surhavas vicon de soldatoj kiuj vidis ilian boaton sed aspektis ne esti decidintaj ĉu aŭ ne ĉasi ĝin. Verŝajne tio estis ĉar ili ne ricevis ordonojn pri kion fari, aŭ eble ili jam lernis timi la magiajn povojn de ĉi tiuj aventurantoj el Pingario kaj ne volis ataki ilin krom se ilia Reĝo ordonos.

La bordo de la okcidenta flanko de la Insulo Regoso estis tre neglata kaj Zella, kiu konis relative bone la situon de la minoj de la enlanda arbara pado, ne sciis decidi kiu el la montoj kiujn ili nun vidas de la maro estas tiu kie troviĝas la enirejo de la subteraj kavernoj. Unue ŝi kredis ke la ĝusta estas tiu ĉi pinto, kaj poste ŝi supozis ke estas tiu; do konsiderinda kvanto da tempo perdiĝis pro ŝia necerto.

Ili fine decidis alteriĝi kaj esplori la landon, por vidi kie ili estas, do Ingo direktis la boaton en malgrandan rokoplenan krekon kie ili ĉiuj elboatiĝis. Dum horo ili serĉis la padon sen trovi spuron de ĝi kaj nun Zella kredis ke ili jam iris tro for norden kaj devas reiri al alia monto kiu estas pli proksima al la urbo.

Denove ili eniris la boaton kaj sekvis la serpent-umantan bordon suden ĝis ili kredis esti atingintaj la ĝustan lokon. Jam, tamen, komencis senlumiĝi, ĉar la

tuta tago estis pasigita per serĉado je la enirejo de la minoj, kaj Zella avertis ilin ke estos pli sekure pasigi la nokton en la boato ol sur la tero, kie sovaĝaj bestoj sendube ĝenos ilin. Neniu el ili komprenis ĉi-momente kiom fatala tiu tago da serĉado estis por iliaj planoj kaj eble se Ingo komprenus kio okazas li surteriĝus kaj batalus ĉiujn sovaĝajn bestojn en la arbaro anstataŭ trankvile resti en la boato ĝis la mateno.

Tamen, nenion sciante pri la ruzaj planoj de Reĝino Koro kaj Reĝo Goso, ili ankris sian boaton en golfeto kaj gaje manĝis, trovinte abundajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn en la konservujoj de la boato. Vespere la steloj montriĝis en la ĉielo kaj kovris la ondojn ĉirkaŭ ilia boato per arĝenta kolono. Tute ĉirkaŭ ili estis belege kviete escepte de hazardaj muĝoj de besto sur la najbara bordo.

Ili interparolis trankvile pri siaj aventuroj kaj planoj pri la estonteco kaj Zella rakontis al ili sian simplan historion kaj pri kiel ŝia povra patro devas labori, bruligante braĝon por vendi ĝin por sufiĉa mono por subteni siajn edzinon kaj infanon. Nikoroĉjo eble estas la plej humila viro en la tuta Regoso, sed Zella deklaris lin bonulo, kaj honestulo,

kaj ne kulpis li ke lian landon regas tiel fia Reĝo.

Post tio Rinkitinko, por amuzi ilin, proponis kanti, kaj kvankam Bilbilo protestis laŭ sia malafabla maniero, pretendante ke la voĉo de lia mastro estas fendita kaj malagrabla, la malgrandan Reĝon kuraĝigis la aliaj kanti sian kanton, kaj tion li faris.

“Ned, ruĝharulo sed mortulo,
Kantu fidle-kum-fadle-kum-fi-do!
En batal’ kap’ iĝis nulo;
Kantu fidle-kum-fadle-kum-fi-do!
‘Ho ve, Ned!’, diris mi, ‘sur tulo
Kial perdis vi kapbulon?’
Kantu fidle-kum-fadle-kum-fi-do!

“Diris Ned: ‘Por la land’ mi sangis,’
Kantu fidle-kum-fadle-kum-fi-do!
‘Do mort’ en lit’ al mi mankis;’
Kantu fidle-kum-fadle-kum-fi-do!
‘Sed kial per fuĝ’ ne flankis
Kaj plu la kapon por mi dankis?’
Kantu fidle-kum-fadle-kum-fi-do!

“Al Ned mi diris—”

"Tamen ĉesu, Via Moŝto!" petegis Bilbilo. "Vi dolorigas mian kapon."

"Sed la kanto ne estas finita," respondis Rinkitinko, "kaj rilate al via kapdoloro, pensu pri povra Ned, kiu ne plu eĉ havis kapon!"

"Mi povas pensi nur pri via morna kantado," respondis Bilbilo kolere. "Kial vi ne elektis feliĉigan temon, anstataŭ paroli pri kiel mortulo perdis sian ruĝan kapbulon? Vere, Rinkitinko, vi mirigas min."

"Mi parkere lernis belegan kanton pri vivanto," diris la Reĝo.

"Do ne kantu ĝin," petegis Bilbilo.

Zellan kaj mirigis kaj malfeliĉigis la senrespektaj vortoj de la kapro, ĉar ŝi vere ĝuis la kantadon de Rinkitinko kaj al ŝi estis instruita deca respekto al Reĝoj kaj altaŭtoritatuloj. Sed ĉar nun malfruiĝis ili decidis endormiĝi, por povi frue la sekvan matenon vekiĝi, do ili ĉiuj kuŝiĝis sur la planko de la granda boato kaj kovris sin per lankovriloj kiujn ili trovis gardataj sub la seĝoj precize por tiaj eventoj. Ili ne bezonis longan tempon por endormiĝi kaj ne vekiĝis antaŭ la tagiĝo.

Post hasta matenmanĝo, ĉar Ingo fervoris liberigi



sian patron, la knabo remis la boaton al la tero kaj ili ĉiuj surteriĝis kaj komencis serĉi la padon. Zella trovis ĝin dum la sekva duonhoro kaj deklaris ke ili sendube estas tre proksimaj al la enirejo de la minoj; do ili sekvis la padon norden, Ingo iris la unua, kaj Zella sekvis lin, dum Rinkitinko estis malantaŭ ili rajdante sur la dorso de Bilbilo.

Post nelonge ili vidis grandan muron el roko turanta antaŭ ili, en kiu estas malalta arkhava enirejo, kaj ambaŭflanke de tiu enirejo staras gardisto, armita per glavo kaj lanco. La gardistoj de la minoj ne estis tiom ferocaj kiel la batalistoj de Reĝo Goso; ilia tasko estis laborigi la sklavojn pri siaj taskoj kaj gardi ilin por ke ili ne eskapu; sed ili estis tiom kruelaj kiom deziris ilia kruela mastro, kaj egale kovardaj kiel kruelaj.

Ingo marŝis al la du viroj ĉe la enirejo kaj diris:

"Ĉu ĉi tiu aperturo kondukas al la minoj de Reĝo Goso?"

"Jes," respondis unu el la gardistoj, "sed estas malpermesate ke iu kiu jam eniris eliros."

"Tamen," diris la knabo, "ni intencas eniri kaj ni elvenos kiam ajn ni deziros. Mi estas la Princo de

Pingario, kaj mi venis liberigi mian popolon, kiun sklavigis Reĝo Goso."

Nu kiam la du gardistoj aŭdis tiun parolon ili rigardis unu la alian kaj ridis, kaj unu el ili diris: "La Reĝo pravis, ĉar li diris ke la knabo verŝajne venos ĉi tien kaj ke li provos liberigi sian popolon. Kaj ankaŭ la Reĝo ordonis ke ni restigu la Princeton en la minoj, kaj devigu lin labori, kune kun liaj kompanoj."

"Do ni obeu la Reĝon," respondis la alia viro.

Ingon surprizis aŭdi tion, kaj li demandis:

"Kiam Reĝo Goso donis al vi tiun ordonon?"

"Lia Moŝto mem estis ĉi tie la pasintan nokton," respondis la viro, "kaj li reforiris antaŭ nur unu horo. Li suspektis ke vi venas ĉi tien kaj diris ke ni kaptu vin se ni povos."

Tiu raporto tre malkvietigis la knabon, ne rilate al si sed rilate al sia patro, ĉar li timis ke la Reĝo fiagas iel. Do li rapidis eniri la minojn kaj la gardistoj faris nenion por kontraŭi lin aŭ liajn kompanojn, ĉar la ordono al ili diris ke ili permesu lin eniri sed ne eliri.

La malgranda grupo de aventurantoj pasis tra longa roka koridoro kaj atingis nealtan, larĝan kavernon kie ili trovis dekduon da gardistoj kaj cent

sklavojn, ĉi tiuj laboregadis per pioĉoj kaj ŝoveloj fosante oron, dum la gardistoj staras estrante ilin per longaj vipoj.

Ingo trovis multajn el la viroj el Pingario inter tiuj sklavoj, sed Reĝo Kitikuto ne estis en tiu kaverno; do ili trapasis ĝin kaj eniris alian koridoron kondukantan al dua kaverno. Ankaŭ tie centoj da viroj laboradis, sed la knabo ne trovis sian patron inter ili, do ili pluiris al tria kaverno.

La koridoroj ĉiuj deklivetis malsupren, tiel ke ju pli ili iris des pli malsupren en la teron ili descendis, kaj nun ili trovis la aeron varmega kaj prema kaj malfacile spirebla. Flamantaj torĉoj estis metitaj en la murojn por doni lumon al la laborantoj, kaj tiuj aldonis al la superprema varmego.

La tria kaj plej suba kaverno estis la lasta en la minoj, kaj tie estis multaj dekoj da sklavoj kaj multaj gardistoj por laborigi ilin. Ĝis nun, neniu el la gardistoj atentis la grupon de Ingo, sed permesis ke ili plumarŝu laŭdezire, kaj kvankam la sklavoj scivole rigardetis la knabon kaj la knabinon kaj viron kaj kapron, ili ne aŭdacis diri ion. Sed nun la knabo paŝis al kelkaj el la viroj el Pingario kaj petis informon pri sia patro, dirante al ili ke ili ne timu la



gardistojn ĉar li protektos ilin kontraŭ la vipoj.

Tiam li informiĝis ke Reĝo Kitikuto ja vere laboris en ĉi tiu kaverno mem ĝis la antaŭa vespero, kiam Reĝo Goso venis kaj forkondukis lin—ankoraŭ ŝarĝitan per ĉenoj.

"Ŝajnas al mi," diris Reĝo Rinkitinko, kiam li aŭdis tiun raporton, "ke Goso forkondukis vian patron al Regoso, por ke ni ne savu lin. Li eble kaŝos povran Kitikuton en karcero, kie ni ne povos trovi lin."

"Eble vi pravas," respondis la knabo, "sed mi firme intencas trovi lin, negrave kie li estas."

Ingo parolis firme kaj kuraĝe, sed lin multe desapontis la trovo ke Reĝo Goso estis jam antaŭ ol li ĉe la minoj kaj forportis lian patron. Tamen, li penis ne senti malkuraĝon, kredante ke li fine sukcesos, malgraŭ ĉia oponado. Turninte sin al la gardistoj, li diris:

"Forprenu la ĉenojn de ĉi tiuj sklavoj kaj liberigu ilin."

La gardistoj ridis pro tiu ordono, kaj unu el ili alportis manplenon da ĉenoj, dirante: "Lia Moŝto ordonis ke ni sklavigu ankaŭ vin, ĉar vi neniam reiros el ĉi tiuj kavernoj."



# Ĉapitro Dek Kvar

Tiam li provis meti la ĉenojn sur Ingon, sed la knabo indigne prenis ilin kaj disrompis ilin facile kiel katunajn ŝnuretojn. Kiam dekduo aŭ pli da gardistoj ekkuris kapti lin, la Princo svingis la finaĵon de la ĉeno kvazaŭ vipon kaj pelis ilin en angulon, kie ili kaŭriĝis kaj petegis kompaton.

Rakontoj pri la miriga forto de la knaba Princo jam disvastiĝis en la minojn de Regoso, kaj kvankam Reĝo Goso diris al ili ke de Ingo jam estis forprenita ĉiu lia magia povo, la gardistoj nun vidis ke tio ne estas vera, do ili opiniis ke estas saĝe ne provi kontraŭi lin.

La ĉenoj de la sklavoj estis ĉiuj nititaj firme al iliaj maleoloj kaj pojnoj, sed Ingo rompis la ŝtalajn ligilojn per siaj manoj kaj liberigis la povrulojn—ne nur tiujn el Pingario sed ĉiujn kaptitajn dum la multaj militoj kaj ŝtelekspedicioj de Reĝo Goso. Ili estis tre dankemaj, kiel vi povas supozi, kaj akceptis subteni princon Ingon negrave kian agadon li ordonos.

Li gvidis ilin al la meza kaverno, kie ĉiuj gardistoj kaj intendantoj fuĝis terurite pro lia proksimiĝo, kaj baldaŭ li disrompis la ĉenojn de la sklavoj laborintaj en tiu parto de la minoj. Tie ili proksimiĝis al la

unua kaverno kaj liberigis ĉiujn tri.

La sklavojn traktis tiel kruele la servistoj de Reĝo Goso ke ili fervoris ĉasi kaj mortigi ilin, venĝe; sed Ingo retenis ilin kaj grupigis ilin, kaj ĉiu grupo ricevis propran ĉefon. Post tio li kunvokis la ĉefojn kaj ordonis ke ili marŝu bonorde laŭ la pado al la Urbo Regoso, kie li renkontos ilin kaj ordonos al ili kion sekve fari.

Ili volonte konsentis, kaj, arminte sin per feraj stangoj kaj pioĉhakiloj kiujn ili alportis el la minoj, la sklavoj komencis sian marŝon al la urbo.

Unue Zella volis postresti, por povi marŝi al sia propra hejmo, sed nek Rinkitinko nek Ingo opiniis ke ŝi estus sekura vagante sola tra la arbaro, do ili instigis ŝin reiri kun ili al la urbo.

La knabo surterigis sian boaton ĉifoje ĉe la sama loko kiel kiam li unue alteriĝis ĉe Regoso, kaj, kvankam multaj el la batalistoj staris sur la bordo kaj antaŭ la muroj de la urbo, neniu el ili provis iel ajn ĝeni la knabon. Efektive, ili aspektis maltrankvilaj kaj malkvietaj, kaj kiam Ingo renkontis Kapitanon Buzumon li demandis ĉu io okazis dum lia foresto.

“Multo okazis,” respondis Buzubo. “Niaj Reĝo kaj

Reĝino forkuris kaj lasis nin, kaj ni ne scias kion fari."

"Forkuris!" kriis Ingo. "Kien ili iris?"

"Kiu scias?" diris la viro, gestante malgaje per sia kapo. "Ili foriris antaŭ kelkaj horoj, en boato kun kvardek remistoj, kaj ili kunprenis la Reĝon kaj Reĝinon de Pingario!"



# La Fuĝo de la Regantoj



## ĈAPITRO 15

Nu ŝajnas ke kiam Reĝino Koro fuĝis el sia insulo al Regoso, ŝi estis sufiĉe lerta, kvankam multe timanta, halti ĉe la reĝa laktejo, kiu estis proksima al la ponto, kaj treni povran Reĝinon Garion el la laktodomo kaj transen kun si al Regoso. La batalistoj de Reĝo Goso neniam antaŭe vidis la teruran Reĝinon Koron tima, kaj tial kiam ŝi venis kurante trans la ponton el boatoj, trenante la Reĝinon de Pingario per unu brako, la efiko de la timego de la virino estis terurigi la

atendantajn batalistojn.

"Ek!" kriis Koro. "Detruu la ponton, alie ni pereos."

Dum la viroj fortiris la ponton el boatoj la Reĝino kuris al la palaco de Goso, kie ŝi renkontis sian edzon.

"Tiu knabo estas sorĉisto!" ŝi elspiregis. "Ne eblas kontraŭstari lin."

"Ho, ĉu fine vi trovis lian magion?" respondis Goso, ridante al ŝia vizaĝo. "Kiu, nun, do estas la kovardo?"

"Ne ridu!" kriis Reĝino Koro. "Nenio komika okazas. Ambaŭ niaj insuloj estas en la vero konkeritaj, jam ĉi-minute. Kion ni faru, Goso?"

"Envenu," li diris, serioziĝante, "kaj ni diskutu."

Do ili eniris ĉambron de la palaco kaj diskutis longe kaj tre serioze.

"La knabo intencas liberigi siajn patron kaj patrinon, kaj la tutan popolon el Pingario, kaj reporti ilin al ilia insulo," diris Koro. "Li eble ankaŭ detruos niajn palacojn kaj sklavigos nin. Mi vidas nur unu metodon, Goso, por malebligi ke li faros ĉion ĉi, kaj kion ajn alian li deziras."

"Kiu metodo estas?" demandis Reĝo Goso.

"Ni devas forkonduki la gepatrojn el ĉi tie kiel eble plej rapide. Mi havas kun mi la Reĝinon de Pingario, kaj vi kuru al la minoj kaj elprenu la Reĝon. Post tio ni forkondukos ilin en boato kaj kaŝos ilin kie la knabo ne povos trovi ilin, malgraŭ lia multa magio. Ni uzos la Reĝon kaj Reĝinon de Pingario kiel ostaĝojn, kaj sendos mesaĝon al la knaba sorĉisto ke se li ne foriros de niaj insuloj kaj permesos nin regi ilin neĝenate, laŭ nia propra maniero, ni mortigos liajn patron kaj patrinon. Ankaŭ ni diros ke nur dum li lasos nin neĝenataj restos sekuraj liaj gepatroj, kvankam ankoraŭ sekure kaŝitaj. Mi kredas, Goso, ke tiumaniere ni povos devigi Princon Ingon obei nin, ĉar ŝajne li multe amas siajn gepatrojn."

"Ne malbona ideo," diris Goso, penseme; "sed kie ni povos kaŝi la Reĝon kaj Reĝinon, tiel ke la knabo ne povos trovi ilin?"

"En la lando de la Reĝo de la Knomoj, sur la ĉeftero tre sude," ŝi respondis. "La Knomoj estas amikoj niaj, kaj ili posedas magiajn povojn kiuj ebligos al ili protekti la kaptitojn kontraŭ troviĝo. Se ni povos sukcese konduki la Reĝon kaj Reĝinon de Pingario al la Regno de la Knomoj antaŭ ol la



knabo scios kion ni faras, mi estas certa ke nia komploto sukcesos."

Goso multe pripensis la planon dum la sekvaj kvin minutoj, kaj ju pli li pripensis ĝin des pli lerta kaj racia ĝi ŝajnis. Do li konsentis agi laŭ la sugesto de Reĝino Koro kaj tuj li forrapidis al la minoj, kie li alvenis antaŭ ol Princo Ingo. La sekvan matenon li rekondukis Reĝon Kitikuton al Regoso.

Dum Goso estis for, Reĝino Koro okupis sin per preparado de granda rapida boato por la veturo. Ŝi metis en ĝin plurajn sakojn da oro kaj juveloj per kiuj ŝi subaĉetos la knomojn, kaj elektis kvardek el la plej fortaj remistoj en Regoso por remi la boaton. Tuj kiam Reĝo Goso revenis kun sia reĝa kaptito ĉio estis preta por foriro. Ili rapide eniris la boaton kun siaj du gravaj kaptitoj kaj sen ia ajn ekspliko al iu el sia popolo kaj ordonis ke la remistoj komencu, kaj baldaŭ ili estis nevideble for sur la larĝa surfaco de la Nonesta Oceano.

Ingo venis al la urbo kelkajn horojn poste kaj lin multe ĉagrenis la sciiĝo ke liaj patroj kaj patrino estis kaŝe forprenitaj for de la insuloj.

"Mi sekvos ilin, kompreneble," diris la knabo al

Rinkitinko, “kaj se mi ne povos atingi ilin sur la oceano mi traserĉos la tutan mondon ĝis trovi ilin. Sed antaŭ ol foriri el ĉi tie mi devas aranĝi resendi nian popolon al Pingario.”



# Nikoroĉjo Rifuzas Kronon



ĈAPITRO 16

Preskaŭ la unuaj personoj vidataj de Zella kiam ŝi surteriĝis el la arĝente tegita boato ĉe Regoso estis ŝiaj patro kaj patrino. Nikoroĉjon kaj lian edzinon multe maltrankviligis la nereveno de sia filineto el Koregoso, do ili eliris por trovi kio okazis al ŝi. Kiam ili atingis la Urbon Regoson, tiun matenon mem, ilin mirigis aŭdi informojn pri la multaj strangaj eventoj okazintaj; tamen, ilin konsolis la informo ke oni vidis Zellan en la boato de Princo Ingo, kiu iris norden.

Poste, dum ili demandis al si kion povas signifi tio, la arĝente tegita boato reaperis, kun ilia filino en si, kaj ili kuris al la bordo por bonvenigi ŝin kaj multe ĝoje kisi ŝin.

Ingo invitis la du bonulojn al la palaco de Reĝo Goso, kie li konsiliĝis kun ili, ankaŭ kun Rinkitinko kaj Bilbilo.

"Nun post la forkuro de la Reĝo kaj Reĝino de Regoso kaj Koregoso," li diris, "estas neniu reganto por ĉi tiuj insuloj. Do mi devas nomumi novan reganton, kaj ĉar Nikoroĉjo, la patro de Zella, estas honesta kaj fidinda persono, mi nomumos lin la Reĝo de la Ĝemelaj Insuloj."

"Min?" kriis Nikoroĉjo, mirigita pro tiu parolo. "Mi petegas Vian Moŝton, sur miaj genuoj, ne tiele kruele trakti min, ne faru el mi Reĝon!"

"Kial ne?" demandis Rinkitinko. "Mi estas Reĝo, kaj mi konas la senton. Mi certigas al vi, bona Nikoroĉjo, ke mi multe ĝuas mian altan rangon, kvankam juveloplena krono ja estas iom peza surkapaĵo dum la varmega vetero."

"Por vi, nobla sinjoro, estas malsimile," diris Nikoroĉjo, "ĉar vi estas tre for de via regno kaj ĝiaj ĉagrenoj kaj ĝenoj kaj povas fari kion ajn vi volas.

Sed resti en Regoso, kiel Reĝo de ĉi tiuj ferocaj kaj senordaj batalistoj, signifus vivi konstante maltrankvile kaj en ĉiama danĝero, kaj plej verŝajne ili murdus min jam antaŭ la forpaso de sola monato. Ĉar mi faris nenian damaĝon al iu ajn kaj mi penis esti bona kaj justa persono, mi ne opinias ke mi devus esti kondamnita al tia terura fato."

"Tute bone," respondis Ingo, "ni ne plu parolos pri via reĝiĝo. Mi nur volis riĉigi kaj prosperigi vin, laŭ mia promeso al Zella."

"Bonvolu forgesi tiun promeson," petegis la braĝo-bruligisto, tre serioze; "jam de multaj jaroj mi estas sekura kontraŭ molestado, ĉar mi estas malriĉa kaj posedas nenion kion povus envii alia persono. Sed se vi riĉigos kaj prosperigos min mi tuj fariĝos predoto de ŝtelistoj kaj perfortistoj kaj verŝajne perdos mian vivon penante protekti mian riĉon."

Ingo rigardis la viron surprizite.

"Kion, do, mi povos fari plaĉe al vi?" li demandis.

"Nenion pli ol permesi ke mi iru al mia povra kabano," diris Nikoroĉjo.

"Eble," komentis Reĝo Rinkitinko, "la braĝo-bruligisto havas pli da saĝo kaŝita en tiu malmola kapo lia ol ni supozis pri li. Sed ni uzu tiun saĝon,



nune, por akiri konsilon pri kion fari dum ĉi tiu krizo.”

“Kion vi nomas mia saĝo,” diris Nikoroĉjo, “estas nur simpla bonracio. Mi rimarkis ke kelkaj homoj riĉiĝas, kaj estas malestimataj de kelkaj kaj rabataj de aliaj. Aliaj homoj famiĝas, kaj estas mokataj kaj priridataj de siaj kunuloj. Sed la malriĉa humilulo kiu vivas nerimarkate kaj nekonate eskapas el ĉiuj tiuj ĝenoj kaj estas la sola persono kiu povas vere ĝui la vivon.”

“Se mi havus manon, anstataŭ fenditan hufon, mi volonte premus vian manon, Nikoroĉjo,” diris Bilbilo la kapro. “Sed la malriĉulo nepre ne havu kruelan mastron, alie li ja suferus.”

Dum la interkonsiliĝo ili trovis, efektive, ke la konsilo de la braĝobruligisto estas kaj sagaca kaj bonsenca, kaj ili multe profitis per liaj vortoj.

Ingo donis al Kapitano Buzubo la rajton komandi la batalistojn kaj devigis lin promesi kvietigi kaj bonordigi siajn soldatojn—se eble. Post tio la knabo permesis ĉiujn ekssklavojn de Reĝo Goso, escepte de tiuj venintaj el Pingario, elekti kiujn boatojn ili bezonas kaj stoki ilin per provizaĵoj kaj forremi al siaj propraj landoj. Kiam ili estis foririntaj, elkore

dankinte kaj multe beninte la knaban Princon kiu liberigis ilin, Ingo faris preparojn por sendi sian propran popolon hejmen, kie, laŭ lia ordono, ili rekonstruu siajn domojn kaj poste starigu novan reĝan palacon. Ili post tio atendu pacience la venon de Reĝo Kitikuto aŭ de Princo Ingo.

"Min plej maltrankviligas," diris la knabo al siaj amikoj, "la demando kiun nomumi kiel estron de tiu laboro restarigi Pingarion laŭ ĝia antaŭa stato. Ĉiuj miaj homoj estas perlofiŝistoj, kaj kvankam volontaj kaj honestaj, ili ne havas talenton estri la laboradon de aliaj personoj."

Dum oni faris la preparojn por foriro, Nikoroĉjo proponis sin por estri la homojn el Pingario, kaj faris tion tre kompetente. Ĉar el la insulo estis ŝtelitaj ĝiaj tutaj valoraj meblaro kaj drapiraĵaro kaj ĝiaj riĉaj tukoj kaj pentraĵoj kaj statuaro k.c., ankaŭ la oro kaj arĝento kaj ornamaĵaro, Ingo opiniis ke estas tute juste ke la ŝtelintoj donu anstataŭaĵojn. Do li direktis sian popolon traserĉi la magazenojn de Reĝo Goso kaj repreni ĉiujn siajn posedaĵojn kaj meblaĵojn troveblajn. Ankaŭ li ordonis al ili ke ili prenu tiom ajn pli, kiom ili bezonos por komfortigi siajn novajn hejmojn, tiel ke multaj boatoj estis plene ŝarĝitaj per

varoj kiuj ebligos ke la popolo redonu al Pingario ĝian antaŭan komforton.

Por la nova palaco de sia patro la knabo rabis el la palacoj de kaj Reĝino Koro kaj Reĝo Goso, forsendante kun sia popolo suficâjn varojn por estigi la novan loĝejon de Reĝo Kitikuto egale bele ornamita kaj meblita kiel tiu kiun la senkompataj invadintoj el Regoso detruis.

La amaso da boatoj estis granda, forvelante dum hela, sunoplena mateno veture al Pingario, portante ĉiujn virojn, virinojn kaj infanojn kaj ĉiujn varojn por repretigi iliajn hemojn. Dum li rigardis la boataron foriri, Princo Ingo sentis ke li jam sukcese plenumis parton de sia misio, sed li ĵuris neniam mem reiri al Pingario antaŭ ol povi kunpreni siajn patron kaj patrinon tien; krom se, efektive, Reĝo Goso fie detruis liajn amatajn gepatrojn, kiuokaze Ingo fariĝus la Reĝo de Pingario kaj li devus iri al sia popolo kaj regi ĝin.

Dum la lastaj boatoj pretiĝis veli al Pingario, Nikoroĉjo, kiu multe servis pri ilia pretigado, venis al Ingo penseme kaj diris:

"Via Moŝto, mia edzino kaj mia filino urĝas min foriri de Regoso kaj ekloĝi en via insulo, en nova hejmo. Laŭ tio kion diras via popolo al mi, Pingario



estas pli bona loĝejo ol Regoso, kaj ne ekzistas tie kruelaj batalistoj nek sovaĝaj bestoj kiuj konstante timigas pri la sekureco de la amatoj. Tial, mi venis por peti permeson iri kun mia familio en unu el tiuj boatoj.”

Al Ingo multe plaĉis tiu propono kaj li ne nur donis al Nikoroĉjo permeson iri al Pingario por loĝi tie, sed li instrukciis ke li kunprenu sufiĉajn varojn por komforte mebligi sian novan hejmon. Aldone al tio, li nomumis Nikoroĉjon ĝenerala intendanto de la konstruaĵoj kaj de la perlofiŝejoj, ĝis lia patro aŭ li mem alvenos, kaj la popolo aprobis tiun ordonon ĉar ili amis Nikoroĉjon kaj sciis ke li estas justa kaj honesta.

Tuj kiam la lasta boato de la granda floto malaperis el la vidkapablo de la personoj restantaj en Regoso, Ingo kaj Rinkitinko preparis mem foriri de la insulo. La knabo fervoris atingi la boaton de Reĝo Goso, se eble, kaj Rinkitinko tute ne deziris resti en Regoso.

Buzubo kaj la batalistoj staris silente sur la bordo kaj rigardis dum la nigra boato kun sia arĝenta tegaĵo foriris, kaj mi estas certa ke ili tiom ĝojis pro la foriro de iliaj nebonvenaj vizitintoj kiom Ingo kaj Rinkitinko kaj Bilbilo ĝojis foriri.

# Ĉapitro Dek Ses

La knabo demandis al la Blanka Perlo kiun direkton elektis la boato de Reĝo Goso kaj konforme li sekvis ĝin, remante forte kaj senpaŭze dum ok tagoj tute sen laciĝi. Sed, kvankam la nigra boato moviĝis tre rapide, ĝi malsukcesis atingi la barĝon kiun remas la kvardek elektitaj remistoj de Reĝino Koro.



# La Reĝo de la Knomoj



## ĈAPITRO 17

La Regno de la Knomoj ne bordas la Nonestan Oceanon, de kiu ĝi estas apartigita de la Regno de Rinkitinko kaj la lando de la Raduloj, kiu estas parto de la Lando Ev. La lando de Rinkitinko estas apartigita disde la lando de la Knomoj de vico de altaj kaj krutaj montoj, de kiuj ĝi etendiĝas ĝis la maro. La Lando de la Raduloj estas sabla dezertaĵo kiu estas unuflanke malferma al la Nonesta Oceano kaj aliflanke ne havas barieron por apartigi ĝin de la Lando de la Knomoj, tial sur

la bordon de la Raduloj Reĝo Goso surteriĝis—en loko tute dizertita de ĉiuj kuriozaj loĝantoj de tiu lando.

La Lando de la Knomoj estas tre vasta, kaj estas apartigita disde la Lando Oz, ĉe sia orienta bordo, nur de Mortiga Dezerto kiun ne povas transiri mortipovuloj, krom se ilin helpas la feoj aŭ magio.

La Knomoj estas grandnombra kaj petolema popolo, loĝanta en subteraj kavernoj tre larĝaj, interkonektitaj per arkaĵoj kaj koridoroj. La vorto "knomo" signifas "kiu konas", kaj tiuj uloj estas tiel nomitaj ĉar ili scias kie troviĝas la kaŝejoj de la tutaj oro kaj arĝento kaj valoregaj ŝtonoj en la tero—tiun scion kunscias neniuj aliaj vivantoj. La Knomoj estas multe okupataj personoj, kiuj konstante elfosas oron el unu loko kaj portas ĝin al alia loko, kie ili sekrete enterigas ĝin, kaj eble jen la kialo ke nur ili mem scias kie trovi ĝin. La knomojn regis, dum la tempo pri kiu mi skribas, Reĝo nomata Kalikoto.

Reĝo Goso anticipis esti ĉasata de Ingo en lia magia boato, do li laŭeble plej rapidis, urĝante siajn kvardek remistojn plej forte labori nokte kaj tage. Ĝojige al li li ne estis atingita, sed surteriĝis sur la sabla plaĝo de la Raduloj la matenon de la oka tago.

La kvardek remistoj lasiĝis kun la boato, dum Reĝino Koro kaj Reĝo Goso, kun siaj reĝaj kaptitoj, kiuj estis ankoraŭ ĉenitaj, komencis la veturon al la Reĝo de la Knomoj.

Post nelonge ili pasis la sablojn kaj atingis la rokan landon apartenantan al la knomoj, sed ili ankoraŭ estis longan distancon for de la enirejo al la subteraj kavernoj en kiuj loĝas la Reĝo de la Knomoj. Estis obskureta pado serpentumanta inter ŝtonoj kaj rokegoj, trans kiujn la marŝado estis tre malfacila, precipe ĉar la pado kondukis trans montetojn kiuj estis nur malgrandaj montoj, kaj poste laŭ krutaj kaj abruptaj deklivoj kie ĉia mispaŝo povus signifi rompitan kruron. Tial nur dum la dua tago de sia veturo ili grimpis duonvoje sur severa monto kaj trovis sin ĉe la enirejo de la kavernoj de la Reĝo de la Knomoj.

Je ilia alveno, la enirejo aspektis libera kaj negardata, sed Goso kaj Koro jam antaŭe estis tie, kaj ili estis tro saĝaj por provi eniri sen anonci sin, ĉar la koridoro al la kavernoj estis plena de kaptiloj kaj faliloj. Do Reĝo Goso staris senmove kaj kriis, kaj tuj ilin ekĉirkaŭis grupo de malrektaj knomoj, kiuj kvazaŭ saltis el la tero.


50.000

# Ĉapitro Dek Sep

Unu el ili havis tre longajn orelojn kaj nomiĝis La Longorela Aŭdanto. Li diris: "Mi aŭdis vin venantaj frue ĉimatene."

Alia havis okulojn kiuj rigardas diversdirekte je la sama tempo kaj estis kurioze helaj kaj penetremaj. Li povis transrigardi monteton aŭ ĉirkaŭ angulon kaj nomiĝis La Vidisto. Diris li: "Mi vidis vin venantaj hieraŭ."

"Sekve," diris Reĝo Goso, "eble Reĝo Kalikoto ekspektas nin."

"Estas vere," respondis alia Knomo, ĉirkaŭ kies kolo estis ora kolumo kaj kiu portis aron da oraj ŝlosiloj. "La potenca Reĝo de la Knomoj atendas vin, kaj ordonas ke vi sekvu min al lia ĉeestejo."

Dirinte tion li gvidis en la kavernojn, kaj Goso kaj Koro sekvis, kuntrenante siajn lacajn kaptitojn, ĉar povra Reĝo Kitikuto kaj lia milda Reĝino devis porti, dum la tuta teda veturo, la sakojn da oro kaj juveloj kiuj estos uzitaj por subaĉeti la Reĝon de la Knomoj por ke li akceptu ilin kiel sklavojn.

Tra pluraj longaj koridoroj la gvidisto kondukis ilin kaj fine ili eniris malgrandan kavernon kiu estis bele ornamita kaj inkrustita per raraj juveloj kiuj flagris de ĉiu parto de la muro, planko kaj plafono.

Tiu estis atendejo por vizitantoj, kaj tie ilia gvidanto lasis ilin dum li iris informi Reĝon Kalikoton pri ilia alveno.

Post nelonge ili estis eskortitaj en grandan kupol-havan ĉambron, ĉizitan el la solida roko kaj tiom grandiozan ke ili ĉiuj—la Reĝo kaj Reĝino de Pingario kaj la Reĝo kaj la Reĝino de Regoso kaj Koregoso—enspiregis pro miro kaj kiel eble plej larĝe malfermis siajn okulojn.

En ebura trono sidis malgranda ronda viro kiu havis pintan barbon kaj hararon kiu leviĝis kaj fariĝis alta buklo sur la supro de lia kapo. Li estis vestita per silkaj roboj, riĉe broditaj, kiuj havis larĝajn butonojn el tajlitaj rubioj. Sur lia kapo estis diamanta krono kaj en sia mano li tenis oran sceptron kun granda juvelita globo ĉe unu finaĵo. Tiu estis Kalikoto, la Reĝo kaj reganto de ĉiuj knomoj. Li gestis per sia kapo sufiĉe afable al siaj vizitantoj kaj diris per gaja voĉo:

"Nu, Viaj Moŝtoj, kion mi povas fari por vi?"

"Mia deziro," respondis Reĝo Goso, respektoplene, "estas meti en vian zorgon du kaptitojn, kiujn vi nun vidas antaŭ vi. Ili devas esti zorge gardataj, por malebligi ilian eskapon, ĉar ili

havas la lertecon de vulpoj kaj ne estas fideblaj. Kompense por la komplezo kiun mi petas de vi, mi alportis al Via Moŝto valorajn donacojn de oro kaj valoregaj gemoj."

"Tre bone," diris Reĝo Kalikoto, kapjesante aprobon, ĉar kiel ĉiuj knomoj li amis trezorojn de oro kaj juveloj. "Sed kiuj estas la kaptitoj kiujn vi venigis ĉi tien, kaj kial vi metas ilin je mia dispono anstataŭ mem gardi ilin? Ili aspektas sufiĉe mildaj, mi certas."

"La kaptitoj," respondis Reĝo Goso, "estas la Reĝo kaj Reĝino de Pingario, malgranda insulo norde de ĉi tie. Ili estas tre fiintencaj personoj kaj venis al niaj insuloj Regoso kaj Koregoso por konkeri ilin kaj mortigi nian povran popolon. Ankaŭ ili intencis rabi de ni ĉiujn niajn riĉaĵojn, sed bonfortune ni povis venki kaj kapti ilin. Tamen ili havas filon kiu estas terura sorĉisto kaj kiu per magia arto penas trovi ĉi tiujn fiajn Reĝon kaj Reĝinon de Pingario, kaj liberigi ilin, por ke ili plu faru sian fiagadon. Tial, ĉar ni ne havas magion por defendi nin, ni alvenigis la kaptitojn al vi por ke vi sekure gardu ilin."

"Via Moŝto," ekparolis Reĝo Kitikuto, parolante al la Reĝo de la Knomoj tre indigne, "ne kredu tiun

rakonton, mi petegas vin. La tuto estas mensogo!"

"Mi scias tion," diris Kalikoto. "Tamen mi opinias ĝin lerta mensogo, ĉar ĝi estas teksita tute sen fadeno da vero. Tamen, tio ne estas mia afero. La fakto restas ke mia bona amiko Reĝo Goso deziras meti vin en miajn subterajn kavernojn, por ke vi ne povu eskapi. Kaj kial mi ne favoru lin per ĉi tiu komplezeto? Goso estas potenca Reĝo kaj potenca batalisto, sed via insulo Pingario estas dizerta kaj via popolo estas dissendita. En mia koro, Reĝo Kitikuto, mi simpatias kun vi, sed laŭ negocpolitiko ni la potencaj Reĝoj devas kune stari kaj treti la malfortajn sub niajn piedojn."

Reĝon Kitikuton surprizis trovi la Reĝon de la Knomoj tiel klarparola kaj tiel bone informita, kaj li provis argumenti ke li kaj lia milda edzino ne meritas sian kruelan faton kaj ke estus pli saĝe ke Kalikoto alianciĝu kun ili ol kun la fia Reĝo de Regoso. Sed Kalikoto nur skuis sian kapon kaj ridetis, dirante:

"La fakto ke vi estas kaptito, mia povra Kitikuto, estas indiko ke vi estas malpli forta ol Reĝo Goso, kaj mi preferas trakti kun la fortuloj. Flanke," li pludiris, turninte sin al la Reĝo de Regoso, "ĉu ĉi tiuj kaptitoj



iel rilatas al la Lando Oz?"

"Kial vi demandas?" diris Goso.

"Ĉar mi ne nepre ne ofendu la Ozanojn," estis la respondo. "Mi estas tre potenca, kiel vi scias, sed Ozma de Oz estas multe pli potenca ol mi; tial, se ĉi tiuj Reĝo kaj Reĝino de Pingario troviĝus protektataj de Ozma, mi neniel pritraktus ilin."

"Mi certigas al Via Moŝto ke la kaptitoj neniel rilatas al la Ozanoj," Goso hastis diri. Kaj Kitikuto, demandite, agnoskis ke tio estas vera.

"Sed kio pri tiu sorĉisto kiun vi menciis?" demandis la Reĝo de la Knomoj.

"Ho, li estas nur knabo; sed li estas tre feroca kaj obstina kaj lin helpas malgranda dika sorĉisto nomata Rinkitinko kaj parolanta kapro."

"Oho! Parolanta kapro, ĉu? Tio certe sonas kiel magio; kaj ankaŭ sonas kiel la Lando Oz, kie ĉiuj bestoj parolas," diris Kalikoto, kun dubema mieno.

Sed Reĝo Goso certigis al li ke la parolanta kapro neniam estis en Oz.

"Rilate al Rinkitinko, kiun vi nomas sorĉisto," pludiris la Reĝo de la Knomoj, "li estas najbaro mia, sciu, sed ĉar ni estas apartigitaj unu de la alia de altaj montoj sub kiuj fluas tre forta rivero, mi ankoraŭ

neniam renkontis Reĝon Rinkitinkon. Sed mi ja aŭdis pri li, kaj laŭ ĉiuj raportoj li estas gaja fripono, kaj plene sendanĝera. Tamen, malgraŭ viaj falsaj deklaroj kaj misdiroj, mi perlaboros la trezoron kiun vi portis al mi, per sekura gardado de viaj kaptitoj en miaj kavernoj."

"Laborigu ilin," konsilis Reĝino Koro. "Ili estas iom delikataj, kaj se vi laborigos ilin tio bele suferigos ilin."

"Mi agos laŭ mia propra deziro pri tio," diris la Reĝo de la Knomoj severe. "Kontentiĝu per la fakto ke mi konsentas sekurigi ilin."

Ĉar la interkonsento estis tiel farita kaj finita, Kalikoto unue ekzamenis la oron kaj juvelojn kaj poste sendis ilin al sia reĝa magazeno, kiu estis tre plena de tia trezoro. Poste la kaptitoj estis forsenditaj estrate de la Knomo kun la ora kolumo kaj ŝlosiloj, kies nomo estis Kliko, kaj li eskortis ilin al malgranda kaverno kaj donis al ili bonan manĝon.

"Mi ŝlosos vian pordon," diris Kliko, "do ne plu necesas ke vi portu tiujn pezajn ĉenojn." Li tial forprenis la ĉenojn kaj lasis solaj Reĝon Kitikuton kaj lian Reĝinon. La unuan fojon post sia forportiĝo el Pingario fare de la Norduloj la bonaj Reĝo kaj Reĝino

estis kune solaj kaj liberaj de ĉiuj ligiloj, kaj dum ili ĉirkaŭbrakis unu la alian ame kaj kunmiksis siajn larmojn pri sia malfeliĉa sorto ili ankaŭ estis dankemaj ke ili pasis el la estrado fare de la senkora Reĝo Goso en la pli mildan estradon fare de Reĝo Kalikoto. Ili ankoraŭ estis kaptitoj sed ili kredis ke ili estos pli feliĉaj en la subteraj kavernoj de la Knomoj ol en Regoso kaj Koregoso.

Intertempe, en la reĝa kaverno de la Reĝo granda festeno estis pretigita. Reĝo Goso kaj Reĝino Koro, triumfinte pri sia intrigo, estis tiom plaĉitaj ke ili gaje festenadis kun la gaja Reĝo de la Knomoj ĝis malfrua horo tiun nokton. Kaj la sekvan matenon, avertinte al Kalikoto ke li nenial liberigu la kaptitojn krom se ili ordonos tion, la Reĝo kaj Reĝino de Koregoso forlasis la kavernojn de la knomoj por reiri al la bordo de la oceano kie ili estis lasintaj sian boaton.

# Ingo Transdonas Sian Palruĝan Perlon



## ĈAPITRO 18

La Blanka Perlo gvidis Ingon fidele dum li serĉis la boaton de Reĝo Goso, sed la knabo perdis tiom da tempo sendante sian popolon hejmen al Pingario ke nur plenan tagon post la alteriĝo de Goso kaj Koro sur la bordon de la Lando de la Raduloj la boato de Ingo venis al la sama loko.

Tie li trovis la kvardek remistojn gardantajn la barĝon de Reĝino Koro, kaj kvankam ili ne volis aŭ ne povis diri al la infano kien la Reĝo kaj Reĝino

kondukis liajn patron kaj patrinon, la Blanka Perlo konsilis ke li sekvu la vojon al la lando kaj la kavernoj de la knomoj.

Rinkitinko ne deziris entrepreni la rokoplenan kaj montan veturon, eĉ dum Bilbilo portos lin, sed li rifuzis dizerti Ingon, eĉ kvankam lia propra regno situas tuj preter aro da montoj kiuj estas videblaj turante sudokcidente de ili. Do la Reĝo brave suriris la kapron, kiu ĉiam grumblis sed ĉiam obeis sian mastron, kaj la trio tuj ekiris cele la kavernojn de la knomoj.

Ili veturis same nerapide kiel Reĝino Koro kaj Reĝo Goso, tiel ke kiam ili estis ĉirkaŭ duonvoje ili trovis la Reĝon kaj Reĝinon revenantaj al sia boato. La fakto ke Goso kaj Koro nun estas solaj pruvis ke ili postlasis la patron kaj patrinon de Ingo; do, laŭ propono de Rinkitinko, la trio kaŝis sin malantaŭ alta roko ĝis la Reĝo de Regoso kaj la Reĝino de Koregoso, kiuj ne observis ilin, preterpasis. Post tio ili daŭrigis sian veturon, feliĉaj ĉar ili ne denove devis batali aŭ kvereli siajn fimalamikojn.

"Tamen, ni povus esti demandintaj al ili kion ili faris pri viaj povraj gepatroj," diris Rinkitinko.

"Ne gravas," respondis Ingo. "Mi estas certa ke la

Blanka Perlo ĝuste gvidos nin."

Dum iom da tempo ili plumarŝis silente kaj post tio Rinkitinko komencis ridi laŭ la plaĉa maniero kiun li kutimis antaŭ ol liaj misfortunoj trafis lin.

"Kio amuzas Vian Moŝton?" demandis la knabo.

"Penso pri kiom surprizitaj estus miaj karaj regatoj se ili komprenus kiom proksima al ili mi estas, tamen kiom distanca. Mi ĉiam volis viziti la Landon de la Knomoj, kiu estas plena de misteroj kaj magio kaj ĉiaj aventuroj, sed miaj amantaj regatoj malpermesis ke mi pripensu tian aferon, timante ke mi estus damaĝita aŭ sorĉita."

"Ĉu vi timas, nun kiam vi estas ĉi tie?" demandis Ingo.

"Iomete, sed ne multe, ĉar oni diras ke la nova Reĝo de la Knomoj ne estas tiel fia kiel la malnova Reĝo. Tamen, ni ja entreprenas danĝeran veturon kaj mi opinias ke vi devus protekti min per pruntedono de unu el viaj perloj al mi."

Ingo pripensis tion kaj la peto ŝajnis inda.

"Kiun perlon vi deziras?" demandis la knabo.

"Nu, ni pensu," respondis Rinkitinko; "vi eble bezonos forton por liberigi viajn kaptitajn gepatrojn, do vi devas reteni la Bluan Perlon. Kaj vi bezonos la

konsilon de la Blanka Perlo, do estos plejbone ke vi retenu ankaŭ tiun. Sed se ni apartiĝus, mi havus nenion por protekti min kontraŭ damaĝo, do vi devus pruntedoni al mi la Palruĝan Perlon."

"Konsentite," konsentis Ingo, kaj sidiĝinte sur rokon li deprenis sian dekstran ŝuon kaj eltirinte la tukon el la pinta piedfingrejo li elprenis la Palruĝan Perlon—tiun kiu protektas kontraŭ damaĝo tiun personon kiu portas ĝin.

"Kien vi povos meti ĝin, por sekure gardi ĝin?" li demandis.

"En la poŝon de mia veŝto," respondis la Reĝo. "La poŝo havas klapon kaj mi povas pingle fermi ĝin tiel ke la perlo ne povos eliri kaj perdiĝi. Rilate al rabo, neniu fiintenca povos tuŝi min dum mi havos la perlon."

Do Ingo donis al Rinkitinko la Palruĝan Perlon kaj la malgranda Reĝo metis ĝin en la poŝon de sia ruĝ-kaj-verde brokita velura veŝto, kaj firme fermpinglis la klapon de la poŝo.

Ili nun rekomencis sian veturon kaj fine atingis la enirejon de la kavernoj de la Reĝo de la Knomoj. Metinte la Blankan Perlon apud sian orelon, Ingo demandis: "Kion mi faru nun?" kaj la Voĉo de la



Perlo respondis: “Kunfrapu viajn manojn kvarfoje kaj laŭtvoku la vorton ‘Klik’. Post tio permesu vin esti kondukitaj al la Reĝo de la Knomoj, kiu nun gardas kaptitaj viajn patron kaj patrino.”

Ingo obeis tiujn instrukciojn kaj kiam Klik alvenis responde al la alvoko la knabo petis renkontiĝon kun la Reĝo de la Knomoj. Do Klik kondukis ilin al Reĝo Kalikoto, kiu tiutempe suferis pro severa kapdoloro, pro sia gaja festenado dum la pasinta nokto, kaj tial estis nekutime malafabla kaj grumblema.

“Mi scias kiucele vi venis,” diris li, antaŭ ol Ingo povis paroli. “Vi volas forpreni de mi la kaptitojn el Regoso; sed vi ne povos fari tion, do plej bone estas ke vi reforiru.”

“La kaptitoj estas miaj patro kaj patrino, kaj mi intencas liberigi ilin,” diris la knabo firme.

La Reĝo gapis Ingon firme, mirante pro lia aŭdaco. Post tio li turnis sin por rigardi Reĝon Rinkitinkon kaj diris:

“Mi supozas ke vi estas la Reĝo de Gilgado, kiu estas en la Regno Rinkitinko.”

“Vi ĝuste divenis jam la unuan fojon,” respondis Rinkitinko.

“Kiom ronda kaj dika vi estas!” krietis Kalikoto.

# Ĉapitro Dek Ok

“Mi ĵus pensis kiom dika kaj ronda estas *vi*,” diris Rinkitinko. “Vere, Reĝo Kalikoto, ni devus esti amikoj, ĉar ni tiel similas ĉiel escepte de pri humoro kaj inteligento.”

Post tio li komencis nelaŭte ridi, dum Kalikoto forte gapis lin, ne sciante ĉu aŭ ne akcepti lian parolon kiel komplimenton. Kaj nun la okuloj de la knomo vagis al Bilbilo, kaj li demandis:

“Ĉu tiu estas via parolanta kapro?”

Bilbilo renkontis la grimacan gapon de la Reĝo de la Knomoj per rigardo egale malafabla kaj defia, dum Rinkitinko respondis: “Jes, Via Moŝto.”

“Ĉu li vere kapablas paroli?” demandis Kalikoto, scivoleme.

“Li kapablas. Sed lia plej granda talento estas riproĉado. Parolu al Lia Moŝto, Bilbilo.”

Sed Bilbilo restis silenta kaj rifuzis paroli.

“Ĉu vi ĉiam rajdas sur lia dorso?” pludiris Kalikoto, demandante Rinkitinkon.

“Jes,” estis la respondo, “ĉar estas malfacile por dikulo longe marŝi, kiel eble vi mem scias pro via sperto.”

“Estas vere,” diris Kalikoto. “Deiru de la dorso de la kapro kaj lasu min rajdi lin dum kelka tempo por

trovi kiel plaĉos al mi. Eble mi forprenos lin de vi, por rajdi tra miaj kavernoj."

Rinkitinko ridis tre nelaŭte aŭdante tion, sed tuj li deiris de la dorso de Bilbilo kaj permesis ke Kalikoto suriru. La Reĝo de la Knomoj estis iom mallerta, sed kiam li fine sidis sur la selo li vokis laŭtavoĉe: "Ek!"

Kiam Bilbilo tute ne atentis la ordonon kaj rifuzis moviĝi, Kalikoto piedfrapis per siaj kalkanumoj feroce la korpon de la kapro, kaj tiam Bibilo ekiris. Li kuris rapide trans la grandan kavernon, ĝis preskaŭ atingi la kontraŭan muron, kie li tiom abrupte haltis ke Reĝo Kalikoto flugis trans lian kapon kaj batiĝis kontraŭ la juvelitan muron. Li batiĝis tiom forte ke la pintoj de lia krono estis ĉiuj fleksitaj kaj misformitaj kaj lia kapo estis puŝita multe en la diamantornamitan randon de la krono, tiel ke ĝi kovris unu okulon kaj parton de lia nazo. Eble tio protektis la kapon de Kalikoto kontraŭ frakasiĝo pro la roka muro, sed multe damaĝis la kronon.

Al Bilbilo multe plaĉis la sukceso de lia ago kaj Rinkitinko ridis gaje pro la komika aspekto de la Reĝo de la Knomo; sed Kalikoto murmuradis kaj grumbladis dum li relevis sin kaj klopodis tiri la misbatitan kronon de sia kapo, kaj estis evidente ke



li estas neniel amuzita. Efektive, Ingo povis vidi ke la Reĝo estas tre kolera, kaj la knabo sciis ke la evento verŝajne malamikigos Kalikoton kontraŭ la tuta grupo.

La Reĝo de la Knomoj sendis Klikon alporti alian kronon kaj ordonis al siaj riparistoj ripari la damaĝitan kronon. Dum li atendis la novan kronon li sidis rigardante siajn vizitantojn sulkante la frunton, kaj tio des pli maltrankviligis Ingon. Fine, kiam la nova krono estis metita sur lian kapon, Reĝo Kalikoto diris: "Sekvu min, fremduloj!" kaj gvidis ilin al malgranda pordo ĉe unu ekstremo de la kaverno.

Ingo kaj Rinkitinko sekvis lin tra la pordejon kaj trovis sin starantaj sur balkono kiu alrigardis enorman kupolitan kavon—tiel vastan ke ŝajnis esti kilometroj ĝis ĝia alia flanko. Tute ĉirkaŭ tiu ronda kavo, kiun hele lumigis brilo el nevidebla origino, estis arkaĵoj konektitaj kun aliaj kavernoj.

Kalikoto prenis oran fajfilon el sia poŝo kaj sonigis akran noton kiu eĥis tra ĉiu parto de la kavo. Tuj Knomoj komencis enfluadi tra la flankaj arkaĵoj multnombre, ĝis la enorman spacon ili plenigis ĝis preter la vidpovo de la rigardantoj. Ĉiuj estis armitaj per scintilantaj armiloj el poluritaj arĝento kaj oro,

kaj Ingon mirigis ke Reĝo povus komandi tiel grandan armeon.

Ili komencis marŝi kaj remarŝi laŭ tre bonorda aranĝo ĝis nova sonigo de la ora fajfilo sendis ilin rekurantaj tiom rapide kiom kiam ili ekaperis. Kaj tuj kiam la granda kavo denove estis malplena Kalikoto reiris kun siaj vizitantoj al sia propra reĝa ĉambro, kie li denove sidigis sin sur sian eburan tronon.

"Mi montris al vi," diris li al Ingo, "parton de mia korpogardistaro. La reĝaj armeoj, de kiuj ĉi tiu estas nur parto, estas multenombraj kiel la sableroj de la oceano, kaj loĝas en multaj miloj da miaj subteraj kavernoj. Vi venis ĉi tien celante devigi min transdoni al vi la kaptitojn de Reĝo Goso kaj Reĝino Koro, kaj mi volis konvinki vin ke mia povo estas tro granda tiel ke neniu povas kontraŭi ĝin. Oni diris al mi ke vi estas sorĉisto, kaj dependas de magio por helpi vin; sed sciu ke la knomoj ne estas mortipovuloj, kaj ili mem sufiĉe bone komprenas magion, do se ni devos batali magion per magio plej verŝajne ni montriĝos centoble pli potencaj ol vi mem povus esti. Pripensu tion zorge, mia knabo, kaj penu kompreni ke mi superfortas vin. Mi ne kredas ke vi povos devigi min

liberigi Reĝon Kitikuton kaj Reĝinon Garion, kaj mi scias ke vi ne povos kaĵoli min fari tion, ĉar mi promesis al Reĝo Goso. Tial, ĉar mi ne volas damaĝi vin, mi petas ke vi pace foriru kaj lasu min sola."

"Pardonu min se mi ne konsentas kun vi, Reĝo Kalikoto," respondis la knabo. "Kvankam malfacila kaj danĝera eble estas mia tasko, mi ne povas foriri el via regno antaŭ ol fari ĉian penon liberigi miajn gepatrojn kaj fiaskinte plene senkuraĝiĝi."

"Bone," diris la Reĝo, al kiu evidente malplaĉis tio. "Mi avertis vin, do nun se malbono superos vin vi mem kulpos. Mia kapo doloras hodiaŭ, do mi ne povas dece konduti al vi laŭ viaj rangoj; sed Klik gvidos vin al miaj gastoĉambroj kaj morgaŭ mi denove parolos kun vi."

Tiu ŝajnis justa kaj ĝentila maniero trakti sindeklarintajn malamikojn, do ili ĝentile esprimis deziron ke la kapdoloro de Kaliko kuraciĝu, kaj sekvis sian gvidanton, Klik, laŭ bone iluminata koridoro kaj tra plurajn arkaĵojn ĝis fine ili atingis tri bele meblitajn litoĉambrojn ĉizitajn el solida griza roko kaj bone lumigatajn kaj aerumatajn per ia mistera metodo konata de la knomoj.

La unua de tiuj ĉambroj doniĝis al Reĝo Rinki-

tinko, la dua al Ingo kaj la tria al Bilbilo la kapro. Estis balanciĝanta roka pordo inter la tria kaj dua ĉambroj kaj alia inter la dua kaj unua, kiu ankaŭ havis pordon kiu malfermiĝas al la koridoro. La ĉambro de Rinkitinko estis la plej granda, do tie bonega manĝo estis provizita de kelkaj knomaj servistoj, kiuj, malgraŭ siaj malrektaj formoj, montriĝis bone trejnitaj kaj kompetentaj.

"Vi ne estas kaptitoj, sciu," diris Klik, "nek vi estas bonvenaj gastoj, ĉar vi deklaris intencon kontraŭi nian potencan Reĝon kaj ĉiujn liajn armeojn. Sed ni ne malbonvolas al vi, kaj vi estos bone manĝigataj kaj prizorgataj dum vi restos en niaj kavernoj. Manĝu ĝissate, dormu trankvile, kaj bonajn sonĝojn havu."

Dirinte tion, li lasis ilin solaj kaj tuj Rinkitinko kaj Ingo komencis interkonsiliĝi pri la plej bona metodo liberigi Reĝon Kitikuton kaj Reĝinon Garion. La konsilo de la Blanka Perlo estis iom nekontentiga al la knabo ĝuste nun, ĉar la Voĉo diris responde al liaj demandoj nur: "Estu pacienca, kuraĝa, kaj firmintenca."

Rinkitinko proponis ke ili provu trovi en kiu parto de la serio de subteraj kavernoj la gepatroj de Ingo estas enfermitaj, ĉar tiu sciaĵo estas necesa antaŭ ol

ili povos agi; do kune ili komencis serĉi, lasante Bilbilon dormantan en sia ĉambro, kaj marŝis neoponate tra multaj koridoroj kaj kavernoj.

En kelkaj lokoj estis grandaj fornoj, kie oni fandadis orpulvoron en brikojn. En aliaj ĉambroj metiistoj faradis el la oro diversajn objektojn kaj ornamaĵojn. En unu kaverno grandegaj radoj rotaciis polurante valorajn gemojn, kaj ili trovis multajn kavernojn uzatajn kiel magazenojn, kie trezoro ĉiuspeca estis alte stakita. Ankaŭ ili venis al la loĝejoj de la armeo kaj la grandaj kuirejoj.

Estis Knomoj ĉie—nenombreblaj miloj da ili—sed neniu eĉ ete atentis la vizitantojn el la surfaco de la tero. Tamen, kvankam Ingo kaj Rinkitinko marŝis ĝis laciĝo, ili ne povis trovi la lokon kie la patro kaj patrino de la knabo estis enfermitaj, kaj kiam ili provis reiri al siaj propraj ĉambroj ili trovis sin senespere perdiĝintaj en la labirinto da koridoroj. Tamen, Klik baldaŭ venis al ili, ridante pro ilia embarasiĝo, kaj regvidis ilin al iliaj litoĉambroj.

Antaŭ ol endormiĝi ili zorge barieris la pordon inter la ĉambro de Rinkitinko kaj la koridoro, sed ili lasis la pordojn konektantajn la tri ĉambrojn plene malfermaj.

# Ĉapitro Dek Ok

Dum la nokto Ingon vekis mola grata sono kiu plenigis lin per maltrankvilo ĉar li ne povis konjekti la kaŭzon. Estis mallume en lia ĉambro, ĉar la lumo malaperis tuj kiam li enlitiĝis, sed li sukcesis palpi sian vojon al la pordo kondukanta en la ĉambron de Rinkitinko kaj trovis ĝin firme ŝlosita kaj nemovebla. Post tio li paŝis al la kontraŭa pordo, kondukanta al la ĉambro de Bilbilo, kaj trovis ke ankaŭ tiu estis fermita kaj ŝlosita.

La knabo havis kuriozan senton ke lia tuta ĉambro—la muroj, planko kaj plafono—malrapide rotacias kvazaŭ sur pivoto, kaj la sento estis tiel malkomfortiga ke li denove enlitiĝis, ne sciante kion alian fari. Kaj ĉar la gratsono jam ĉesis kaj la ĉambro nun ŝajne estis senmova, li baldaŭ reendormiĝis.

Kiam la knabo vekiĝis, post multaj horoj, li trovis la ĉambron denove lumoplena. Do li vestis sin kaj trovis ke malgranda tablo, sur kiu estas fume varmega matenmanĝo, subite ekaperis en la centro de lia ĉambro. Li provis la du pordojn, sed trovinte ke li ne povas malfermi ilin li manĝis iom, penseme demandante al si kiu enŝlosis lin kaj kial li fariĝis kaptito. Post tio li denove iris al la pordo kiu laŭ lia supozo kondukas en la ĉambron de Rinkitinko kaj

surprize al li la riglilo facile leviĝis kaj la pordo malfermiĝis.

Antaŭ li estis kruda koridoro ĉizita en la roko kaj nebrile iluminata. Ĝi ne havis allogan aspekton, do Ingo fermis la pordon, perpleksa pri kio okazis al la ĉambro de Rinkitinko kaj la Reĝo, kaj li iris al la kontraŭa pordo. Malferminte tion, li trovis solidan rokan muron antaŭ si, kiu efike neebligis ke li eskapu tiudirekte.

La knabo nun komprenis ke Reĝo Kalikoto trompis lin, kaj kvankam dirante akcepti lin kiel gaston tamen komplotis apartigi lin de liaj kamaradoj. Unu vojo tamen restis, per kiu li povus eskapi, kaj li decidis vidi kien ĝi kondukas.

Do, irinte al la unua pordo, li malfermis ĝin kaj nerapide paŝis en la malhele iluminatan koridoron. Antaŭenirinte kelkajn paŝojn li aŭdis la pordon de sia ĉambro brufermiĝi malantaŭ li. Li rekuris tuj, sed la roka pordo tiel strikte plenigis la aperturon ke li trovis ke estas neeble remalfermi ĝin. Tio ne multe gravis, tamen, ĉar la ĉambro estis karcero kaj la sola eskapvojo ŝajnis esti antaŭ li.

Laŭ la koridoro li rampis ĝis, turninte sin ĉirkaŭ angulon, li trovis sin en granda kupolhava kaverno



kiu estis vaka kaj senhoma. Ankaŭ tie estis nehela lumo kiu ebligis al li vidi alian koridoron ĉe la kontraŭa flanko; do li transiris la rokan plankon de la kaverno kaj eniris duan koridoron. Tiu serpentumis ĉiudirekte sed ne estis tre longa, do baldaŭ la knabo atingis duan kavernon, ne tiel grandan kiel la unua. Tiun li ankaŭ trovis vaka, sed alia koridoro kondukis el ĝi, do Ingo eniris tiun. Ĝi estis rekta kaj mallonga kaj preter ĝi estis tria kaverno, kiu malmulte diferencis de la aliaj krom ke ĉe unu ĝia flanko estis fortika fera krado.

Ĉiuj tri kavernoj estis krude ĉizitaj el la roko kaj aspektis neniam uzitaj, malsimile al ĉiuj aliaj kavernoj de la knomoj kiujn li antaŭe vizitis. Starante en la tria karavano, Ingo vidis kion li kredis ankoraŭ plia koridoro ĉe la kontraŭa flanko, do li marŝis cele ĝin. Tiu aperturo estis senluma, kaj tiu fakto, kaj la solena silento tute ĉirkaŭ li, dum kelka tempo hezitigis lin eniri ĝin. Pripensinte, tamen, li komprenis ke krom se li esploros la lokon ĝis la plejfino li ne povos esperi eskapi el ĝi, do li kuraĝe eniris la senluman koridoron kaj palpis sian vojon zorge dum li antaŭenpaŝis.

Apenaŭ li faris du paŝojn kiam bruego sonis

malantaŭ li kaj peza ŝtalplato fermis la aperturon en la kaverno el kiu li ĵus venis. Li paŭzis momente, sed ankoraŭ ŝajnis ke estos plej bone plumarŝi, kaj dum Ingo antaŭeniris en la mallumo, tenante siajn manojn etenditaj antaŭ si por palpi la vojon, manligiloj falis sur liajn pojnojn kaj kunŝlosis sin per akra klako, kaj momenton poste li trovis sin ĉenita al fortika fera stango firme fiksita en la roka planko.

La ĉenoj estis sufiĉe longaj por permesi lin moviĝi unu-du metrojn ĉiudirekte kaj palpante la murojn li trovis sin en malgranda ronda ĉambro kiu havis neniun elirejon krom la koridoron per kiu li eniris, kaj tio nun estis fermita per la ŝtala pordo. Jen la fino de la serio de kavernoj kaj koridoroj.

Nur nun la hororo de lia situacio trafis la knabon plenforte. Sed li firme decidis ne cedi al sia fato senbarakte, kaj ekmemorante ke li posedas la Bluan Perlon, kiu donas al li mirindan forton, li rapide rompis la ĉenojn kaj liberigis sin de la manligiloj. Post tio li tordis la ŝtalan pordon de ĝiaj ĉarniroj, kaj rampinte laŭ la mallonga koridoro, li trovis sin en la tria kavo.

Nun la nehela lumo, kiu antaŭe gvidis lin, jam

malaperis; sed rigardetante en la senlumecon de la kavo li vidis ion kio aspektas du rondaj diskoj de flamo, kiuj ĵetis neklaran brilon super la planko kaj muroj. Per tiu neklara brilo li sukcesis vidi la formon de enorma viro, kiu sidas en la centro de la kavo, kaj li vidis ke la fera krado estis forprenita, tiel ke la viro povis eniri.

La giganto estis nevestita kaj ĝiaj membroj estis dike kovrataj de maldelikataj ruĝaj haroj. La rondaj diskoj de flamo estis ĝiaj du okuloj kaj kiam ĝi malfermis sian buŝon por oscedi Ingo vidis ke ĝiaj makzeloj estas sufiĉe larĝaj por dispremi dekduon da homoj inter la gigantaj vicoj de dentoj.

Baldaŭ la giganto suprenrigardis kaj perceptis la knabon kaŭrantan ĉe la kontraŭa flanko de la kaverno, do li vokis per raŭka kruda voĉo:

"Venu ĉi tien, mia bela knabo. Ni kune baraktos, vi kaj mi, kaj se vi sukcesos ĵeti min surteren mi permesos ke vi trairu mian kavon."

La knabo ne respondis al la defio. Li komprenis ke li estas en severa danĝero kaj bedaŭris ke li pruntedonis la Palruĝan Perlon al Reĝo Rinkitinko. Sed nun estis tro malfrue por vanaj bedaŭroj, kvankam li timis ke eĉ lia granda forto malmulte



helpos lin kontraŭ tiu harkovrita monstro. Ĉar liaj brakoj ne estis sufiĉe longaj por etendiĝi trans kvaronon de la grandega korpo de la giganto, kaj la fortegaj membroj de la monstro verŝajne premus la vivon el Ingo antaŭ ol li povus fariĝi mastro.

Tial la Princo decidis uzi aliajn rimedojn por batali tiun malamikon, kiu sendube estis metita tien por bari lian revenon. Retroirinte tra la koridoro li atingis la ĉambron kie li estis antaŭe ĉenita kaj torde tiris la feran stangon el ĝia ingo. Ĝi estis duonan metron dika kaj pli ol metron longa, kaj ĉar ĝi estis el solida fero ĝi estis tiel peza ke tri ordinaraj viroj trovus ĝin malfacile levebla.

Reirinte al la kaverno, la knabo svingis la grandan stangon super sia kapo kaj ĵetis ĝin fortege rekte al la giganto. Finaĵo de la stango batis la frunton de la monstro, kaj farinte unusolan ĝemon ĝi falis sternite sur la plankon kaj kuŝis senmove.

Kiam la giganto falis, la brilo fadis el ĝiaj okuloj, kaj fariĝis tute senlume. Zorgoplene, ĉar Ingo ne estis certa ke la giganto estas morta, la knabo palpis sian vojon cele la aperturon kiu kondukas al la meza kaverno. La aperturo estis mallarĝa kaj la mallumo estis intensa, sed, estante nun pli kuraĝa, la knabo

paŝis brave antaŭen. Tuj la planko komencis fali sub li kaj tre alarmite li turnis sin kaj saltis sufiĉe forte por kroĉiĝi al la rokaj flankoj de la muro kaj refirmigi sian staron en la koridoro tra kiun li ĵus venis.

Apenaŭ li atingis tiun rifuĝejon kiam giganta bruo sonegis tra la kaverno kaj la sono de rapide fluanta torento venis el tre sube. Ingo palpis en sia poŝo kaj trovis plurajn alumetojn; li flamigis unu el ili kaj tenis ĝin antaŭ si. Dum ĝi flagris li vidis ke la tuta planko de la kaverno estis forfalinta, kaj li sciis ke se li ne estus tuj regajinta sian piedstaron en la koridoro li estus plonĝinta en la abismon situantan sub li.

Per la lumo de alia alumeto li vidis la aperturon ĉe la alia flanko de la kavo kaj trafis lin la penso ke eble li povus salti trans la abismon. Kompreneble, tio tute ne estus farebla sen la mirinda forto pruntita al li de la Blua Perlo, sed Ingo havis senton ke unu fortega salto eble portus lin trans la abismon sekure. Li ne povis resti kie li estas, tio estis certa, do li decidis provi.

Li faris longan kuron tra la unuan kavon kaj la nelongan koridoron; post tio, uzante sian tutan forton, li ĵetis sin trans la nigran abismon de la dua

kavo. Rapide li flugis kaj, kvankam lia koro pro timo ĉesis bati, nur pasis kelkaj sekundoj antaŭ ol liaj piedoj tuŝis la breton de la kontraŭa koridoro kaj li eksciis ke li sekure sukcesis fari la mirindan taskon.

Paŭzinte nur por entiri unu senŝarĝigan spiron, Ingo rapide trairis la nerektan koridoron kiu kondukas al la lasta el la tri kavernoj. Sed kiam li ekvidis ĝin li paŭzis abrupte, ĉar liajn okulojn preskaŭ blindigis brilego de forta lumo kiu ekfrapis ilin. Kovrinte sian vizaĝon per siaj manoj, Ingo retroiris malantaŭ etendiĝon de rokangulo kaj iom post iom li kutimigis siajn okulojn al la lumo kaj li fine povis rigardi senpalpebrume la strangan brilon kiu tiel rapide ŝanĝis la kondiĉon de la kaverno. Kiam li antaŭe trapasis ĉi tiun volbon ĝi estis tute vaka. Nun la plata planko el roko estis ĉie kovrata de bedo da ardantaj karboj, kiu suprenetendis malgrandajn langojn da ruĝaj kaj blankaj flamoj. Efektive, la tuta kavo estis unu monstra forno kaj la varmego venanta el ĝi estis timiga.

La koro de Ingo sinkis en li dum li komprenis pri la terura obstaklo metita de la ruza Reĝo de la Knomoj inter lin kaj la sekurecon troveblan en la aliaj kavernoj. Ne eblis retroiri, ĉar estus neeble ke li



denove transsaltu la abismon en la dua kaverno, ĉar la koridoro ĉiflanke estas tiom nerekta ke li ne povus kuri antaŭ ol salti. Nek li povus transsalti la ardantajn karbojn de la kaverno antaŭ li, ĉar ĝi estis multe pli granda ol la meza kaverno. Pro tiu dilemo li timis ke lia granda forto ne utilos al li kaj li amare riproĉis sin ke li fordonis la Palruĝan Perlon, kiu protektus lin kontraŭ damaĝo.

Tamen, Princo Ingo ne havis naturon kiu malesperus longatempe, ĉar liaj pasintaj aventuroj instruis al li fidon kaj kuraĝon, akrigis lian intelekton kaj donis al li genion de eltrovemo. Li sidiĝis kaj pensis profunde pri metodoj eskapi el sia danĝero kaj fine lerta ideo trafis lian menson. Jen la metodo akiri ideojn: neniam permesu ke miscirkonstancoj senkuraĝigu vin, sed kredu ke ekzistas metodo eliri ĉiun embarason, kaj oni povas trovi ĝin per profunda pensado.

Estis multaj pintoj kaj etendaĵoj de roko en la muroj de la malrekta koridoro en kiu staras Ingo kaj kelkaj el tiuj rokoj estis fenditaj kaj malfiksitaj, kvankam ili ankoraŭ kroĉiĝis al siaj lokoj. La knabo elektis grandan pecon, kaj, per sia tuta forto, ŝirtiris ĝin el la muro. Li poste portis ĝin al la kaverno kaj



ĵetis ĝin sur la ardantajn karbojn, proksimume tri metrojn for de la fino de la koridoro. Post tio li reiris por alia fragmento da roko, kaj ŝirtirinte ĝin el ĝia loko, li ĵetis ĝin tri metrojn preter la unua, direkte al la kontraŭa flanko de la kavo. La knabo daŭrigis tiun laboron ĝis li estis farinta serion de paŝŝtonoj rekte trans la kavernon ĝis la obskura pretera koridoro, kiu laŭ lia espero rekondukos lin al sekureco eĉ se ne al libereco.

Kompletiginte sian laboron, Ingo ne longe hezitis uzi avantaĝe siajn paŝŝtonojn, ĉar li sciis ke lia plej bona ŝanco eskapi konsistas el transiro de la bedo da karboj antaŭ ol la rokoj fariĝos tiom varmaj ke ili bruligos liajn piedojn. Do li saltis al la unua roko kaj de tie li komencis salti de unu al alia rapide sinsekve. Velkiga ondo da varmego tuj kovris lin, kaj dum kelka tempo li timis sufokiĝi antaŭ ol povi transiri la kavernon; sed li entenis sian spiron, por neebligi ke la varmega aero eniru liajn pulmojn, kaj daŭrigis siajn saltojn firme kvankam preskaŭ senespere.

Post tio, antaŭ ol li sciiĝis, liaj piedoj premis la malpli varmajn rokojn de la pretera koridoro kaj li ruliĝis senhelpe sur la planko, anhelante pro manko de spiro. Lia haŭto estis tiom ruĝa ke ĝi similis la

ŝelon de boligita omaro, sed lia rapida moviĝo evitigis brulon, kaj liaj ŝuoj havis dikajn plandumojn, kiuj sekurigis liajn piedojn.

Ripozinte dum kelkaj minutoj, la knabo sentis sin sufiĉe forta por pluiri. Li iris al la fino de la koridoro kaj trovis ke la roka pordo per kiu li foriris el sia ĉambro ankoraŭ estis ferma, do li reiris al proksimume la mezo de la koridoro kaj pripensadis kion li devus sekve fari, kiam subite la solida roko antaŭ li komencis moviĝi kaj aperturo aperis tra kiun brilis helega lumo. Ŝildante siajn okulojn, kiuj estis iomete blinditigaj, Ingo saltis tra la aperturon kaj trovis sin en unu el la loĝataj kavernoj de la Reĝo de la Knomoj, kie antaŭ li staris Reĝo Kalikoto, kun larĝa rideto sur sia vizaĝo, kaj Klik, la ĉambelano de la Reĝo, kiu aspektis surprizita, kaj Reĝo Rinkitinko sidanta sur Bilbilo la kapro, al kiuj klare plaĉis la reveno de Ingo.



# Rinkitinko Subridas



## ĈAPITRO 19

Ni nun rakontos kio okazis al Rinkitinko kaj Bilbilo tiumatene, dum Ingo spertis siajn ĉagrenajn spertojn dum sia eskapo de la timigaj danĝeroj de la tri kavernoj.

La Reĝo de Gilgado vekiĝis kaj trovis ke la pordo de la ĉambro de Ingo estas firme fermita kaj ŝlosita, sed li tute ne spertis problemon kiam li malfermis sian propran pordon en la koridoron, ĉar ŝajnas ke la ĉambro de la knabo, kiu estis la meza ĉambro, rotaciis sur pivoto, sed la apudaj ĉambroj, okupataj de Bilbilo

kaj Rinkitinko, restis senmovaj. La malgranda Reĝo ankaŭ trovis matenmanĝon magie sendita en sian ĉambron, kaj dum li manĝis ĝin, Klik venis al li kaj deklaris ke Lia Moŝto, Reĝo Kalikoto, deziras ke li ĉeestu en la reĝa kaverno.

Do Rinkitinko, unue certiginte ke la Palruĝa Perlo ankoraŭ estas en la poŝo de lia veŝto, volonte sekvis Klikon, kiu kuris antaŭe je ioma distanco. Sed tuj kiam Rinkitinko paŝis en la koridoron granda roko, peza almenaŭ tunon, malfiksiĝis kaj falis de la plafono rekte super lia kapo. Kompreneble, ĝi ne povis damaĝi lin, ĉar li estis protektata de la Palruĝa Perlo, kaj ĝi flankensaltis kaj frakasiĝis sur la plankon, kie ĝi diseriĝis pro sia propra pezo.

"Tre senzorge!" kriis la malgranda Reĝo, kaj anaspaŝis sekvante Klikon, kiu aspektis surprizegita de lia eskapo.

Baldaŭ alia roko super Rinkitinko plonĝis suben, kaj ankaŭ alia, sed neniu tuŝis lian korpon. Klinko aspektis multe perpleksa pro tiuj pluaj eskapoj kaj certe Kalikoto estis surprizita kiam Rinkitinko, plene sekura, eniris la reĝan kavernon.

"Bonan matenon," diris la Reĝo de Gilgado. "Viaj rokoj malfiksiĝas, Kalikoto, kaj vi nepre regluigu ilin

en iliajn lokojn antaŭ ol ili damaĝos iun." Poste li komencis subridi: "Hu, hu, hu-hi, hi-hik, kik, ik!" kaj Kalikoto sidis kaj sulkis la frunton ĉar li ekkomprenis ke la malgranda dika Reĝo mokas lin.

"Mi petis ke Via Moŝto venu ĉi tien," diris la Reĝo de la Knomoj, "por montri al vi kuriozan buklaron da ora fadeno kiun faris miaj metiistoj. Se ĝi plaĉas al vi, mi donacos ĝin al vi."

Dirinte tion li etendis malgrandan buklaron da scintilanta ora ŝnuro, kiu estis vere bela kaj kurioza. Rinkitinko prenis ĝin per mano kaj tuj la ora fadeno komencis malvolviĝi—tiel rapide ke la okulo ne povis sekvi ĝian moviĝon. Kaj, dum ĝi malvolviĝis, ĝi volvis sin ĉirkaŭ la korpon de Rinkitinko, samtempe teksante sin en reton, ĝis ĝi kovris la malgrandan Reĝon de kapo ĝis piedo kaj metis lin en oran karceron.

"Aha!" kriis Kalikoto; "*ĉi tiu* magio ĝuste funkciis, laŭŝajne."

"Ho, ĉu?" respondis Rinkitinko, kaj antaŭen-paŝante li marŝis tute tra la oran reton, kiu falis surplanken, konfuzita amaso.

Kalikoto frotis sian mentonon penseme kaj gapis firme Rinkitinkon.

"Mi komprenas multan magion," diris li, "sed Via Moŝto havas ian magion kiu multe perpleksigas min, ĉar ĝi estas malsimila al ĉio tia kion mi ĝis nun renkontis."

"Nu, atentu, Kalikoto," diris Rinkitinko; "se vi celas damaĝi min aŭ miajn kompanojn, ĉesu, ĉar vi neniam sukcesos. Ni estas nedamaĝeblaj, pli-malpli, kaj vi nur malŝparas vian tempon penante difekti nin."

"Vi eble pravas, kaj mi esperas ne esti tiom malĝentila ke mi kverelus kun gasto," respondis la Reĝo de la Knomoj. "Sed pardonu min ke mi ankoraŭ ne estas konvinkita ke vi estas pli forta ol mia fama magio. Tamen, mi petas ke vi kredu ke mi neniel malbonvolas al vi, Reĝo Rinkitinko; sed mia devo estas detrui vin, se eble, ĉar vi kaj tiu sensignifa knaba Princo malkaŝe minacis forpreni miajn kaptitojn kaj firme rifuzis reiri al la tersurfaco kaj ĉesi ĝeni min. Mi estas tre molkora, efektive, kaj mi multege ŝatas vin kaj ĝuus vin kiel amikon, sed—" Nun li premis butonon sur la brako de sia tronseĝo kaj la parto de la planko kie staras Rinkitinko ekmalfermiĝis kaj montris nigran truegon suban, kiu estis parto de la terura Senfunda Abismo.



Sed Rinkitinko ne falis en la truon; lia korpo restis ŝvebanta en la aero ĝis li antaŭenmetis piedon kaj paŝis sur la solidan plankon, kaj tiam la aperturo ekrefermiĝis.

"Mi altetaksas la amikecon de Via Moŝto," komentis Rinkitinko, trankvile kvazaŭ neniu okazis, "sed mi laciĝas pro starado. Ĉu vi bonvolos venigi mian kapron, Bilbilo, por ke mi sidu sur lia dorso kaj ripozu?"

"Jes ja!" promesis Kalikoto. "Mi ankoraŭ ne kompletigis mian provon de via magio, kaj ĉar mi ŝuldas iom da venĝo al tiu kapro ĉar li batis mian kapon kaj frakasis mian preskaŭ-plej-bonan kronon, mi volonte trovos ĉu ankaŭ la besto povos eskapi de miaj plezurigaj sorĉaĵetoj."

Do Klik estis senditu venigi Bilbilon kaj baldaŭ revenis kun la kapro, kiu estis tre malafabla tiun matenon ĉar ĝi ne bone dormis en la subteraj kavernoj.

Rinkitinko ne prokrastis suriri la ruĝveluran selon kiun konstante portis la kapro, ĉar li timis ke la Reĝo de la Knomoj provos detrui Bilbilon kaj sciis ke dum lia korpo tuŝas tiun de la kapro la Palruĝa Perlo protektos ilin ambaŭ; sed, se Bilbilo starus sola, nenia

magio savus lin.

Bilbilo figapis Reĝon Kalikoton, kiu moviĝis maltrankvile en sia ebura trono. Post tio la Reĝo de la Knomoj flustris dum momento en orelon de Kliko, kiu kapjesis kaj foriris el la ĉambro.

"Bonvolu senti vin ĉehejme ĉi tie dum kelkaj minutoj, dum mi prizorgos taskon," diris la Reĝo de la Knomoj, stariĝante de la trono. "Mi revenos al vi baldaŭ, kaj mi esperas trovi vin pecama aŭ pacema—ha, ha, ha!—tiun ŝercon vi ne povas ĝuste taksi nun sed vi povos poste. Estu pacpecema—jen la koncepto. Ho, ho, ho! Vere komike." Post tio li anaspaŝis el la kaverno, kaj fermis la pordon post si.

"Nu, kial vi ne ridis kiam Kalikoto ridis?" demandis la kapro, kiam ili estis solaj en la kaverno.

"Ĉar li fiplanas ion," respondis Rinkitinko, "kaj ni ridos post la finiĝo de la danĝero, Bilbilo. Malnova maksimo diras: 'Kiu laste ridas plej bone ridas', kaj oni nur laste ridas se la aliulo havas oportunon. El kie venis tiu tranĉilo? Kurioze."

Ĉar longa akra tranĉilo subite aperis en la aero proksime al ili, tordiĝante kaj turniĝante de flank-al-flank', kaj flugante tien kaj tien tre danĝere, tute sen videbla subteno. Post tio alia tranĉilo vidiĝis—kaj plia

kaj plia—ĝis la tuta spaco en la reĝa kaverno aspektis plena de ili. Iliaj akraj pintoj kaj randoj flugis cele Rinkitinkon kaj Bilbilon konstante kaj nenio savus ilin de diseriĝo escepte de la protektanta povo de la Palruĝa Perlo. Sed efektive, neniu tranĉilo tuŝis ilin kaj eĉ Bilbilo raŭke ridis pro la fiasko de la lerta magio de Kalikoto.

La kapro vagis tien kaj tien en la kaverno, portante Rinkitinkon sur sia dorso, kaj neniu el ili eĉ ete atentis la zumantajn tranĉilojn, kvankam la scintilo de la centoj da poluritaj klingoj iom ĝenis iliajn okulojn. Dum eble dek minutoj la tranĉiloj ĉirkaŭflugis ilin konfuzege; sed subite ili malaperis subite kiel ili estis aperintaj.

Kalikoto sinzorge puŝis sian kapon tra la pordejon kaj trovis la kapron maĉanta la brodaĵojn de lia reĝa mantelo, kiun li lasis kuŝanta sur la trono, dum Rinkitinko legas sian manuskripton pri "Kiel Bone Konduti" kaj subridas pro ĝia konsilo. La Reĝo de la Knomoj aspektis ege malfeliĉa dum li envenis kaj residiĝis sur la tronon. Diris Rinkitinko subridante:

"Vere estis tre pace, Kalikoto, kvankam ne pece kiel anticipis vi. Pardonu ke mi indulgas min per rido—hu, hu, hu-hi, hik-kik-ik! Kaj nun, diru al mi;

ĉu vi ne enuas pro la provoj damaĝi nin?"

"E-he," diris la Reĝo de la Knomoj. "Mi vidas nun ke via magio povas protekti vin kontraŭ ĉiuj miaj artoj. Sed ĉu la knabo Ingo estas tiel bone protektata kiel Via Moŝto kaj la kapro?"

"Kial vi demandas?" demandis Rinkitinko, kiun maltrankviligis la demando ĉar li memoris ne esti vidinta la malgrandan Princon de Pingario tiumatene.

"Ĉar," diris Kalikoto, "la knabo trasuferas provojn multe pli grandajn kaj pli danĝerajn ol tiuj kiujn vi renkontis, kaj de centoj da jaroj neniu kapablas eskapi viva el la danĝeroj de miaj Tri Trompaj Kavernoj."

Reĝon Rinkitinkon multe alarmis aŭdi tion, ĉar kvankam li sciis ke Ingo posedas la Bluan Perlon, tio donus al li nur eksterordinaran forton, kaj eble forto sola ne ebligus lian eskapon el danĝero. Sed li malvolis ke Kalikoto vidu la timon kiun li sentas pri la sekureco de Ingo, do li diris laŭ senzorga maniero:

"Vi estas ege malkompetanta magiisto, Kalikoto, kaj mi donos al vi mian kronon se Ingo ne eskapis el ĉiu danĝero per kiu vi minacis lin."

"Via tuta krono ne valoras unu el la valoraj diamantoj en mia krono," respondis la Reĝo de la

Knomoj, “sed mi prenos ĝin. Ni iru tuj, do, kaj vidu kio okazis al la knaba Princo, ĉar se li ne estas jam detruita, mi agnoskas ke li ne estas damaĝebla per iu el la magiaj artoj kiujn mi komandas.”

Li foriris el la ĉambro, akompanate de Klik, kiu nun jam revenis al sia mastro, kaj de Rinkitinko rajdanta sur Bilbilo. Trairinte plurajn el la gigantaj kavernoj ili eniris kavernon kiu estis iom pli lumoplena kaj gaja ol la aliaj, kie la Reĝo de la Knomoj haltis antaŭ roka muro. Tiam Kliko premis sekretan risorton kaj sekcio de la muro malfermiĝis kaj montris la koridoron kie staras Princo Ingo frontante ilin.

“Tortoj kaj ranidoj!” kriis Kalikoto surprizite. “La knabo ankoraŭ vivas!”

# Doroteo Venas Savi



## ĈAPITRO 20

Unu tagon kiam Doroteo de Oz vizitis Glindan la Bonan, kiu estas la Reĝa Sorĉistino de Ozma, ŝi trarigardis la Grandan Libron de Arkivoj—en kiu estas enskribitaj ĉiuj gravaj eventoj okazantaj en ĉiu parto de la mondo—kaj ŝi ekvidis la arkivon pri la detruiĝo de Pingario, la kaptiĝo de Reĝo Kitikuto kaj Reĝino Gario kaj ilia tuta popolo, kaj la kurioza eskapo de Ingo, la knaba Princo, kaj de Reĝo Rinkitinko kaj la parolanta kapro. Turninte kelkajn el la sekvaj paĝoj, Doroteo legis pri

kiel Ingo trovis la Magiajn Perlojn kaj remas la arĝente tegitan boaton al Regoso por provi savi siajn gepatrojn.

La knabineton multe interesis scii kiel Ingo sukcesos, sed ŝi reiris al la palaco de Ozma en la Smeralda Urbo de Oz la sekvan tagon kaj aliaj eventoj forgesigis al ŝi la knaban Princon de Pingario provizore. Tamen, unu tagon dum ŝi sencele rigardis la Magian Bildon de Ozma, kiu montras kiun ajn scenon oni deziras, la knabino ekpensis pri Ingo kaj ordonis la Magian Bildon montri kion faras la knabo tiumomente.

Tiutempe Ingo kaj Rinkitinko estis sekvintaj la Reĝon de Regoso kaj la Reĝinon de Koregoso al la lando de la Reĝo de la Knomoj, kaj ŝi vidis ilin kaŝiĝintaj malantaŭ la roko dum Koro kaj Goso pasis ilin transdoninte la Reĝon kaj Reĝinon de Pingario al la Reĝo de la Knomoj por ke li gardu ilin. Ekde tiam Doroteo observis, per la Magia Bildo, la aventurojn de Ingo kaj liaj amikoj en la kavernoj de la Reĝo de la Knomoj, kaj la danĝero kaj la senhelpeco de la povra knabo vekis kompaton kaj indignon en la knabineto.

Do ŝi iris al Ozma kaj rakontis ĉion pri Ingo kaj Rinkitinko al la bela knabina Reganto de Oz.

# Ĉapitro Dudek

“Mi opinias ke Kalikoto ege aĉe mistraktas ilin,” deklaris Doroteo, “kaj mi volas ke vi permesu ke mi iru al la Lando de la Knomoj kaj helpu ilin eskapi el siaj problemoj.”

“Iru, kara, se vi deziras,” respondis Ozmo, “sed mi opinias ke estos plej bone ke vi kunprenu la Sorĉiston.”

“Ho, mi ne timas la Knomojn,” diris Doroteo, “sed mi volonte kunprenos la Sorĉiston kiel kompanon. Kaj ĉu ni rajtos uzi vian Magian Tapiŝon, Ozma?”

“Kompreneble. Metu la Magian Tapiŝon en la Ruĝan Ĉaregon kaj lasu la Segĉevalon tiri vin kaj la Sorĉiston al la rando de la dezerto. Dum via foresto, Doroteo, mi observos vin en la Magia Bildo, kaj se ia danĝero minacos vin mi certigos ke vi ne estos damaĝita.”

Doroteo dankis la Reganton de Oz kaj kise adiaŭis ŝin, ĉar ŝi firme decidis tuj komenci la veturon. Ŝi trovis la Sorĉiston de Oz, kiu plantas ŝuarbojn en la ĝardeno, kaj kiam ŝi rakontis al li pri Ingo li volonte akceptis akompani la knabineton al la kavernoj de la Reĝo de la Knomoj. Ili ambaŭ jam antaŭe estis tie kaj konkeris la Knomojn facile, do ili tute ne timis.

La Sorĉisto, kiu estis gaja vireto kun kalva kapo kaj ĉarma rideto, jungis la Lignan Segĉevalon al la

Ruĝa Ĉarego kaj enŝarĝis la Magian Tapiŝon de Ozma. Post tio li kaj Doroteo grimpis sur la sidejon kaj la Segĉevalo ekkomencis tiri ilin rapide tra la bela Lando Oz al la rando de la Mortiga Dezerto kiu apartigis ilian felandon de la Lando de la Knomoj.

Eĉ Doroteo kaj la lerta Sorĉisto ne kuraĝus transiri tiun dezerton sen la helpo de la Magia Tapiŝo, ĉar ĝi rapide detruus ilin; sed kiam la rulo de tapiŝo estis metita sur la randon de la sableroj, kun ĝuste sufiĉe da ĝi sternita plate sur kiu ili povis stari, la tapiŝo tuj komencis malruliĝi antaŭ ili kaj dum ili marŝis sur ĝi ĝi plu malruliĝis, ĝis ili sekure transmaŝis la Mortigan Dezerton kaj estis sur la bordo de la regno de la Reĝo de la Knomoj.

Tiu veturo estis kompletigita dum kelkaj minutoj, kvankam tioma distanco necesigus plurajn tagojn da veturado se ili ne marŝus sur la Magia Tapiŝo. Alveninte ili tuj marŝis cele la enirejon de la kavernoj de la knomoj.

La Sorĉisto portis malgrandan nigran sakon en kiu estis liaj sorĉiloj, dum Doroteo portis sur sia brako kovritan korbon en kiu ŝi estis enmetinta dek du ovojn, per kiuj ŝi konkeros la knomojn se ili okazigos problemojn.


S de OZ

Eble vi opinias ke ovoj estas kurioza armilo per kiu batali, sed la knabineto bone konis ilian valoron. La knomoj estas senmortaj; tio estas, ili ne pereas, kiel mortipovuloj, *krom se ili ekkontaktas ovon*. Se ovo tuŝas ilin—aŭ la ekstera ŝelo aŭ la interno de la ovo—la knomoj perdas sian ŝorĉkaŭzitan eternan vivon kaj post tio povas morti pro akcidento aŭ maljuneco, same kiel ĉiuj homoj.

Pro tio eĉ la ekvido de ovo plenigas knomon per teroro kaj li akceptas fari ion ajn por neebligi ke ovo trafos lin eĉ dum momenteto. Do, kiam Doroteo kunprenis sian korbon da ovoj, ŝi sciis ke ŝi estas pli forte armita ol se ŝi havus regimenton da soldatoj malantaŭ si.





# La Sorĉisto Trovas Sorĉaĵon



## ĈAPITRO 21

Post kiam Kalikoto malsukcesis detrui siajn gastojn, kiel estas rakontite, la Reĝo de la Knomoj faris nenion pli por damaĝi ilin sed traktis ilin amikeme. Li rifuzis, tamen, permesi Ingon vidi siajn patron kaj patrinon, aŭ paroli kun ili, aŭ eĉ scii en kiu parto de la subteraj kavernoj ili estas enfermitaj.

“Vi kapablas protekti viajn vivojn kaj korpojn, mi senrezerve agnoskas tion,” diris Kalikoto; “sed mi firme kredas ke vi ne havas povon, ĉu magian ĉu

alispecan, forpreni de mi la kaptitojn kiujn mi akceptis gardi por Reĝo Goso."

Ingo rifuzis konsenti pri tio. Li firme decidis ne foriri el la kavernoj antaŭ ol liberigi siajn patron kaj patrinon, kvankam li ne tiutempe sciis kiel tio estus efektivigebla. Rilate al Rinkitinko, tiu gaja Reĝo estis bone manĝigata kaj havis bonan liton sur kiu dormi, do li ne maltrankvilis pri io ajn kaj ŝajne tute ne fervoris foriri.

Kalikoto kaj Rinkitinko okupadis sin per ĵetludo uzanta solidajn orajn ĵetaĵojn, sur la planko de la reĝa ĉambro, kaj Ingo kaj Bilbilo rigardis ilin, kiam Klik ekenkuris. Liaj haroj staris rekte pro ekscitiĝo, kaj li kriis ke la Sorĉisto de Oz kaj Doroteo proksimiĝas.

Kalikoto paliĝis aŭdante tiun nebonvenan informon kaj, lasante sian ludon, iris sidi en sia ebura trono kaj peni konjekti kio venigis tiujn timigajn vizitantojn al lia regno.

"Kiu estas Doroteo?" demandis Ingo.

"Ŝi estas knabineto kiu iam loĝis en Kansas," respondis Klik tremante, "sed ŝi nun loĝas en la palaco de Ozma en la Smeralda Urbo kaj estas Princino de Oz—tio signifas ke ŝi estas terura

malamiko por ni."

"Ĉu ŝi malamas la knomojn?" demandis la knabo.

"Ne pro tio," diris Reĝo Kalikoto, ĝemante, "sed ŝi insistas ke la knomoj estu boneculoj, kio estas kontraŭ ilia naturo. Doroteo koleriĝas se mi faras ion ajn eĉ iomete fian, kaj penas ĉesigi min, kaj nature tio mizerigas min. Mi ne povas konjekti kial ŝi ĝuste nun venas, ĉar mi lastatempe kondutas tre bone. Kaj rilate al tiu Sorĉisto de Oz, li estas plenplena de magio kiun mi ne povas superi, ĉar li lernis ĝin de Glinda, kiu estas la plej potenca sorĉistino en la mondo. Ve al mi! Kial Doroteo kaj la Sorĉisto ne restis en Oz, kie ili devus esti?"

Ingo kaj Rinkitinko aŭskultis tion tre ĝoje, ĉar tuj ilin trafis la ideo pledi al Doroteo ke ŝi helpu ilin. Eĉ Bilbilo atentigis siajn orelojn aŭdante mencion pri la Sorĉisto de Oz, kaj la kapro ŝajnis malpli malafabla, kaj multe pli pensema ol kutime.

Kelkajn minutojn poste knomo venis diri ke Doroteo kaj la Sorĉisto estas venintaj kaj postulas eniri, do Klik sendiĝis konduki ilin antaŭ la Reĝon de la Knomoj.

Tuj kiam ŝi envenis la knabineto kuris al la knaba Princo kaj prenis ambaŭ liajn manojn.

“Ho, Ingo!” ŝi kriis, “tiom ĝojigas min trovi vin viva kaj bonstata.”

Ingon surprizis tiom varma saluto. Profunde riverencante li diris:

“Mi kredas ke ni ne antaŭe renkontiĝis, Princino.”

“Vi ja pravas,” respondis Doroteo, “sed mi scias ĉion pri vi kaj mi venis helpi vin kaj Reĝon Rinkitinkon eskapi el viaj problemoj.” Post tio ŝi turnis sin al la Reĝo de la Knomoj: “Vi devus honti, Reĝo Kalikoto, tiel fie traktinte honestan Princon kaj honestan Reĝon.”

“Mi neniel damaĝis ilin,” plendaĉis Kalikoto, tremante dum ŝiaj okuloj flagris al li.

“Ne; sed vi penis, kaj tio estas egale fia se ne pli,” diris Doroteo, kiu estis tre indigna. “Kaj nun mi volas ke vi venigu la Reĝon kaj Reĝinon de Pingario, *tujtuje*!”

“Mi rifuzas,” diris Kalikoto.

“Jes ja!” kriis Dorteo, piedbatante la plankon pro li. “Mi malpermesas plu malfeliĉigi tiujn povrulojn, nek apartigi ilin de ilia fileto. Ĉar estas *aĉege*, Kalikoto, kaj mi miras pro vi. Vi nepre estas pli fia ol mi supozis.”

“Mi ne povas, Doroteo,” diris la Reĝo de la



Knomoj, preskaŭ plorante pro senesperiĝo. “Mi promesis al Reĝo Goso ke mi gardos ilin kaptitaj. Vi ne petus min rompi mian promeson, ĉu?”

“Reĝo Goso estis rabisto kaj krimulo,” ŝi diris, “kaj eble vi ne scias ke marŝtormo detruis lian boaton, dum li reiris al Regoso, kaj ke kaj li kaj Reĝino Koro dronis.”

“Jadi!” kriis Kalikoto. “Ĉu vere?”

“Mi vidis tion en la Libro de Arkivoj de Glinda,” diris Doroteo. “Do nun alpaŝigu la Reĝon kaj Reĝinon de Pingario tujtujege.”

“Ne,” persistis la kontraŭema Reĝo de la Knomoj, kapneante, “mi rifuzas. Petu ion alian kaj mi penos kontentigi vin, sed mi ne povas permesi ke ĉi tiuj amikaj malamikoj triumfu min.”

“Tiukaze,” diris Doroteo, komencante depreni la kovrilon de sia korbo, “mi montros al vi kelkajn ovojn.”

“Ovoj!” kriegis la Reĝo de la Knomoj, teruroplene. “Ĉu vi havas ovojn en tiu korbo?”

“Dekduon da ili,” respondis Doroteo.

“Do restigu ilin tie—mi petas—mi petegas!—kaj mi faros kion ajn vi ordonas,” pledis Kalikoto, kaj liaj dentoj kunklakadis tiom ke li apenaŭ povis paroli.

“Alvenigu la Reĝon kaj Reĝinon de Pingario,” diris Doroteo.

# Ĉapitro Dudek Unu

"Agu, Klik," ordonis la Reĝo de la Knomoj, kaj Klik forkuris tre rapide, ĉar li preskaŭ tiom timis kiom lia mastro.

Estis kortuŝa sceno kiam la misfortunaj Reĝo kaj Reĝino de Pingario eniris la ĉambron kaj plorante kaj larmante pro ĝojo ĉirkaŭbrakis sian bravan kaj aventureman filon. Ĉiuj aliaj staris silente ĝis la salutoj kaj kisoj estis interŝanĝitaj kaj Ingo rakontis al siaj gepatroj kelkvorte pri siaj vanaj klopodoj savi ilin kaj kiel Princino Doroteo fine venis helpi lin.

Post tio Reĝo Kitikuto premis la manojn de sia amiko Reĝo Rinkitinko kaj dankis lin pro lia lojala subteno al lia filo Ingo, kaj Reĝino Gario kisis la frunton de malgranda Doroteo kaj benis ŝin pro reliberigi ŝian edzon kaj ŝin.

La Sorĉisto staradis apud Bilbilo la kapro kaj nun surprizis lin aŭdi la beston diri:

"Ĝojoplena rekuniĝo, ĉu ne? Sed enuigas min vidi plenkreskintojn plori kvazaŭ infanoj."

"Oho!" kriis la Sorĉisto. "Kiel estas, S-ro Kapro, ke vi, kiu neniam estis en la Lando Oz, kapablas paroli?"

"Jen mia afero," respondis Bilbilo malafablatone.

La Sorĉisto klinis sin kaj rigardis fikse en la okulojn de la besto. Post tio li diris, ĝemante

kompate, "mi vidas; vi estas sorĉita. Efektive, mi kredas vin Princo Bobo de Bobolando."

Bilbilo ne respondis sed falklinis sian kapon kvazaŭ honte.

"Jen grava trovo," diris la Sorĉisto, parolante al Doroteo kaj la aliaj en la grupo. "Antaŭ multaj jaroj kruela magiisto transformis la bravan Princon de Bobolando en parolantan kapron, kaj la kapro, hontante pro sia stato, forkuris kaj neniam revidiĝis en Bobolando, kiu estas lando tre sude de ĉi tie sed bordanta la Mortigan Dezerton, kontraŭpozicie al la Lando Oz. Mi aŭdis tiun rakonton antaŭ longe kaj scias ke oni diligente serĉis la sorĉitan Princon, senrezulte. Sed mi estas tute certa ke, en la besto kiun vi nomas Bilbilo, mi trovis la malfeliĉan Princon de Bobolando."

"Jadi, Bilbilo," diris Rinkitinko, "kial vi neniam diris tion al mi?"

"Kiel utilus?" demandis Bilbilo nelaŭtavoĉe kaj ankoraŭ rifuzante suprenrigardi.


"Utilus?" ripetis Rinkitinko, perplekse.

"Jes, jen la ĉefproblemo," diris la Sorĉisto. "Tiu estas unu el la plej fortaj sorĉoj iam efektivigitaj, kaj la magiisto jam mortis kaj la sekreto de la antidota



sorĉo estas perdita. Eĉ mi, malgraŭ mia tuta lerto, ne povas redoni al Princo Bobo lian normalan formon. Sed mi opinias ke Glinda eble povus fari tion kaj se vi ĉiuj reiros kun Doroteo kaj mi al la Lando Oz, kie Ozma bonvenigos vin, mi petos Glindan provi rompi tiun sorĉaĵon."

Pri tio ili volonte konsentis, ĉar al ĉiuj estis bonvena la oportuno viziti la faman Landon Oz. Do ili adiaŭis Reĝon Kalikoton, kiun Doroteo avertis deteni sin de fio se eble, kaj la tuta grupo reiris per la Magia Tapiŝo al la Lando Oz. Ili tre plenigis la Ruĝan Ĉaregon, kiu ankoraŭ atendis ilin; sed la Segĉevalon tio ne ĝenis kaj per mirinda rapido li tiris ilin sekure al la Smeralda Urbo.



# La Bankedo de Ozma



## ĈAPITRO 22

Ozma vidis en sia Magia Bildo la liberiĝon de la gepatroj de Ingo kaj la foriron de la tuta grupo cele la Smeraldan Urbon, do laŭ sia kutima gastigemo ŝi ordonis prepari grandiozan bankedon kaj invitis ĉiujn siajn kuriozajn amikojn kiuj tiam estis en la Smeralda Urbo ĉeesti tiun vesperon por renkonti la fremdulojn kiu fariĝos ŝiaj gastoj.

Ankaŭ Glinda, per sia mirinda Libro de Arkivoj sciiĝis pri la eventoj okazintaj en la kavernoj de la

Reĝo de la Knomoj, kaj ŝi precipe interesiĝis pri la sorĉiĝo de la Princo de Bobolando. Do ŝi haste preparis plurajn el siaj plej potencaj sorĉoj kaj post tio alvokis sian gregon de dek ses blankaj cikonioj, kiuj rapide portis ŝin al la palaco de Ozma. Ŝi alvenis tie antaŭ la Ruĝa Ĉarego kaj ŝin varme salutis la knabina Reganto.

Komprenante ke la kostumo de Reĝino Gario de Pingario sendube eluziĝis kaj ĉifiĝis, pro ŝiaj malfacilaĵoj kaj aventuroj, Ozma ordonis prepari konvenajn vestojn por la bona Reĝino kaj metigis ilin en ŝian ĉambron pretaj por ke ŝi surmetu ilin tuj post sia alveno, por ke ŝi ne hontu ĉe la bankedo. Novaj kostumoj ankaŭ proviziĝis al Reĝo Kitikuto kaj Reĝo Rinkitinko kaj Princo Ingo, ĉiuj tajlitaj kaj faritaj kaj ornamitaj laŭ la tre detala kaj belaspektiga stilo tiam kutima en la Lando Oz, kaj tuj kiam la grupo alvenis al la palaco, la gastojn de Ozma eskortis ŝiaj servistoj al la ĉambroj, por ke ili banu kaj vestu sin.

Glinda la Sorĉistino kaj la Sorĉisto de Oz speciale atentis Bilbilon la kapron kaj iris al privata ĉambro kie ili verŝajne ne estos interrompitaj. Glinda unue demandadis al Bilbilo longe kaj serioze pri kie li estis sorĉita kaj la rito uzita de la Magiisto kiu sorĉis lin.


# Ĉapitro Dudek Du

Unue Bilbilo protestis ke li ne volas regajni sian natŭran formon, dirante ke li estis por ĉiam hontigita laŭ la vidpunkto de lia popolo kaj de la tuta mondo pro sia devo ekzisti kiel maldika, malneta kapro. Sed Glinda atentigis ke kiu ajn persono kiun malamikis fimagiisto riskas similan faton, kaj certigis al li ke lia misfortuno eĉ pli instigos liajn regatojn ami lin kiam li revenos al ili libera de sia missorĉiteco.

Bilbilo fine konvinkiĝis pri la vero de tiu aserto kaj akceptis partopreni en la eksperimentoj de Glinda kaj la Sorĉisto, kiuj sciis ke ili havas antaŭ si malfacilan taskon kaj estis tute ne certaj pri sukceso. Ni scias ke Glinda estas la plej kompleta mastrino de magio iam ekzistinta, kaj ŝi estis sufiĉe saĝa por diveni ke la lerta sed fia magiisto kiu sorĉis Princon Bobon uzis sorĉon kiun nur tre perplekse ordinara sorĉisto provus rompi; tial ŝi tre sagace pripensis la aferon kaj esperis esti farinta planon kiu sukcesos. Sed ĉar ŝi ne estis certa pri sukceso ŝi volis ke neniu ĉeestu dum la sorĉo escepte de ŝia helpisto, la Sorĉisto de Oz.

Unue ŝi transformis Bilbilon la kapron en ŝafidon, kaj tio fariĝis tre facile. Post tio ŝi transformis la ŝafidon en struton, donante al ĝi du krurojn kaj

piedojn anstataŭ kvar. Post tio ŝi provis transformi la struton en la originalan Princon Bobon, sed tiu sorĉo plene fiaskis. Tamen Glinda ne perdis kuraĝon, sed per potenca sorĉo ŝi transformis la struton en totenhoton—kiu estas malpli alta formo de homo.




Poste la totenhoto transformiĝis en mifketon, kio estis granda paŝo antaŭen, kaj, fine, Glinda transformis la mifketon en belan junulon, altan kaj belforman, kiu surgenuiĝis antaŭ la granda Sorĉistino kaj dankeme kisis ŝian manon, agnoskante ke nun li rehavas sian

naturan formon kaj estas tute vere Princo Bobo de Bobolando.

Tiu procedo de magio, kvankam fine sukcesa, necesigis tiom da tempo ke la bankedo nun atendis ilian ĉeeston. Bobo estis jam vestita per princaj vestoj




kaj kvankam li ŝajnis tre multe humiligita pro sia antaŭnelonga malaltranga stato, ili fine persvadis lin partopreni en la festeno.

Kiam Rinkitinko vidis ke lia kapro nun fariĝis Princo, li ne sciis ĉu bedaŭri aŭ ĝoji, ĉar li kredis ke

li sentos la mankon de la kompaneco de la kverelema besto sur kiu li tiom longe kutimis rajdi, tamen samtempe li ĝojis ke povra Bilbilo reakiris sian veran naturon.

Princo Bobo humile petis pardonon de Rinkitinko








pro sia kelkfoja malafableco al li, dirante ke la naturo de kapro influis lin kaj la malagrabla humuro kiun li montris estis parto de lia ŝorĉiteco. Sed la gaja Reĝo certigis al la Princo ke vere li ĝuis la grumblemajn parolojn kaj volonte pardonas lin. Efektive, ili ĉiuj trovis la junan Princon Bobon ekstreme ĝentila kaj

plaĉa persono, kvankam li estas iom sindetena kaj digna.

Ha, la festeno kiun Ozma disponigis en sia grandioza bankedhalo tiunokte estis vere granda kaj




ĉiu estis kiel eble plej feliĉa. La Vilulo ĉeestis, kaj ankaŭ Joĉjo Kukurbokapo kaj la Stana Lignohakisto kaj Kap'tano Vilĉjo. Apud Princino Doroteo sidis Eta Trot kaj Betinjo Bobin, kaj la tri knabinetoj estis preskaŭ tiel dolĉaspektaj kiel Ozma, kiu sidis ĉe la

kapo de sia tablo kaj superbrilis ĉiujn siajn gastojn per sia beleco.

Reĝo Rinkitinko multe ĝuis la kuriozulojn de Oz kaj ridis kaj ŝercis kun la stana viro kaj la kukurbokapa viro kaj trovis Kap'tanon Vilĉjon tre agrabla kompano. Sed kio plej amuzis la Reĝon estis la bestaj gastoj, kiujn Ozma ĉiam invitis al siaj bankedoj kaj sidigis ĉe tablo aparta, kie ili interparolis kaj babilis simile al homoj sed ricevis tiajn manĝaĵojn kiajn bezonas iliaj naturoj. La Malsata Tigro kaj la Malkuraĝa Leono kaj la Vitra Kato estis multe admirataj de Rinkitinko, sed kiam li renkontis mulon nomatan Hanĉjo, kiun Betinjo Bobin venigis al Oz, la Reĝo trovis la beston tiom komika ke li ridis kaj subridis ĝis liaj amikoj kredis ke li sufokiĝos. Poste, dum la bankedo plu daŭris, Rinkitinko komponis kaj kantis kanton al la mulo kaj ili ĉiuj partoprenis en la rekantaĵo, kiu estis iom tia:

"Jen kia belo, la orelo
De Sinjor' Azeno!
Sed ti'orelo, kia ŝelo
Por simio do malbeno.
Longa, dika, larĝa, pika,



Por aŭdi tre rapida,
Bonaspekta do sur Henĉjo
Sur feo tamen hida!"

Tiun kanton oni tiom entuziasme akceptis ke Rinkitinko persvadiĝis kanti duafoje. Oni donis al li iom da tempo por pretigi la rimaĵon; li diris ke ĝi estus pli bona se li povus dediĉi unu-du monatojn al la verko, sed la sento kiun li esprimis estis tiom admirinda ke neniu kritikis la kanton aŭ la manieron laŭ kiu la gaja malgranda Reĝo kantis ĝin.

Doroteo skribis la vortojn sur pecon da papero, kaj jen ili:

"Kamaradoj gajaj ĉiuj ni,
Ĉar venkis ni en lukto ĉi
Defion en homa formo.
Kaj ni nenion timas, do
Ni ridu gaje, kantu, ho,
Ĝis superfortos nin la dormo.

"Ni ĉion deziratan havas,
Reĝ' Goso siajn fiŝojn lavas
Kaj ankaŭ Reĝino Koro.

Reĝ' Kitikuto trovis bonon,
Princ' Bobo havos sian tronon,
  Foriris la magi-hororo.

"Forgesu ni la ĝenon lacan
Trafintan nian vivon pacan
  Doloran pro la ĝen';
Ĉar baldaŭ ni transmaren
Iros, kaj vivos ne plu sen
  La Pingaria ben'."



# La Perla Regno



## ĈAPITRO 23

Domaĝe la fama Birdotimigilo—la plej populara persono en la tuta Oz, post Ozma—forestis kiam okazis la bankedo, ĉar ĝuste tiam, hazarde, li veturadis tra la lando; sed la Birdotimigilo havis oportunon poste renkonti Rinkitinkon kaj Ingon kaj la Reĝon kaj Reĝinon de Pingario kaj Princon Bobon, ĉar la grupo restis plurajn semajnojn en la Smeralda Urbo, kie ili estis reĝe distrataj, kaj kie kaj la milda Reĝino Gario kaj la nobla Reĝo Kitikuto reakiris grandan parton de sia

bonhumoro kaj spirita ekvilibro kaj penis forgesi siajn terurajn spertojn.

Fine, tamen, la Reĝo kaj Reĝino deziris reiri al sia propra Pingario, ĉar ili sopiris denove esti kun sia popolo kaj vidi kiel bone ili rekonstruis siajn hejmojn. Ankaŭ Ingo tre fervoris reiri, kvankam li estis tre feliĉa en Oz, kaj Reĝo Rinkitinko, kiu estis feliĉa ĉie escepte de en Gilgado, decidis iri kun siaj antaŭaj amikoj al Pingario. Rilate al Princo Bobo, li tiom plezuriĝis pro Reĝo Rinkitinko ke li ne deziris lasi lin.

Je certa tago ili ĉiuj adiaŭis Ozman kaj Doroteon kaj Glindan kaj la Sorĉiston kaj ĉiujn siajn bonajn amikojn en Oz, kaj estis ŝoforitaj en la Ruĝa Ĉarego al la rando de la Mortiga Dezerto, kiun ili sekure transmarŝis sur la Magia Tapiŝo. Post tio ili transiris la Regnon de la Knomoj kaj la Regnon de la Raduloj, kie neniu molestis ilin, ĝis la bordo de la Nonesta Oceano. Tie ili trovis la boaton kun la arĝenta tegaĵo kuŝanta sendifekta sur la plaĝo.

Ne estis gravaj aventuroj dum la veturo kaj kiam ili atingis la perlan regnon ilin mirigis la bela aspekto de la insulo kiu estis nur ruinoj kiam ili foriris el ĝi. Ĉiuj domoj de la popolo jam estis rekonstruitaj kaj estis pli belaj ol antaŭe, kun verdaj gazonoj antaŭ si kaj

florĝardenoj en la malantaŭaj kortoj. La marmoraj turoj de la nova palaco de Reĝo Kitikuto estis tre imponaj, kaj la palaco mem montriĝis multe pli grandioza ol antaŭ ol la batalistoj el Regoso detruis ĝin.

Nikoroĉjo tre aktive kaj lerte direktis la tutan laboron, kaj li ankaŭ konstruis por si belan dometon ne malproksime de la palaco de la Reĝo, kaj tie Ingo trovis Zellan, kiu loĝis tre feliĉe kaj kontente en sia nova hejmo. Nikoroĉjo ne nur efektivigis ĉion ĉi dum relative mallonga tempo, sed li ankaŭ rekomencis la perlofiŝadon kaj kiam Reĝo Kitikuto revenis al Pingario li trovis nombron da tre bonaj perloj jam en la reĝa trezorejo.

Tiom plaĉis al Kitikuto la bona juĝkapablo, laboremo kaj honesteco de la iama braĝobruligisto de Regoso, ke li nomumis Nikoroĉjon sia Alta Ĉambelano kaj estro de la perlofiŝejoj kaj ĉiuj negocoj de la insula regno.


Ili ĉiuj ekloĝis tre komforte en la nova palaco kaj la Reĝino denove grupigis ĉirkaŭ sin siajn servistinojn kaj donis al ili kiel laboron la taskon brodi novajn drapiraĵojn por la reĝa trono. Ingo metis la tri Magiajn Perlojn en ilian silkan sakon kaj remetis ilin en la sekretan kavaĵon sub la kahelkovrita planko de

la bankedhalo, el kie ili estus rapide elpreneblaj se danĝero iam minacus la nun prosperan insulon.

Reĝo Rinkitinko okupis reĝan gastoĉambron konstruitan specife por li kaj ŝajne tute ne deziris rapide forlasi siajn amikojn en Pingario. La dika malgranda Reĝo devis marŝi kien ajn li iris do li pli kaj pli sentis la mankon de Bilbilo; sed li malofte marŝis longe kaj li tiom amis Princon Bobon ke li neniam bedaŭris la malsorĉiĝon de Bilbilo.

Efektive, la gaja monarko povus resti por ĉiam en Pingario, se li dezirus, ĉar lia gaja humoro ridetigis la vizaĝojn de ĉiuj liaj amikoj kaj gajigis ĉiun apud li tiom kiom gajis li mem. Kiam Reĝo Kitikuto ne tro okupis sin pri ŝtataferoj li amis kuniĝi kun sia gasto kaj aŭskulti la kantojn kaj rakontojn de sia frata monarko. Ĉar li trovis Rinkitinkon, malgraŭ ties senzorga humoro, sagaca filozofo, kaj priparolante la aventurojn unu tagon la Reĝo de Gilgado diris:

“La vivo estas bela pro siaj subitaj ŝanĝoj. Neniu scias kio sekve okazos, do ni konstante estas surprizataj kaj distrataj. La multaj leviĝoj kaj malleviĝoj devas ne senkuraĝigi nin, ĉar kiam ni subiris ni scias ke ŝanĝo venos kaj ni resupreniros; kaj kiuj estas supre preskaŭ certe subiros. Mia avo havis kanton kiu bone esprimas



tion kaj se vi aŭskultos mi kantos ĝin."

"Kompreneble mi aŭskultos vian kanton," respondis Kitikuto, "ĉar estus malĝentile ne aŭskulti."

Do Rinkitinko kantis la kanton de sia avo:

"Potenca Reĝo landon regis—
  Sed nun li bakas tortojn.
Malriĉulo lignon segis,
  Nun diras Reĝajn vortojn.

Tigro iam en ĝangalo
  loĝis, nun en Zoo paŝas;
Al leon' en kaĝo nun la malo:
  En ĝangalo li sin kaŝas.

Knabon batis vir' ĝisoste,
  Plorigis lin per vip' el fero.
La knabo Juĝistiĝis poste,
  La viron sendis al karcero.

Nokton sekvas suna tago;
  Neĝo sekvas la someron!
Misfaron sekvas bona ago,
  Saĝulo scias tiun veron."

# La Kaptita Reĝo



## ĈAPITRO 24

Unu matenon, ĝuste dum la reĝa grupo finis sian matenmanĝon, servisto alkuris por diri ke granda amaso da boatoj proksimiĝas al la insulo el la sudo. Reĝo Kitikuto tuj ekstaris, alarmite, ĉar li pro tre bonaj kialoj timis fremdajn boatojn. La aliaj rapide sekvis lin al la bordo por vidi kia invado eble venas al ili.

Ingo ĉeestis kun la unuaj, kaj Nikoroĉjo kaj Zella baldaŭ kuniĝis kun la rigardantoj. Kaj baldaŭ, dum ĉiuj gapis fervore la alproksimiĝantan boataron, Reĝo

Rinkitinko subite kriis:

“Alportu viajn perlojn, Princo Ingo—alportu rapide!”

“Ĉu venas niaj malamikoj, do?” demandis la knabo, rigardante surprizite la dikan malgrandan Reĝon, kiu komencis tremi forte.

“Estas mia popolo el Gilgado!” respondis Rinkitinko, viŝante larmon el sia okulo. “Mi rekonas miajn reĝajn standardojn flirtantajn de la boatoj. Do, mi petas, kara Ingo, alportu viajn perlojn por protekti min!”

“Kion vi timas el la manoj de viaj propraj regatoj?” demandis Kitikuto, mirante.

Sed antaŭ ol lia timoplena gasto povis respondi la demandon Princo Bobo, kiu staris apud sia amiko, amuzite ridis kaj diris:

“Finfine kaptita, kara Rinkitinko. Via popolo reportos vin hejmen kaj devigos vin regi kiel Reĝo.”

Rinkitinko laŭte ĝemis kaj kunpremis siajn manojn per senespera gesto, mieno tiel komika ke la aliaj apenaŭ povis deteni sin de ridado.

Sed nun la boatoj surteriĝadis. Ili estis kvindek, bele ornamitaj kaj remburitaj kaj remataj de viroj vestitaj per la gajaj uniformoj de la Reĝo de Gilgado.

# Ĉapitro Dudek Kvar

Unu grandioza boato havis tronon el oro en sia centro, sur ĝi estis drapirita la Reĝa robo purpurvelura, brodita per oraj ranunkoloj.

Rinkitinko tremis vidante tiun tronon; sed nun alta viro, bele vestita, proksimiĝis kaj surgenuiĝis antaŭ sia Reĝo, dum ĉiuj aliaj perrsonoj en la boato kriis ĝoje kaj gestis en la aero per siaj plumhavaj ĉapeloj.

"Dank' al nia bonfortuno," diris la surgenua viro, "ni fine trovis Vian Moŝton!"

"Pinkerbluo," respondis Rinkitinko severe, "mi nepre pendumigu vin, ĉar vi trovis min kontraŭ mia volo."

"Tion vi opinias nun, Via Moŝto, sed vi neniam faros tion," respondis Pinkerbluo, stariĝante kaj kisante manon de la Reĝo.

"Kial ne?" demandis Rinkitinko.

"Ĉar vi estas multe tro molkora, Via Moŝto."

"Eble tiel—eble tiel," konsentis Rinkitinko, malfeliĉe. "Jen unu el miaj plej grandaj kulpoj. Sed kiu fortuno venigis vin ĉi tien, Lordo Pinkerbluo?"

"Ni serĉis vin ĉie, sinjoro, kaj la tuta popolo de Gilgado malesperas ekde kiam vi tiel mistere malaperis. Ni ne povis nomumi novan Reĝon, ĉar ni ne sciis ĉu vi plu vivas; do ni entreprenis trovi vin, ĉu

mortan ĉu vivan. Vizitinte multajn insulojn de la Nonesta Oceano ni fine pensis pri Pingario, el kie venas la valoregaj perloj; kaj nun nia fidela serĉo estas respondita."

"Kio okazos nun?" demandis Rinkitinko.

"Nun, Via Moŝto, vi devas reveni hejmen kun ni, kiel bona kaj fidela Reĝo, kaj regi vian popolon," deklaris la viro per firma voĉo.

"Mi rifuzas."

"Sed vi devas—pardonu Via Moŝto mian kontraŭdiron.

"Kitikuto," ploris povra Rinkitinko, "vi devas savi min de kaptiĝo fare de tiuj miaj regatoj. Kion! Ĉu mi devas reiri al Gilgado kaj devi regi grandioze kvankam mi multe preferas manĝi kaj dormi kaj kanti trankvile laŭ mia propra maniero? Ili devigos min sidi en trono tri horojn ĉiutage kaj aŭskulti sekajn tedajn ŝtataferojn; kaj mi devos stari surpiede dum horoj dum kortegaj akceptoj, ĝis kaloj formiĝas sur miaj kalkanumoj; kaj ĉiam mi devos aŭskulti enuigajn parolojn kaj senfinajn petojn kaj plendojn!"

"Sed iu devas fari tion, Via Moŝto," diris Pinkerbluo respektoplene, "kaj ĉar vi estis naskita nia Reĝo vi ne povas eskapi de via devo."



# Ĉapitro Dudek Kvar

“Fato terura!” ĝemis Rinkitinko. “Volonte mi mortus, anstataŭ esti Reĝo—se ne tiom dolorus la mortado.”

“Vi trovos ke estas multe pli komforte regi ol morti, kvankam mi plene komprenas la malfacilecon de la pozicio de Via Moŝto kaj vere kompatas vin,” diris Pinkerbluo.

Reĝo Kitikuto aŭskultis tiun konversacion penseme, do nun li diris al sia amiko:

“La viro pravas, kara Rinkitinko. Via devo estas regi, ĉar la fato faris vin Reĝo, kaj mi ne vidas honoroplenan eskapon por vi. Mi lamentos la perdon de via kompaneco, sed mi kredas ke la apartiĝo ne estas evitebla.”

Rinkitinko ĝemis.

“Do,” diris li, turninte sin al Lordo Pinkerbluo, “post tri tagoj mi foriros kun vi al Gilgado; sed dum tiuj tri tagoj mi intencas festeni kaj ĝui, akompanate de mia bona amiko Reĝo Kitikuto.”

Tiam ĉiuj homoj el Gilgado kriis pro ĝojo kaj fervore saltis surteren por partopreni en la festado.

Tiuj tri tagoj longe memoriĝis en Pingario, ĉar neniam—nek antaŭe nek poste—koniĝis tiaj festado kaj gajeco sur tiu insulo. Rinkitinko bonege okupis

sin kaj ĉiuj ridis kaj kantis kun li tage kaj nokte.

Fine la horo de foriro okazis kaj la Reĝon de Gilgado kaj Reganton de la Regno Rinkitinko eskortis granda procesio al lia boato kaj sidigis sur lian oran tronon. La remistoj de la kvindek boatoj paŭzis, kun siaj scintilantaj remiloj montrantaj supren kvazaŭ gigantaj levitaj sabroj, dum la popolo de Pingario—viroj, virinoj kaj infanoj—staris sur la bordo kriante reĝan adiaŭon al la gaja Reĝo.

Sekvis subita silento, dum Rinkitinko stariĝis kaj, riverencinte al la personoj kiuj grupiĝis por rigardi lian foriron, kantis la ĉisekvan kanton, kiun li ĵus verkis por la evento.

“Do ĝis!, Insulo Pingari'—
Plej bela lando mara vi!
Neniu homo pova morti
Hontus viajn perlojn porti.

“Reĝo Kitikuto, kun bedaŭro
Min plorigas l' adiaŭo.
Sed mi ne povas resti pli,
Ĉar kvindek ŝipoj prenos min.



"Adiaŭ, Princ' de Pingari';
Nobla Reĝo estos vi
Kaj longe, saĝe volu regi
Al neniu malamiko cedi!"

Ili hurais lin de la bordo; ili hurais lin de la boatoj; kaj post tio ĉiuj remiloj de la kvindek boatoj ekplonĝis kvazaŭ unumove kaj premis siajn platajn flankojn en la purpurkoloran akvon de la Nonesta Oceano.

Dum la boatoj moviĝis rapide trans la ondetojn de la maro Rinkitinko turnis sin al Princo Bobo, kiu decidis ne dizerti sian eksmastron kaj nun-amikon, kaj demandis maltrankvile:

"Ĉu plaĉis al vi tiu kanto, Bilbilo—mi volas diri, Bobo? Ĉu majstroverko, laŭ via opinio?"

Kaj Bobo respondis ridetante:

"Kiel ĉiuj viaj kantoj, kara Rinkitinko, la sento multe superas la poezion."


FINO



